

eLIBRO

Vinko Ošlak

Filozofii subtende

*Populare verkitaj dialogoj
pri bazaj vivsencaj demandoj
por junaj ver-serĉantoj*



INKO

Vinko Ošlak

FILOZOFII SUBTENDE

*Populare verkitaj dialogoj
pri bazaj vivsencaj demandoj
por junaj verserĉantoj*

*La presitan libron eldonis eldonejo
Hermagoras, Klaŭdiforomo 2000 kun
ISBN 3-85013-770-8. Ĝi estas mende-
bla ĉe la kutimaj libroservoj.*

© 2000 Vinko Ošlak

*Mi dankas al mia amiko Eugène de
Zilah pro liaj lingvaj kaj fakaj konsiloj
— tamen mi mem portas la finan
respondecon pri ĉiuj lingvaj kaj fakaj
mankoj aŭ malperfektaĵoj. V. O.*

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-121-6

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

INKO · SE-13542 TYRESÖ · SVEDIO

SEPTEMBRO 2001

Enkonduko

Jam multaj libroj estis verkitaj pri la temoj: Juna kemiisto, Juna fizikisto, Juna matematikisto — por mencii nur kelkajn pli gravajn. Eĉ pli troviĝas el tiuj, kiuj la junan homon enkondukas en certan hobion: fotadon, radioteknikon, mikroskopadon, ŝakludon kaj similajn aferojn. Ankaŭ mi lernis el tiuj libroj. Kun speciala emocio mi rememoras tiaspecan popularsciencan libron Kemio — inter ŝerco kaj seriozo de iu serba aŭtoro Živko Kostić, kiu plenigis miajn frenezetajn lerneajn jarojn per la feliĉo de infana "esplorado". Kiel fumis, sparkis kaj krakis en nia malnova kamparana domo, kiel kreskis la amaso de la laboratoriaj vitraĵoj, kunportitaj el ĉiuj eblaj fontoj. Sed kiam mi enmordis en la unuajn pomojn de la filozofia arbo, sengrave kiel malmature verdaj ili tiam (verŝajne ankaŭ nuntempe) estis, mi sentis bezonon ie trovi aŭ eĉ mem verki iaspecan "Juna filozofo", iaspecan "Filozofio inter ŝerco kaj seriozo". Mi vidis min en la aĝo de 14, 15 jaroj, kiel mi "manĝus" tian libron, se ĝi ekzistus; kiom da ĉirkaŭvojoj sur mia vojo mi povus ŝpari, se iu ankaŭ por tiuspeca scivolo verkus ion simplan, preskaŭ babilan, rekte kaj honeste, kiel oni devas paroli al adoleskulo. Sed, tiam tiaj libroj ne ekzistis. Estis, kompreneble, lernolibroj por la gimnazia objekto "filozofio". Sed tie oni povis legi, kiu kiam kion asertis aŭ skribis, al kiu scienca tirkesto tio apartenas — sed filozofii mem tiuj lernolibroj ne instruis. Estis la samo, kvazaŭ tiu mia Kos-

tiĉ sur ĉiuj 200 paĝoj de sia libro menciis nur la nomojn de kemiistoj kaj iliajn naskiĝdatojn, sed li ne priskribus la procedon, kiamaniere oni mem faras pulvon (kredu, ke mi unue kontrolis tion ...), kiamaniere oni aranĝas piroteknikaĵon, kiamaniere oni povas tagon antaŭ la konfirmacio per certa acido detrui sian veston ... Se mi troviĝas meze de la dezerto, se mi estas morte soifa, bonvolu ne nepre informi min, kiam vivis la poeto Firduzio kaj kion li versis pri trinkaĵoj kaj en kia versformo li tion faris. Diru prefere, kie mi povas trinki freŝan akvon, poste ni povos diskuti pri metriko.

Tiel tuj dekomence, kiam mi sentis bezonon de tia libro, mi pensis, ke en ĝi ne estu multaj nomoj kaj naskiĝdatoj, sed tiu afero mem, kiun la koncernaj nomoj plenumis. Se temas pri filozofio, do tia libro instruu almenaŭ iomete mem filozofii, aŭ oni tute ne bezonas ĝin.

Estas ankoraŭ unu dubo. Nia eduko imagigis, ke la filozofo estas oldulo, kiu ne plu havas energion kaj sanon por praktiki stultaĵojn, do al li ne restas alia ŝanco ol filozofii. Kaj tute nekonvene, eĉ vere ridinde ŝajnas al ni la imago, ke filozofiumu la knabo, kiu cetere tiras kajtojn kaj batalas kun la tekniko ĝustatempe purigi sian nazon; ke filozofiumu knabino, kiu ĵus komencis fuĝi antaŭ la etaj barbaroj, nomitaj knaboj, kaj kiu kaŝe malfermas ŝminkujon de sia patrino ...

Kaj tamen: se mi rememoras, kiom ni infanoj interparolis ĝuste pri tiaj aferoj, kiajn traktas la filozofio, mi povas kun certeco diri, ke la problemo ne estas ĉe vi, juna fraŭlo, juna fraŭlino, kiu ĝuste en via aĝo montras tioman intereson pri ĉio ebla kaj neebla. La problemo estas ĉe tiuj falsaj profetoj kaj memvokitaj guroj de la filozofio, kiuj timas, ke ilia scienco perdus respekton kaj renomon, se ili prezentus ĝin en

komprenebla kaj interesa lingvaĵo, proksima al tiu, kiun parolas vi. Ke tiu ĉi timo ne havas bazon kaj montras malforton en propra profesio, demonstros la fakto, ke tiuj samaj fakuloj, sidante antaŭ siaj komputiloj, devas komponi siajn programojn uzante plej simplajn fiksaĵajn frazojn, dum la baza komputila lingvo konas nur du "esprimojn": "nulo" kaj "unu". Tiu humiliĝo antaŭ la maŝino ŝajnas al ili eĉ io eksterordinare eminenta, dum traduki sian filozofion en la lingvon, kiun parolas normala homo kaj junulo, ŝajnas al ili vera humiliĝo kaj malriĉigo de la substanco.

Mi ne kuraĝas promesi, ke la spirito de tiu ĉi teksto tiun eraran sintenon esence superos. Tamen, ĉar la agro ne estas perfekte kultivita, mi riskas provi ion entrepreni eĉ per mia nefaka mano. Pli bone tiel ol lasi la aferon nefarita.

Nu do, bonvolu pretigi dormsakojn, manĝilaron por tendumaj cirkonstancoj; la tendojn prizorgos ni — kaj ek survojen!

La aŭtoro

I.

*Kion oni prenu
survoje al la maro; kio
okazas, se oni ne
scias barakti pri maŝinoleo;
kiamaniere freneziĝas
la vortoj ...*

Salo, ĉu estas?"

"Jes, salo estas!"

"Pulvoro por lavi vazojn, ĉu estas?"

"Estas du, kruda kaj fajna."

"Manĝilaro, ĉu?"

"Estas sesopo da forkoj, da kuleroj, ... da ĉio."

"Libroj, ĉu libroj troviĝas?"

"Libroj ne troviĝas!"

"Pasintjare, kiam ni tendumis mineralogie, ni transportis preskaŭ la tutan nacian bibliotekon," rimarkis Adela.

"Antaŭpasintjare, kiam ni estis historiistoj kaj arkeologoj, ni havis apartan kajeron, en kiu estis skribite, kie troviĝas tiu aŭ alia libro," sciis diri Georgo.

Sinjorino Majda turnis sin de la pakaĵoj, kiujn ŝi ligis, kiel Ali Baba siajn 40 rabistojn:

"Verdire, Andreo, kion ni reprezentos ĉijare? Jam dum kvin jaroj ni veturas kune feritendumi. Ĉu ne ekmankos la sciencoj, ja ni jam estis matematikistoj, fizikistoj, historiistoj kaj kemiistoj?"

”Divenu mem! Se ni vojaĝas sen libroj, tio havas certan signifon!” aŭdiĝis elsub la motorkovrilo de la buseto.

”Ĉu ni estos muzikistoj?” — el malantaŭ la skatolo por ilaro, kiun prizorgis Duŝan.

”Do ni kunprenus instrumentojn — aŭ almenaŭ libron de ia Bernstein ...” — denove elsub la motorkovrilo.

Tanja fariĝis senpacienca:

”Nu, diru finfine, ni mem neniam divenos!”

La kapoto klakfermiĝis kaj Andreo, profesoro pri iu bela, tre bela lingvo kaj ĝia literaturo, ridetante respondis:

”Bone, mi helpos. Ni kunprenos kelkajn halterojn por trejnado, ŝnuron kaj kronometron ...”

”Ĉu ni atletos?” — aŭdiĝis de la ilara skatolo.

”Ne, ni estos io tute alia. Ĉijare ni estos filozofoj!”

Ĉiuj interŝanĝis suspektajn rigardojn. Kaj Adela laŭte protestis:

”Se mi havas ian imagon, ĝuste filozofoj frenezas je libroj — kaj ni tute sen tiuj ĉi kaj kun instrumentoj por atletoj ... tion mi simple ne komprenas.”

SinJORINO Majda aliancis kun Adela:

”Andreo, ŝajnas al mi, ke vi tiras nin iomete per niaj nazoj, ĉu? Filozofoj sen libroj. Filozofoj kun halteroj ...”

”Taleso, Pitagoro kaj Heraklito ne posedis bibliotekojn, probable apenaŭ manskriborulon — kaj ili estas tri majestaj kolonoj de la filozofio. Tiu, kiu volas filozofii, devas almenaŭ por iomete demeti siajn librojn ...”

”Kio pri la halteroj?” scivolis Tanja.

”Neniuj prijuĝoj de nia racio estas tiom sub la influo de la korpa parto ol la spekulaciaj, la filozofiaj. Vidu, oni povas esti ĝismorte trista kaj korpe kaduka, sed oni tamen povas kon-

tentige fari kemian analizon de donita ingredienco. Sed, se la korpa malforto kaj malbona farto turmentas filozofon, speciale tiun, kiu nur komencis tiun aferon, kiu ne estas jam trejnita je ĉiuj homaj malfortoj kaj amplitudoj, tiu vidos la mondon en tute aliaj koloroj, ol li ĝin vidus sana kaj bonfarta. Jam Danto diris: 'Ne atingas longan vojon la spirito, se turmentas ĝin la korpo neuzebla.' Tial ni pli ol librojn bezonos gimnastikajn instrumentojn; por ke ni pensu kaj parolu el la sano kaj ne el malsano. Sekve ankaŭ niaj pensoj estos sanaj kaj konvinkaj."

Nun ĉiuj sciis pri sia ĉijara rolo. Tamen ili ĝenerale ne komprenis, kion signifas la vorto filozofio. Tamen ĝi impone sonis — kaj tio pormomente sufiĉis.

Du tendoj, kesto kun diversaj ŝraubŝlosiloj kaj ŝraŭbiloj, sparkiloj kaj similaj objektoj, gimnastikaj iloj, kartona skatolo kun nutraĵoj kaj alia kun la kaseroloj kaj alkohola kuirilo, ret-pilko kaj pilkbatiloj por volano; ĉio tio troviĝis enpakita en la veturilo. Profesoro Andreo turnis la ŝlosilon kaj Labako baldaŭ fariĝis antaŭurbo — kaj iom pli poste nur ankoraŭ kelkaj kamenpintoj malproksimhorizonte.

Sur la rapidvetura ŝoseo la veturilo trankviliĝis kaj glate glitis, kvazaŭ oni flosus enboate. Kvankam tiu ĉi luita furgonelo jam iomete similis al eta aŭtobuso, super la fenestra vitro tamen ne pendis surskribo, ke interparolo kun la ŝoforo estus severe malpermesata. Duŝan ne trovis paciencon kaj demandis:

"Sinjoro profesoro, kion efektive faras filozofo?"

Ankaŭ Adela ne povis silenti:

"Jes, verdire, kion pritraktas filozofio?"

”Andreo direktis rigardon al la spegulo, ĉu iu lin freneze preterveturas, poste li diris:

”Filozofoj antaŭ ĉio amas ...”

”Ho, belege, do ili estas erotomanoj, se mi vin bone komprenas?” ŝercis Adela.

”Iusence jes,” trankvile respondis la profesoro, kvazaŭ li ne sentus pikon de la ŝerca sago. Estas nur certa diferenco ...”

”Do kiu?” malpacienkis Georgo.

”La erotika amo adresiĝas al unuelaj personoj kaj nur al ili. La karitata amo adresiĝas al ĉiuj homoj, negrave ĉu amikoj aŭ malamikoj, ĉu proksimaj aŭ malproksimaj. La filozofia amo adresiĝas al saĝo, al la vero en plej universala senco. Kaj la greka vorto philosophia signifas laŭvorte tion: amo al saĝo.”

”La filozofio do ne estas scienco?” diris sinjorino Majda.

”Ho, tamen, kara. Estas granda miskompreno opinii, ke iu ajn scienco povas ekzisti kaj daŭre doni fruktojn sen amo. Nur observu tiujn kvazaŭ ebriajn sciencistojn en iliaj kabinetoj kaj laboratorioj, kun kioma amo ili sekvas siajn procedojn. La granduloj, kiuj vere ion originan kontribuis al ajna scienco, ĉiam amis la veron, kiun ili serĉis. La diferenco estas nur, ke la aliaj sciencoj amas specifan veron, dum la filozofio amas la veron ĝenerale, en plej abstrakta senco.”

”Kial la amo tiom destine ligiĝas kun la sciencoj kaj eĉ speciale kun la filozofio, kiel vi asertas?” demandis Georgo.

”Ĉar la amo kaj la vero mem estas geamantoj, gigantaj geamantoj. Diru, ĉu vi povas al via patrino, kiun vi certe amas, tiel facilanime mensogi, kiel vi mensogas al fremda homo, kiun vi eĉ timas?”

”Certe ne.”

”Jen, vi vidas. La amo plej bone prosperas en la etoso de

ĉiuspeca vero. Kaj inverse, la veron oni plej rekte povas atingi en la etoso de vera amo. Tial la geniaj Grekoj ne starigis la plej gravan sciencon, nome la filozofion, sur la fundamenton de la racio — tiam ili nomus la filozofion eble sofologio, sed sur la fundamenton de la amo. Modernaj instruistoj pri filozofio tion emas ignori, bedaŭrinde ...”

”Kion do vere pritraktas la filozofio?” insistis Adela.

”La filozofio traserĉas tri aferojn. Unue sin mem. Kiam ĝi pensas pri si, ĝi provas malkovri, kiaj estas la ĝustaj manieroj pensi kaj kiel oni povas identigi la malĝustajn. Kaj ĝi demandas sin, ĉu oni efektive povas esplori la du aliajn kampojn de la filozofio.”

”Kaj ili estas ...” fariĝis Tanja scivolema.

”Simple du aferoj: ontologio, tio, kio estas, okazas — kaj due normiko, tio, kio estu, okazu. La unuan temon — tion, kion pensas la filozofio pri si mem — kovras la logiko kaj la epistemologio (foje nomata ankaŭ gnoseologio aŭ noetiko). La logiko estas scienco pri la leĝoj de pensado, pri ĝustaj kaj malĝustaj frazoj kaj pri la maniero tiri konkludojn. La epistemologio estas la scienco, same pri la pensado, sed sub pli principa aspekto: ĉu ekzemple la homa racio povas ekkoni la veron, ĉu ĝi povas kompreni la esencon de la fenomenoj, ĉu absoluta vero ekzistas ... Sed la filozofio pensas pri si mem ankaŭ sub la aspekto de sia historio. La historio de la filozofio komparas, ĉu ekzistas evoluo, ĉu ekzistas progreso en la filozofio.”

La profesoro denove ĵetis rigardon al la spegulo super la fronta fenestrovitro kaj demandis returnen en la aŭto:

”Ĉu mi tedas?”

”Ne, ne ...”

”Nu, sed nun mi verŝajne tion ne povos eviti. Atentu, ke iu ne endormiĝu! Mi diris, ke tion, kio estas, studas la ontologio, la scienco pri la esto, pri la fundamentoj de la esto. La ontologio ekzemple demandas, ĉu ĉio, kio ekzistas, estas unu nura afero aŭ ĝi estas komponita el diversaj eroj; ĉu tio, kio ekzistas, estas finita, limigita, aŭ infinita; ĉu nepra aŭ hazarda; ĉu memsufiĉa aŭ dependa ... La ontologio ĉerpas siajn sci-ojn el la kosmologio, do, iaspeca abstrakta fiziko, kaj el metafiziko, kiu ne estas scienco en kutima senco, ĝi prefere estas spekulacio pri la sense kaj instrumente neregistrebla fono de la ekzisto. La metafiziko estas iaspeca tunelo inter la praktika kaj filozofia pensmanieroj. La fiziko informas nin ekzemple, kio faras sonon kiel fizikan fenomenon. Sed la metafiziko diras al ni, ke ni kun certeco scias nur pri nia aŭdo de la sono, nia sento de ĝi, sed ke ni ne havas ideon pri ĝia lasta fonto. Sed pri tiuj ĉi aferoj ni amuziĝos pli poste. Nun mi aldonu nur tion, ke tio estas klasika, tradicia sistemigo de la filozofio, pri kiu kelkaj nuntempaj instruistoj probable kun kompato ridetus, kvankam ankaŭ modernaj sistemigoj ne povas ĵeti pli da lumo al la eternaj problemoj de filozofia pensado.”

”Kio pri la tria parto de la filozofio?” fidelis al la temo Adela.

”La tria objekto de la filozofio: tio, kio estu, kio okazu, klarigas la mondon kaj la homan agadon en tiu ĉi mondo konkorde al la homa konscienco aŭ subkonscia tendenco. Tiu ĉi parto, nomata normiko, konsistas el etiko, ekonomiko, politiko kaj estetiko. La etiko instruas pri moralo, pri distingado inter bono kaj malbono, pri la homaj devoj. La ekonomiko instruas pri la aranĝo kaj mastrumado de la homa senpera

medio: familio, najbareco, laborejo, komunumo. La politiko instruas uzi etikajn kaj ekonomiajn principojn en grandaj komunumoj kaj socioj, precipe en la ŝtato kaj inter la ŝtatoj. La estetiko instruas pri la principoj kaj leĝoj de la belo. Laŭ la instruo de la klasika filozofio ĉio, kion la homo produktas, devas rilati al tri bazaj principoj: la vero, la bono kaj la belo. Tial ni retrovas tiujn principojn en la norma parto de la filozofio kiel etikon, ekonomikon-politikon kaj estetikon. Por klasikuloj nur tiuj homaj produktoj valoris kiel kvalitaj, kiuj kongruis kun la nomitaj tri principoj de la vero, bono kaj belo.”

Georgo petole ridetis, kvazaŭ li volus ion diri. Sinjorino Majda rimarkis lian lipkuntiron kaj invitis lin diri sian aferon.

”Unuafoje mi aŭdas, ke la politiko povus esti parto de la filozofio. Nia patro diras, pardonu, ke la politiko estas granda putino ... kaj vi metis ĝin en la societon de tiel honorindaj aferoj ...”

”Kaj nun vi volas scii, kiu el ni pravas, ĉu?”

Majda rigardvipis sian edzon dirante:

”Se oni nur dum kelkaj minutoj aŭskultas politikajn raportojn aŭ iomete trafolumas gazeton, oni baldaŭ akiras klaran evidon, ke la patro de nia Georgo komplete pravas. Ankaŭ mi ne povas kompreni, kiamaniere vi povis tiom malpuran aferon, kiel politikon, meti en la aron de viaj -logioj ...?”

Profesoro Andreo malfermis la fenestron por pagi ŝoseimposton — poste li respondis la malfacilan konteston:

”Mi diris, ke la filozofio esploras krom sin mem ankaŭ tion, kio fundamente estas kaj tion, kio fundamente estu. Tio, pri kio vi du legas en gazetaro aŭ aŭskultas en radio, kien tio apartenas? Ĉu al tio, kio estas, ĉu al tio, kio estu?”

”Temas pri aferoj, kiuj estas! Ja ĉio tio estas okazaĵoj kaj faktoj, kiuj vere ekzistas. Se ili ne jam ekzistus, se nur ekzistus deziro, ke ili ekzistu, ni ne perdus nervojn pro ili,” respondis Georgo.

”Sed la politikon ni metis, se mi bone rememoras, en la sekcion kun tiuj aferoj, pri kiuj ni nur deziras, ke ili estu, okazu, ĉu?”

”Jes, ĝuste tiel, sinjoro profesoro!”

”En gazetartikoloj do troviĝas nur tiom da politiko, kiom temas pri sugestoj kaj planoj ion realigi en la senco de la politikaj principoj, kiom temas pri aferoj, kiuj estu kaj okazu, realiĝu, ja cetere ili ne jam ekzistas. Ĉio alia, kio ankaŭ portas la nomon ’politiko’, efektive estas nur sociaj faktoj, apartenantaj al la kategorio de statistiko aŭ eĉ deliktaro kaj krimaferoj. Kiel la sociaj aferoj efektive kuras, tion ne esploras la politiko, sed la subscienco de la antropologio (scienco pri la homo), la sociologio (scienco pri la socio).”

Sur la panelo malantaŭ de stirrado komencis pulsi ruĝa lampeto. La oleo. La profesoro haltigis la veturilon kaj eliris, preskaŭ salte. Post minuto jam ĉio retroviĝis en bona ordo. Ili veturis antaŭen. Sed post kelkaj kilometroj en la kabino komencis terure fetori. Io inter duonbruligitaj ĉifonoj kaj tio, kion oni en salonoj ne faras ... Denove turno dekstren. Levo de la kapoto, rigardĵeto en la oletempeston. Kiam profesoro antaŭe alverŝis oleon, li forgesis fermi la ŝtopilon per aparta risorto. Sinjorino Majda ekĝemis:

”La limoj de la filozofio!” — Tiel ili per la tria, nun bone fermita oleo, kontinuigis la vojon. ”Kien ni atribuu tian aferon, tian ignoradon de la oleoŝtopilo?” incitis sinjorino Majda.

”Ni povus malfermi novan, kvaran sekcion de la filozofio,”

ŝercis la profesoro, kiam li tiel antaŭ ĉiuj perdis sian ŝoforan kaj aŭtomekanikan renomon. Kaj tiu ĉi renomo faras duonon de ĉiu viro ... ”La kvara sekcio: aferoj, kiuj ne okazu ...” li provis savi, kion li povis.

Dum ĉiuj en siaj pensoj provis plenigi tiun skatolon de la kvara sekcio: profesoro Andreo, lia edzino Majda, Adela, Georgo, Tanja kaj Duŝan, la aŭtomobilo jam meandris inter la karstaj pinarboj. Post plenaj du horoj profesoro Andreo jam povos ĝojkrii, kiel feliĉaj ekĝojis Helenoj ĉe Ksenofono, kiam ili remarŝis el Persio: thalatta — la maro! Ankoraŭ dum du horoj rajtas paroli la filozofio — poste parolos la fiziko; pli precize: la statiko de la tendoj, la kemio de kuirado kaj fiziologio de la dormripozado ...

Tiel oni trastudas aron da sciencoj ĉiutage, sen tion rimarki, pensis en si Duŝan.

Georgo jam iel adiaŭis siajn embarasojn pri la politiko kaj starigis novan dilemon:

”Ĉio bone, se ni ĉijare studos la filozofion. Sed, ĉu mi povas kalkuli per tio, ke ni ne ludos per iaj mezepokaj fabeloj?”

”Mi ne komprenas tute vian problemon,” aŭdiĝis de la stirilo.

”Nu bone, jen tiu metafiziko ... Mi ne scias verdire, kion ni entreprenu per ĝi. Jen rakedoj, komputiloj — kaj ĉi tie ia metafiziko ... Mi volas rimarki, ke ni probable estu iom pli sciencaj. En la lernejo mi ne aŭdis bonajn komentojn pri tiu metafiziko. Tio verŝajne ligiĝas kun religio. Sed nia afero estas ekkoni kaj scii — kaj ne kredi ...”

”Vi do pledas, se temas pri la sciencoco, kontraŭ ajna kredo, ĉu?”

”Kompreneble. Aŭ mi scias, aŭ mi ne scias. Kredas mi ne-
nion.”

”Ni prenu la signifon de nia interparolo, la signifon de
unuopaj vortoj. Ĉu sufiĉas, ke ni nur scias ilian signifon?”

”Certe sufiĉas!”

”Ni faru eksperimenton. Ni klarigu la frazon: Filozofio es-
tas serĉado de la vero.”

Adela enmiksiĝis:

”Tiu ĉi frazo estas ja kristale klara. Ni scias, kion signifas
la vorto filozofio, ni scias, kio estas serĉado, ni scias, kio es-
tas la vero.”

”Vi forgesis unu vorton ...”

”Tiun etan ’estas’, ĉu?”

”Tiu eta ’estas’ estas tiel enigma afero, ke jarcentoj da filo-
zofia evoluo ne lumigis la problemon ĝis kontentigo.”

”Sekve la filozofio ne povas esti tre serioza afero, se ĝi ka-
pricumus pri tia ’estas’!”

”Mi neniam asertis, ke la filozofio estas serioza afero. Se-
rioza estas domhelpistino, kiam ŝi komutas elektran lumon
kaj ne zorgas pri tio, kio okazas inter la turbinoj kaj peceto de
volframa fadeno en la vitra ampolo. Ŝi estas serioza kaj ne
interesiĝas pri tiel infanecaj demandoj. La serioza Eskimo
interesiĝas, ĉu oni povas bone glitveturi per hundsledo sur la
neĝa surfaco. Li ne interesiĝas multe pri la majesta ekspozi-
cio de kristaletoj, konstateblaj nur sub lupeo. La filozofio es-
tas en sia radiko neserioza scienco. Enkadre de ĝi plenkres-
kaj homoj demandas pri tiaj aferoj, kiajn cetere kuraĝas pri-
demandi nur trijaraj infanoj. Filozofo deziras ellerni ĉiun vor-
ton ankoraŭfoje, tute denove. Tial la ordinaraj homoj lin pri-
ridas. Kial vi demandas pri la aferoj, kiujn scias ĉiu infano ...”

La profesoro dum kelkaj momentoj silentis.

”Adela, vi verŝajne scias, ke la homa korpo en certa tempo anstataŭas ĉiujn siajn ĉelojn. Se ĝi tion ne povus fari, ĝi kadukiĝus kaj mortus jam en kelkaj jaroj. Same okazas en nia menso. Ĉiu nocio en ĝi devus multfoje formorti kaj esti anstataŭita per nova, pli konvena, por ke nia pensado restu freŝa kaj sana. Ni prenu nun tiun nian ’estas’. Kiamaniere vi povas scii, ke ĝi signifas al infano, al vi, al mi kaj al renoma filozofo la saman aferon?”

”Oni devas ĝin klarigi.”

”Helpe de kio oni klarigas vortojn?”

”Helpe de aliaj vortoj.”

”Jes, sed ni dubas ankaŭ pri la ĝusta signifo de tiuj aliaj vortoj. Tiamaniere ni vokus al helpo pli kaj pli da vortoj, kiuj mem bezonus klarigon. Vi povas supozi, kiel la entrepreno finiĝus ...”

”Do oni tute ne povas racie interparoli!” konstatis Duŝan.

”Kaj tamen ni interparolas. Kio do?”

”Eble oni ne estu pri la signifo de la vortoj tiel science rigora ...” rimarkis Tanja.

”Ĝuste tiel estas. Oni povas interparoli nur, se oni al unuopaj vortoj kaj frazoj donas ioman toleron — sed antaŭ ĉio ni devas iel kredi, ke malantaŭ de tiuj vortoj troviĝas ia signifo. Tio estas la unua kondiĉo. La dua kondiĉo estas, ke en nia vortaro efektive troviĝu kelke da vortoj, kies signifo estas unuavide evidenta kaj ne bezonas klarigon. Unu el tiuj vortoj ekzemple estas ’mi’. Tion oni ne devas klarigi, kvankam la vorto en sia profunda signifo ne estas tiel simpla. Same ni ne devas klarigi vortojn, kiuj diras pri niaj internaj spertoj. Al tiuj vortoj oni simple kredas, ja oni ne povas ilin racie subargu-

menti, ĉar ili mem estas argumentoj por klarigi aliajn vortojn. Simple: ekzistas vortoj, kiujn oni ne klarigas, pri kies senco oni kredas.”

Kiel plaŭdis ...

Kia pleno da veloj kaj mevaj manovroj sub la blua ĉielo ...

La maro ...

Duŝan zorgis pri la starigo de tendoj. Ke la ŝnuroj havu ĝustan tension, ke la kanalo estu bone fosita, ke la muntbastonoj estu bone muntitaj.

Georgo interesiĝis:

”Ĉu ni aranĝos garddeĵoradon?”

La profesoro pripensis kaj poste hake diris:

”Ne!”

”Ĉu ni almenaŭ metos seruron sur la zipon?” demandis Adela.

”La filozofio kaj la seruro ne kongruas bone. Filozofoj ĉiam lernis demunti serurojn — kaj certaj seruristoj* de ĉiam persekutas filozofion. Ni tendumos aperte. Ĉiu povas veni kaj rigardi!”

* Aludo pri la jugoslavia diktatoro Josip Broz-Tito, kiu en sia juneco lernis la metion de seruristo. Dum sia longjara absolutisma regado (1945 — 1981) li enprizonigis kaj malebligis milojn da intelektuloj en ĉiuj jugoslaviaj respublikoj. Li ne persekutis nur religiajn homojn, sed ankaŭ socialdemokratojn kaj eĉ komunistojn, kiuj ne sekvis precize lian kaprican politikan linion, kiu ofte subite ŝanĝiĝis, kiel precipe en la jaro 1948, kiam li eniris en grandan konflikton kun Stalin. Se oni unu tagon antaŭ la publika eksplodo de tiu interkamarada konflikto faris kritikan rimarkon pri Stalin, oni riskis karceron aŭ koncentrejon laŭ la nazia aŭ gulaga modelo; se oni unu tagon post la publikigo de la ”Rezolucio de Kominformo” ne atakis Stalinon, oni riskis la samon ...

II.

*Kiamaniere oni fidu
al la boato;
ankaŭ la pruvoj flosas;
ĉu ni scias plu multipliki ...?*

Se oni ne havas sperton, oni eĉ spiritusan kuirilon ne povas bruligi simple kaj tuj. Post la sesa alumeto Tanja sukcesis inviti bluetan flamon, ke ĝi ĉirkaŭtuŝu la fundon de la tekruĉo. Akvo, pri kiu oni ekkonscias hejme nur dum aŭtolavado, fariĝas inter tiuj ĉi rokoj per sia gluglado ia malofta elemento, multvalora kaj sentiva.

Adela kaj Georgo kunmetis ŝtonplatojn, tiel ke ili fariĝu tablo kaj seĝaro; Tanja kaj Duŝan ordigis rekvizitojn post la matena gimnastiko; sinjorino Majda kaj sinjoro Andreo tranĉis kaj aranĝis panon.

”Mi preferas esti sen ...” volis Georgo entrepreni sian manmanĝon simple tiel starante.

”Ĉu vi ne partoprenas filozofian kurson?” ekmiris profesoro.

”Kiun rilaton havas la filozofio kun kuirejo?”

”Pli malpli la filozofio hejmas en la kuirejo. Rigardu, Georgo, la mondo plej intime penetras en nin, dum ni konsumas nutraĵon. Tiam la kosmo lokiĝas en ni. Temas verdire pri majesta momento: konsumi ĉiujn tiujn atompezojn, tiujn valentojn, tiun ĉi karban poligamion, kompletan termodinamikon, elektron kaj ondmekanikon, fizikon de la atomoj kaj iliaj partikloj ... Certe, oni povas manĝi ankaŭ tiel, ke oni malĉeeste

ĵetas ion ajn en sian buŝon, ke oni traktas nutraĵpecojn kiel nuran hejtmaterialon. Ke oni fariĝas hejtisto en la lokomotivo de propra korpo, baraktanta per sia ŝovelilo. Sed oni povas sin disponigi al la invito en la plej eminentan eksperimenton, kiu radikale postlasas ĉiujn mondfamajn laboratoriojn: eksperimenton, en kiu la tritiko kaj la akvo fariĝas materio, kiu povas ekmiri pri si mem, kiu povas ekpensi ...”

Ankaŭ Georgo elektis por si sidan pozicion. La makzeloj de ili ĉiuj komencis moviĝi malpli haste. Ili iel komprenis, ke iliaj dentoj estas la plej gravaj mueliloj en la mondo; ke ili dum ĉiu maĉmovo decidas ion kortuŝe gravan. Ni diru: mueli la panon en verkon kiel Fratoj Karamazov, Sonetkrono, Nabuko, Kvantumteorio, ĝenerala deklaro pri la homaj rajtoj ...

”En tia maĉmovo iusence devas esti resumita ĉio, kion la kosmo efektive scipovas!” ekmiris sinjorino Majda.

”Ĉu temas do pri la aldatmosfere kunpremita enhavo de siaspecaj ’Kompletaj verkoj’ de la Naturo ...” ekmeditis Duŝan.

”Oni povus konkludi,” ekbrilis ankaŭ en la kapo de Adela, ”ke tio, kio okazas en la dimensioj de la galaksioj, okazas ankaŭ etdimensie inter la supra kaj malsupra makzeloj?”

Profesoro enprofundiĝis.

”Estas vere: koncentriĝo de la plasmato en sunojn; eksplodoj kaj radiadoj, naskiĝoj de la planedoj kaj ilia malvarmiĝado — ŝajnas, ke ĉio tio tendencas ie fine de la procezoj, fariĝi spiko de tritiko kaj glaso da akvo. Ĉio por tiu ĉi aventuro inter la dentoj kaj digesta aparato, kie la materio fariĝas kapabla uzi plumon, uzi violonon ...”

”Sed,” diris subite la profesoro, ”ĉu vi havas imagon, kion ni ĵus faris?”

”Ni pensis dum la matenmanĝo,” per ia dommastreca ri-proĉo diris Tanja.

”Jes, sed ni pensis laŭ la maniero de filozoj.”

”Ĉu vi intencas diri, ke ni verdire filozofis?” plaĉis la konstato al Adela.

”Jes, ni filozofis, kiel ni plej bone povis!”

* * *

Georgo jam dum tuta jarcento traktis pumpilon, sed la boato restis neŝvela. Se ne troviĝus tiu germana familio en najbareco, la maro estus sekiĝinta antaŭ ol Georgo estus pufingita la boaton. La bonkora germana turisto kunprenis etan ŝtalo-botelon, premis sur valvon — kaj la boato ekŝvelis de la aerpreno.

”Gut so?” (Ĉu bone tiel?)

”Gut, danke sehr!” (Dankon, vere bone!)

Post tio ĉiuj eniris tiun aeritan gumon kaj profesoro kiel elpruvita venecia galjoto ekmovis remilojn. Je cent metroj for de la bordo la virina zorgemo demandis en sinjorino Majda:

”Ĉu oni povas fidi, ke tiu ĉi gumo nin tenos surakve?”

La profesoro ekridis.

”Se ne atakos nin la spadfiŝo, ni povas navigi transmaren ĝis Bari!”

”Do ni ne havas motivon por timi?” ne plene jam fidis la eterna ineco.

”Kiel maristoj en tiu ĉi kvieta vetero ni ne havas motivon panikiĝi. Sed kiel filozoj ni iusence devas tremi pro la angoro.”

”Ne timigu nin, sinjoro profesoro! Jam sen tio la boato estas sufiĉe nestabila ...” petis Tanja.

”Tiu, kiu timas, devus esti soldato aŭ policisto; la filozofo povas esti nur tiu, kiu atingas ekstreman kuraĝon!”

”Tiu angoro ... kial ni sentu angoron?” demandis Duŝan.

”Mi volis diri jenon: kiel ekskursanto mi efektive povas fidi, ke la boato ne dronos, se en ĝi troviĝas aerpremo. Sed kiel filozofo mi tiun certecon ne povas havi.”

”Ĉu la fiziko ne validas ankaŭ por la filozofo?” rebatis Adela.

”Jes, ĝi validas, sed sub unu kondiĉo.”

”Do ...”

”Mi devas fidi je miaj sensoj; mi devas kredi, ke la mondo ĉirkaŭ mi vere ekzistas kaj obeas certajn leĝojn.”

”Se mi bone memoras la lecionojn en la lernejo, oni sensojn ne fidas, sed science provas ilian kongruon kun realo. Tiu fidado memorigas min tro al sakristiaj aferoj ...” preskaŭ koleriĝis Adela. Georgo alverŝis benzinon:

”Kaj tiu obeado al leĝoj rekte malbonodoras je taberna-klo ...”

”Eble, karaj amikoj,” trankvile rebatis la pilkon la profesoro, ”ni finfine agnoskos, ke ĉio, kio ekzistas, inkluzive nin, venis el ia kosma tabernaklo ... Sed ni lasu tion ĉimomente. Adela, ĉu vi volas diri, kiamaniere ni tute povas scii pri la ekzisto de la ekstera mondo?”

”Nu, ni ĝin vidas, aŭdas, flaras, palpas ...”

”Bone, vi diras, ke ni ĝin vidas. Sed kion ni efektive vidas?”

”Objekton ĉiukaze!”

”Sed inter la supozata objekto kaj nia vidpercepto troviĝas la okuloj, ĉu ne?”

”Ah jes, la bildo verdire falas tra la lenso sur la retinon.”

”Konklude ni ne vidas senpere la objekton, sed la retinon, sur kiu formiĝas certa bildo, ĉu?”

”Verdire ni eĉ la retinon ne vidas rekte, ja ĝi sendas la bildon tra vidnervoj, iel same kiel la kabla televidstacio, en nian cerbon.”

”Do ni verdire vidas nur tiun cerboparton, sur kiu ’pen-triĝas’ la bildo, transportita pere de la vidnervaj ĉeloj, ĉu?”

”Jes, la lasta bildo, kiun ni vere rekte vidas, estas tiu, kiu estiĝas en nia cerbo.”

”Bone, sed tiu makulo ie en nia cerbo por ni daŭre ne estus videbla, se ĝi ne reflektiĝus en io, kio ne estas nura materia cerboparto, kio estas mi mem ... Ni flankenlasu la demandon, kian karakteron havas tiu lasta fenomeno, kiu vere vidas, ĉu temas pri spirito, ĉu pri io alia. Sed grave estas agnoski, ke la lasta bildo devas estiĝi en la egoo mem, kiu konscias kaj sentas, ĉu?”

”Ŝajnas tiel ...”

”Bone, se la lasta bildo troviĝas rekte en mi; en tio, kion mi spertas kiel memon, egoon, sekve mi ĉiam rigardas, aŭskultas, palpas ktp. nur min mem, sed ne ian mondon, kiun tiuj ĉi perceptoj simbolas. Kaj se tiel, kie estas la garantio, ke al tiu bildo en mia memo korespondas ankaŭ reala ekstera mondo? Kie estas la garantio, ke la tuta perceptado de la mondo ne estas nur iu hipnota sonĝo, kiu sorĉas al ni la fabelon pri la mondo, kvazaŭ ĝi vere troviĝus ekster ni? Kiamaniere ni povas scii, ke ni ne sonĝas, sed rigardas realon?”

”Ja ni povas eksperimenti. Ni povas praktiki sciencojn ...”

”Sed tio same povus esti nur parto de nia sonĝfilmo.”

”Do ne ekzistas solvo — ni povas fermi nian laborejon!” malesperiĝis Georgo.

”Jen tio estas mirinda penso, valora je bibliotekoj! La pli-multo de majstroj ne fermas sian laborejon, kvankam ili mal-esperiĝas pri sia metio. Fermi la laborejon signifas en lasta senco — mortigi sin mem.”

”Ho, ni kontinuu serĉi la solvon,” zorgiĝis sinjorino Majda.

”En realo la afero ne estas tiel drasta. Eĉ se ni restas en la eterna maŝo kun la supozo, ke ni nur sonĝas kaj ekster tio troviĝas nenio, ni devas agnoski almenaŭ ion: ke realaj estas almenaŭ ni, kiuj sonĝas. Kaj se tiujn sonĝojn ni ne povas stiri kaj produkti mem (ekzemple per la boato ni ne povas remi en aeron), ni sekve devas agnoski ankoraŭ ion aŭ eĉ iun, kiu tiujn ĉi sonĝojn produktas kaj aranĝas.”

En la kapo de Duŝan ekfulmis:

”Ni diru, tio, kio vere konvinke kaj sen garantiatesto ekzistas, estas mi mem — kaj apud mi iu alia inteligento, kiu min plenigas per miaj sonĝoj, se ĝi eĉ ne produktas ĉirkaŭ mi realon mem ...”

”Ĝuste tiel. Ke tiaj sonĝoj, kiajn ni ĉiuj sonĝas, povas esti produktataj nur de la inteligento, kiu senkompare superas nin kaj tiujn ĉi sonĝojn, jen la unua nepreco, kiun devas agnoski la racio por ne devi fermi sian laborejon, kiel postulis Georgo. Tiel ni atingis la frazon, kiun formulis Kartezio: *Cogito, ergo sum* — mi pensas, do mi estas. El nia vidpunkto: Mi sonĝas, do mi estas. Sed se mi estas, se la sonĝoj estas, sekve ankaŭ tiu estas, kiu sendas al ni niajn supozitajn sonĝojn. Sed se tiu produktisto ekzistas, mi ne bezonas plu teorion pri la sonĝoj, ja al tiu estaĵo mi povas fidi, ke ĝi min ne mistifikas

per fabeloj, sed ke ĝi min starigas sur la firman terenon de realo. Realo, kiu ne kunfalas, en kiu konserviĝas la rilato inter la pezo de la akvo kaj pezo de la boato, kion ni povas utiligi por navigado kaj pro kio ni ne bezonas timi dronon.”

”Mi esperas, ke tiu filozofia angoro do estis nur portempa ...” respiris sinjorino Majda.

”Karteziro dirus: ‘metodika’. La filozofo devas komence de sia entrepreno ĉiam ĉu ekmiri ĉu ekangori. Sed ĉar ni parolis pri kvintesenco de la mondo kaj de la racio, nome, ĉu io ajn efektive ekzistas aŭ ĉio estas nur niaj songoj, la nura ekmiro estas preskaŭ tro milda reago. Ĉe tiaj demandoj nia racio devas ĝisfunde ektemi, la kutima maniero diskuti ĉi tie efikus kiel leĝera kraketado de kokakolao.”

La remiloj egalritme trempiĝis akven, la boato troviĝis pli kaj pli for de la bordo; la plej simpla indiĝena sago povus en momento renversi la pezrilaton kaj dronigi la tutan filozofian tendumularon.

En Adela anoncis sin la strigo el la gimnazia laboratorio, kie diversaj sciencaj prezentaĵoj pendis sur la muroj kaj estis aranĝitaj en la ŝrankoj. Adela ekmemoris la strigon en la gimnazia laborejo:

”Se ni tiel ĉion komprenas, ĉu do oni nenion povas pruvi; ĉu ĉiuj sciencoj estas pura trompo kaj malŝparo de energioj?”

”Antaŭ ol ekpafi per kanonoj favore al la sciencoj kaj iliaj pruvoj — aŭ kontraŭ ili, ni devas diri kelkajn vortojn pri tio, kio estas la scienco kaj kio estas la pruvoj.”

”La scienco estas efektive metodo por akiri scion,” rapide instruis Georgo.

”Sekve jam bebo estas sciencisto, ja ankaŭ ĝi akiras scion,” refutis la aserton de Georgo la profesoro. ”Sed la bebo kompi-

las nur la sciojn pri la faktoj. Pri io. Tiuspecan ekkonon oni nomas la antaŭscienca. La scienca ekkono estas nur tiu, kiu estas sistema kaj tuteca. La sistemeco signifas klasi la traktatan ekkonobjekton en ĝustan fakon inter la aliaj, ĝin difini en rilato kun aliaj. La tuteco signifas, ke oni ne klarigas ĝin nur en ĝia momenta stato, sed ankaŭ per ĝia origino, ĝiaj historio kaj perspektivo. Oni devas ekkoni la historion de la traktata objekto. Sed ĉio ĉi ne baziĝas sur puraj fidindaj informoj — enmiksiĝas multaj senbazaj opinioj kaj ekkonaj eraroj. La vorto 'scienco' tiel ne garantias jam aŭtomate la ĝustan prijuĝon. Ĝi signifas nur regulitan klopodon de homa racio ekkoni la sisteman kaj tutecan veron pri certa objekto respektive fenomeno. La nocio 'scienco' ne rajtas utili kiel timigilo kontraŭ ne sufiĉe instruitaj homoj por devigi ilin akcepti iajn doktrinojn kaj hipotezojn. Tre grava afero en ĉiu scienco estas, ekkonscii pri ĝiaj limoj. Sed nun ek al la nocio 'pruvoj'."

"Supoze vi ne diros, ke eĉ la pruvoj estas io mola kaj truhava, ne tro solida, ĉu?" malpacienis Adela.

"La plimulto pensas, ke la pruvoj estas la lasta aŭtoritato en la aferoj de nia racio."

"Ĉu ĝi tio fakte ne estas? Ĉu troviĝas io, kio povus eĉ pli konvinki ol la pruvoj?" leviĝis Adela.

"Ĉu iu el vi povas pruvi al mi, ke la parto ĉiam estas pli malgranda ol ĝia tuto?" diris ridetante profesoro.

"Tio ja estas evidenta afero!" saltis Georgo.

"Aŭ tion, ke la boato, kiu naĝas super la akvo, samtempe ne dronas, ĉu?"

"Ankaŭ tion ni simple vidas antaŭ ni," grumblis Duŝan.

"Kaj, ni prenu, ke unu plus unu faras du, kiamaniere pruvi?"

”Same temas pri evidento ...”

”Kiel vi mem agnoskis, ekzistas en nia mondo kelkaj ekkonoj, kiujn ni ne bezonas pruvi, ĉar ilia vero vidiĝas el si mem, estas evidenta, kiel vi bone diris. Tiu tipo de baza ekkono nomiĝas evidenteco. Ĉar la evidenteco sufiĉas por si mem, ĝi estas la baza kaj la plej certa formo de ekkono. Sed, aliflanke, la evidenteco validas nur por kelkaj plej simplaj veroj. Ĉiujn aliajn, pli kompleksajn verojn ni devas fari evidentaj, se ni volas ilin per certeco ekkoni.”

”Bone, profesoro,” ribelis Georgo, ”ĉu ne estas la kalkulo, ni diru $238 * 4321 = 1\ 028\ 398$, kiun ni povas algebre pruvi, same certa kiel via kalkulo, ke $1 + 1$ faras 2, kiu ŝajnas evidenta el si mem?”

”Ne. Rigardu! La certeco de via pli ampleksa kalkulo estas nur tre verŝajna, sed ĝi ne povas esti absoluta. Kion ni faras, kiam ni ĝin pruvas? Ni analizas ĝin farante el ĝi aron da malpli kompleksaj kalkuloj, el kiu ĉiu por si estas kvazaŭ evidenta*. Pruvi signifas montri certan fenomenon laŭ ĝiaj elementoj kaj interrilatoj tiel longe, ĝis ni atingas evidentecon. Sed ĉar ni povas samtempe ĉiam percepti nur unu evidentecon, ĉiu pruvo estas iomete malpli certa ol la evidenteco mem. Tiu, kiu per la pruvoj volas renversi aksiomojn, kies bazo estas evidenteco, tiu per bastono atakas artilerion ...”

La suno jam preskaŭ atingis zeniton de sia grimrado, la boato denove eksidis sur la sablon antaŭ ambaŭ tendoj. Sinjorino Majda kaj Tanja transvestiĝis por aĉeteksurso. Por prizorgi tagmanĝajn nutraĵojn. Kion?

”Medicinon por la konstruintoj de piramidoj; tiun obstinan sarkadon kaj sterkadon, akvumadon kaj kolaboraciadon kun la suno ...”

”Cepon!” divenis sinjorino Majda. Do, la cepan supon. Preferatan manĝaĵon de profesoro Andreo.

”Kilogramon da marŝo de Cortezo kontraŭ Kordiljeroj, da malrapida ruĝigado laŭvertikale de la paliso, tie sub la sunokulo ...”

”Tomaton!” divenis jam la duan fojon sinjorino Majda. La tomata salato.

”Manplenon da kliniĝado sub la ĉielo, da vadado en akvo, da humilaj gestoj antaŭ ĉiu tigo aparte ...”

”Rizo!” ŝi divenis la trian fojon.

”Kaj por kompletigo de la miraklo, kiel deserto, por atesti pri granda afero — la plej solecan homon, kiun vi renkontos en la foiro. Kunprenu lin al la tablo, ke li kun ni manĝu kaj nin savu de la malriĉeco de la sataj ...!”

III.

*Pri tio,
kiajn mirindajn aferojn
oni trovas en rubaĵejo
kaj pri tio,
ke bontono pli proksimas
al logiko ol matematiko ...*

Naĝado ne povos okazi. Tion unue mezuris la nazo de

Adela, ŝoviĝinta tra la enranĉo de la tendotolo. La mukeca okulo de Georgo, registrinta tenebrajn bildojn de la ĉielo, povis nur konsenti.

Profesoro Andreo, kvazaŭ li jam antaŭe estus ĉion prime-ditinta, ektamburis fingre sur la aŭtomobila lado kaj decidis:

”Hodiaŭ ni veturos al la rubejo.” Sinjorino Majda lasis la flufadenon de freŝe kuirita kafo en ĝia vertikalo, konvinkita, ke temas pri malforta vira momento, tia en kiaj tiu probleme-ca genro sin helpas per senenhava spritumado. Rubejo jes, rubejo ne, la matenmanĝon oni devas konsumi serioze, ja niaj komplikaj motoroj ekakcelas per lakto kaj terpomo — kaj tiun ĉi fakton oni ne neglektu!

Kiam ekbrilis la kruĉa fundo, la profesoro tamen riskis de-nove mencii sian frumatenan dekretan pri rubejo.

”Konsidere la aron da municipaj rubsiteloj ĉie en tendu-mejo mi ne vidas kialon veturi al la rubejo.” Sinjorino Majda scias la aŭtoritaton de sia edzo ankaŭ ignori.

”Finfine por mi tia ekskurso eĉ estus interesa,” intervenis Duŝan, ”ja foje oni tie trovas ion, kion oni ne povas aĉeti eĉ en plej bona grandvendejo!”

”Tion, kion ni iras serĉi al la rubejo, oni ne povas akiri eĉ en la londona borso!” provokis la profesoro.

Ĉiuj klare vidis: ju pli ili demandos, des malpli ili aŭdos respondon. Helpos nur, se ili saltos en la internon de la aŭtomobilo kaj pacienkos ĝis tiu rubeca institucio ...

Jen do alispeca maro: koralaj krestoj de forĵetitaj forneloj kaj fridujoj; algoj de foruzitaj ĉifonoj; fiŝsvarmoj de sennom-braj objektoj, apotekaĵoj, metalpecoj; planktono de ĉiaspeca malpuraĵo kaj etaj aĵoj sen nomo, kies uzosencon oni ne povas plu diveni ... Kaj sur la ondoj de forĵetaĵoj la glacirompa

ŝipego — buldozo, kiu puŝas la malpuraĵon de la rando centren.

”Se mi pripensas, ke sinsekvaj labortagoj, po 300 fojoj jare, kun la tuta administrado kaj librotenado finfine trovas sian lastan stacion ĉi tie ...” melankolie rezignaciis sinjorino Majda.

Ili haltis kvazaŭ ili troviĝus en tombejo. Ankaŭ la grumblegado de la buldozo pli kaj pli memorigis pri la funebra marŝo. Tanja staris kiel en preĝejo. Duŝan sinkis en siajn dubojn pri la senco de la kreskanta arbo. Adela kolere protestis:

”Mi ne supozis, ke oni bezonas tiom longan ekskursdistancon por vidi tion ĉi!”

”Multaj ĉirkaŭveturas la globon kaj ne rimarkas tian kavon kia tiu ĉi,” rebatis al ŝi profesoro Andreo.

”Ĉu oni nepre rimarku tian ikebanaon de malbela?” insistis Adela.

”Mi opinias, ke ni ellasus ion decidan, se ni pretervidus la rubejon,” kviete kontinuis la profesoro. ”Mi volis montri al vi la escepton en la kosmo. Verdire tio aŭdiĝas strange, sed vi baldaŭ mem komprenos, ke tiuj ĉi abomenaj plomboj en la dentemajlo de la tera surfaco estas fenomenoj, kiuj en la cetera kosmo ne ekzistas.”

”Jes, laŭ abomeneco oni malfacile povus trovi ion similan,” aldonis Georgo.

”Ĝuste pri tio temas. La naturo ne konas eĉ unu solan regioneton, kiu ne estus ĉu bela, ĉu majesta, ĉu mistera, terura aŭ angoriga. La naturo estas tre pitoreska — sed ĝi nenie estas sengusta, banala. Ĝi nenie estas rubejo. En arbaro ĉi-momente formortas miloj da vivaj estaĵoj. Tamen ĉio efikas freŝe, pure, vivoplene. Neniu homa ordiga kaj puriga servo

povas prizorgi la homajn loĝlokojn tiel, kiel estas de la naturo mem prizorgataj la arbaro, la herbejo, la rivero, la maro ... La naturo en ĉiuj siaj statoj kaj formoj estas bela — sed kial la materio el tiu ĉi sama naturo, en tiu ĉi loko estas tiel neebla, tiel banalaspekta, tiel kaduka?”

”Ĝi simple estas forĵetita!” diris Georgo.

”La suno ‘forĵetas’ ĉiusekunde milionojn da tunoj el sia substanco. La vulkanoj elĵetas pli ol ĉiuj ministroj povas elfosi — sed tamen neniu el tiuj ‘ĵetadoj’ postlasas rubejon ...”

”Ŝajnas, ke ĉiu estaĵo rajtas forĵeti, nur ne la homo ...” melankoliis Adela.

”Ĝuste pri tio ĉi mi volis kun vi diskuti. La naturo evidente povas fari kun si mem laŭplaĉajn aferojn, sed tamen ĝi ne povas detrui sian originan belecon. Same kiel kato, ĝi ĉiam falas sur siajn kvar piedojn, senrigarde, de kiu alteco oni ĝin ĵetas. La naturo ĉiam ‘falas bele’, se ĝi estas ĵetata de si mem. Alie, la homa ĵeto povas ĝin lanĉi sur la nivelon de nova beleco, de la arto — aŭ la homo ĝin ĵetas en ion malbelan, banalan, sengustan, kiĉan.”

”Sekve nur la homo povas produkti malbelon?” demandis Duŝan.

”Jes, la abomeno kaj la kiĉo estas ekskluzive homa privilegio.”

”Se tiel, do la homa estaĵo ĉiukaze estas io speciala ...”

”Vi tion diris, Adela ...”

”Do, kion mi finfine diris, ke vi memorigas min pri la aŭtoreco?”

”Ke vi iam ne riproĉos al mi mistikemon ...”

”Mi ne scias, ĉu tiu ĉi amaso de rubaĵoj povus iun ajn memorigi pri io tre mistika?”

”Eĉ pri la fonto de la mistiko mem!” kompletigis sian majeutikan vojon profesoro Andreo.

Ili interŝanĝis rigardojn. Tanja diris:

”Nun ankaŭ mi ne povas tute sekvi. Ĉu vi povus iomete pli detale klarigi, profesoro?”

”Preskaŭ ne endas plu klarigi. Iomete da logiko kaj vi komprenos la aferon mem.”

”Abrakadabra ...” provokis Georgo.

”Eĉ la sorĉista bastono povas foje montri la Nordan Poluson. Sed ni lasu tion. Ni konstatis, ke la naturo estas vere majesta kaj bela ĉie, krom en kelkaj ekzemploj — kiam intervenas la homa mano kaj la homa ilo. Sed: se la homo mem estus nura produkto de la sama naturo kaj nenio ekster tio, do ankaŭ li ne povus damaĝi kaj detrui la belecon de ĝi, ja estus vere strange, se raciaj estaĵoj povus belecon damaĝi, sed senraciaj ne. Se la homo estus nur naturo en la naturo, do ĉiuj liaj agoj estus en plena kongruo kun sia natura medio kaj neniel povus la naturon damaĝi.”

”Ĉu oni do supozu, ke la malbelo havas supernaturan karakteron?” intervenis Adela.

”Supernaturan probable ne, ja la malbelo ne povas esti super la belo, la sengusto ne super la majesto. Sed ĝi certe estas io transnatura, ja ĝi ne povas veni el la naturo mem, se ĝi ekestis nur post homa interveno. La fenomenon de malbelo oni ne povas klarigi al si alimaniere ol tiel, ke en la homo troviĝas certa transnatura agregaĵo, kiu povas kaŭzi en la homo kaj en la naturo konfuzon. Sed ĉar la homo ne kunportas en la naturon nur rubejojn kaj aliajn naturkadukajn fenomenojn, sed ankaŭ sonetojn, artajn bildojn, baletscenaĵojn, muzikajn komponaĵojn, romanojn, poemojn, artajn filmojn kaj teatra-

ĵojn, do aferojn, kiuj en la naturo ne troviĝas kaj tamen estas belaj, kun la naturo analogie belaj, ni rajtas konkludi, ke ambaŭ polusaj kapabloj iel originas el la sama transnatura homa komponaĵo.”

”Ke la trezoraĵoj de la nacia galerio kaj tiu ĉi infera scenejo originas el la sama skatoleto ...” angoriĝis Duŝan.

”Nu jes, ja en la naturo oni ne trovas artproduktojn de Rembrandt kaj ankaŭ ne la forĵetitajn konservujojn, plastaĵojn kaj oleumitajn ĉifonojn. La problemo troviĝas ie aliloke. La naturo estas bela, sen ke ĝi 'lernu la belecon' — ĝi simple ne povas esti malbela, dum la homo ekde tia aranĝo kiel tiu ĉi — ĝis la pintoj de la arthistorio, progresas nur helpe de eksterordinara penado kaj lernado. Se la homo estus centprocente nur natura estaĵo, li ne bezonus lernadon. Evidente estas, ke almenaŭ en kelkaj punktoj li falas en tiun ĉi mondon senscia kaj samtempe scivola. Ĉu ne estas paradokse: en sia korpo la homo 'scias' kontraŭ ĉiu mikroskopa atakanto tuj produkti adekvatajn kontraŭkorpetojn; lia korpo povas prizorgi siajn vundojn mem — sed li pliparte ne scias aranĝi sian korton, siajn bazajn cirkonstancojn ... Tiun ĉi strangan, misteran komponaĵon oni de ĉiam nomas — la animo. La homa animo estas, kiu ekstermas balenojn, venenigas birdojn, persekutas kaj torturas aliajn homojn, kontaminas akvojn kaj aeron. Sed la samtipa animo, jen, klopodas savi elmortantajn vivspecojn, purigas Tamizon, komponas la simfonion 'La naŭa', reĝisoras la filmon 'Krozŝipo Potemkin' ...”

”Bone, ĉio tre bele,” demandis Adela, ”de kie do en la naturo tia beleco kaj majesta konsekvenco? Kial la racia homo proporcie al kvadrata centimetro de sia vera arto samtempe detruas milojn da kvadratkilometroj de sia fekunda tero —

dum la senracia naturo en ĉiu kazo 'scias' resti bela kaj fekunda?"

"Ĝuste pri tio ĉi temas," respondis profesoro Andreo, "por respondi al tiu ĉi demando ni pilgrimis al tiu ĉi aĉa dezerto. Se la naturo sian belecon vere povus produkti kaj konservi mem, ankaŭ la malmatura homa animo tion ne povus en ĝi detruiri. Ĝuste tiu ĉi rubejo pruvas, ke oni povas elĵeti la materion el ĝia natura ordo — kaj tio estas aspekto de la beleco — en malordon, kaoson, malbelon. Sekve proponiĝas supozo, ke atomojn de nia kosmo ŝovelas du ŝoveliloj. Unu, kiu ĝuste ĵetas — kaj dua, tiu de la homo, kiu ĵetas foje ĝuste, foje malĝuste. Se la unua ŝovelilo ĉesus funkcii, tiu neerarebla, la tuta kosmo fariĝus rubejo. Abomena kadukaĵo de senordaj substancoj."

"Sed kiu laboras per tiu unua senerara ŝovelilo?" demandis Georgo.

"Temas pri tiu, kiun ni venis serĉi en tiu ĉi rubejo. La patro de ĉiuj aferoj kaj estaĵoj. La patro de nia sesopo kaj de la tuta homaro. Kaj tiu ĉi abomena scenaĵo lin postulas per sama klareco, kiel lin postulas fascina lazuro de Adriatiko, majesto de Alpoj, melankolio de la rivero Mura ..."

La radoj de ilia aŭtomobilo muelis kaj flankenĵetis la karst-terenajn ŝtonetojn, malvarmeta vento produktis freŝon inter iliaj kapoj. Ili reveturis al sia tendaro, al la bordo. Post certa tempo Adela, el la brusto, plena de la freŝa aero, diris en la direkto de la stiranta profesoro:

"Bonvolu tamen ne atendi, ke ni dimanĉe jam ĉiuj frekventos la sanktan meson kaj partoprenos eŭkaristion — nur pro tiuj ĉi rubaĵoj!"

Kaj Georgo provis ĵeti timigbombeton:

”Ankaŭ mi ne intencas morgaŭ fariĝi mesoservisto, ĉar iu forĵetis uzitajn aŭtogumojn en tiun ĉi kavon ...”

La profesoro silentis kaj kviete manipulis la stirilon. Sinjorino Majda kaŝridetis kun iome da petola apudpenso — ne damaĝas, se junaj uloj iomete lin provokas, tio estas bona ekzameno por vera filozofo ... Sed al Duŝan tio ĉi ne tro plaĉis:

”Neniu vin provas perforte tiri en preĝejon, vi senbaze alarmas. Sed prefere mi aŭdus el viaj buŝoj, kie vi vidas logikajn erarojn de sinjoro profesoro?”

”Ĝuste pri tio temas,” diris iomete hontigita Adela, ”ke la logiko estis perfekta, sed oni tamen ne povas akcepti ion nur, ĉar ĝi estas logika ...”

”Vi do opinias, ke la aserto, kiu estas plene logikkonforma, tamen ne povas devigi nian racion, ĝin agnoski kaj akcepti?” seriozis Duŝan.

Profesoro Andreo devis interveni:

”Ankaŭ Adela iusence pravas. Se oni jam nur per la logiko povus la homon devigi, ke li agnosku la ekziston de Dio, la homo ne plu estus libera estaĵo. Kaj se la homo ne estus plu libera, libera eĉ koncerne tiel absolutan aferon, kiel la logiko, do li neniam povus fari malbonon kaj ni troviĝus en komplete alia mondo ol ni troviĝas.”

”Sed kian valoron do la logiko havas, se ĝi ne povas devigi la racion por akcepti la logike konkluditajn verojn?” seniluziigis Duŝan.

”Eĉ la matematikaj aksiomoj neniun povas devigi honeste kalkuli. Pensu pri kelkaj kelneroj ...”

”Sed ili havas apartan intereson ne obei la aksiomojn. Ili bone enspezas pro siaj eraroj.”

”Nu, proksimume la samo okazas, kiam temas pri logiko. Ankaŭ tiu, kiu volas respekti logikon, devas unue decidi, je ajna prezo submetiĝi al ĝi, serĉi la veron kaj ne kovri ĝin. Tial ne estas mire, ke eĉ tri granduloj de la filozofia pensado — Budhao, Konfucio, Paskalo — preskaŭ per samaj vortoj diris, ke la ĝusta pensado estas komenco de ĉio bona, eĉ bazo por la bona ŝtato. Ni uzos la renverson de Paskalo, kiu diris, ke la bono estas komenco de logika ĝusteco. Nur la homo, kiu en si jam decidis obei la rezultojn de la logiko, la logikon efektive konsideros. La logiko do ne estas armilo, per kiu oni povus iun alian devigi ion agnoski aŭ fari. Eĉ per perfekta logiko oni ne povas alian homon sen lia propra maturiĝo konduki al saĝeco. La racia logiko estas nur la agnosko de la intelekto al la decido, jam antaŭe akceptita en la koro, kiu estas laŭnature ’logika’ antaŭ ol oni lernas la logikon de la cerbo. Tial ankaŭ la ekziston de Dio oni ne povas kredigi per logikaj argumentoj. Nur tiu, kiu la Dian ekziston jam agnoskis en sia koro, subite komprenos ankaŭ formal-logikan vojon al tiu ekzisto.”

”Sekve, oni unue instruu la malhonestan kelneron fariĝi honesta, nur poste oni instruu lin pri rapida kalkultekniko ...” aldonis sian penson Tanja.

La brulfumo de ilia aŭto jam ĉirkaŭlekis la najlojn de ilia tendo.

IV.

*Kiel neniŭ martelo povas detrui
la plej malgrandan partiklon de la materio...
ŝtelistoj en la tendaro;
hundoj kun teologia instinkto ...*

Neniŭ havis adekvatan okupon. Ili vagaĉis ĉirkaŭ la tendoj kaj la buseto kiel etŝtelistoj; sur la ŝtono, apogita kontraŭ arbo, sidis profesoro Andreo. En lia mano kuŝis malfermita libro ... el la jaro 1946. Ĉu en la plej streĉa jaro de la restaŭrigo de la patrujo, kiam centmetraj vicoj de maljunaj kaj junaj homoj stafetmaniere ĵetis brikojn el ruinoj, kiam la

ĉarumo estis la plej populara vehiklo; ĉu en tiu tempo vere povis aperi libro pli interesa ol "Manlibro por lubriki veturilojn kaj ĉarumojn" aŭ "Problemoj de la socialisma konstruo en vilaĝo" ... Kaj tamen estus interese legi ion instruan el la papero, produktita kaj surprisita en la jaro de ĝenerala manko de ĉio.

Do ni ĵetu rigardon trans la ŝultro de profesoro Andreo, kien montras lia dikfingro. La rigardon ĵetis Adela. Estis skribite:

"Anaksagoro asertas, ke el unu sola praamalgamo eliĝis la sennombro da sampartiklaj substancoj, ja ĉio troviĝas en ĉio ... Nome, rilate al malgrando ne troviĝas la pleja malgrando, sed nur ĉiam pli malgrandaj eroj. (Ja estas neeble, ke tio, kio laŭ la divideblo estas senfina, ĉesus ekzisti). Kaj apud tio, kio estas granda, same ĉiam troviĝas io ĉiam pli granda."

Adela elflustris tiujn ĉi liniojn preter la haroj de la profesora kapo, akompanata de lia malforta ronketado.

"Temas pri ia grekdevena laborbrigadano de la fervoja trako Brĉko-Banoviĉi," konkludis Duŝan.

"Jes, li certe estas Greko — Anaksagoro — sed ke oni dum brigadtenduma laboro diskutis pri tiaj aferoj, tio ne ŝajnas tre verŝajne!" pridubis Georgo.

"Verdire mi ne komprenas, kion la ulo volas diri per tiuj ĉi vortoj: substanco, eroj ... eĉ se ni supozas, ke li estis brigadlaboristo," diris Adela.

"Kaj se mi diras al vi, ke tiu ĉi brigadano precize sciis, kiamaniere ekestas la suna kaj la luna eklipsoj, kiel ekestas la hajlo, kaj multajn aliajn aferojn ..." subite la profesoro vekigis.

"Ja tion scias ĉiu lernanto!" ne cedis Adela.

"Sed mi diras al vi, ke tion ne scias efektive eĉ viaj instru-

istoj. Kunprenu al mi unu el viaj instruistoj, kiuj tiel plenbuŝe fanfaronas pri la sciencoj; ni igu ilin elkalkuli la estontan lun-eklipson. Via instruisto apenaŭ distingas novlunon de la plenluno!”

”Jes, oni ne povas tiel simple elkalkuli, tamen laŭprincipe ili la aferon bone komprenas.”

”Nu, vidu, nia Anaksagoro ne sciis pri la afero nur principe, sed li sciis konkrete kaj precize elkalkuli la sekvan sun-eklipson. En la tempo, kiam ne ekzistis eĉ simpla lupeo, por ne diri lorno aŭ eĉ teleskopo: proksimume 500 jarojn antaŭ Kristo!”

”El la antikva epoko do?” demandis mirigite Tanja.

”Jes, li vivis en la antikva Greklando, kiun ni dum nia pensmaĉado ankoraŭ multfoje konsideros. Nia tuta racio: de natursciencoj ĝis dramaturgio; de komputiko ĝis medicino, en la formo, kiun konas ni Eŭropanoj, kreskis kaj floris sur la bordoj de Malgranda Azio, en Ateno, sur la mediteraneaj insuloj kiel Sicilio ...”

”Kaj nun bonvolu diri al ni, kial via fingro montris ĝuste la tekstoparton de tiu Greko Anaksagoro!” postulis Duŝan.

”Kaj finfine, kial vi tenas en viaj manoj libron, ja ni librojn principe ne kunprenis, kiel vi mem deklaris ...” aldonis Gergo.

La profesoro ridetis.

”Se mi diris, ke ni ne transportos librojn, mi pensis pri du aferoj: unue, ke ni ne kunprenos tutan monaĥejan bibliotekon; kaj due, ke ni lernos filozofion antaŭ ĉio el la vivo mem, ja ĝuste tiel devis procedi ankaŭ la unuaj grekaj filozofoj, kiuj ne povis akiri librojn. Tamen ne estus saĝe tute eviti librojn. Ili estas konservitaj interparoloj kun homoj, kiuj multon sper-

tis kaj pripensis. Tial mi tenas en mia vojaĝpakaĵo apud aŭtomapo kaj manlibro por la nepra helpo kvin, ses aliajn librojn, sen kiuj la homaro estus sovaĝa roto.”

”Bonvolu do diri, kiuj estas tiuj kvin, ses libroj, se mi rajtas scivoli,” diris Tanja.

”Oni povus ŝanĝi unu aŭ du titolojn, sed ĉefe mi kunprenas apud la Biblio ankaŭ la penskolekton de Antaŭsokratuloj — kaj tiun ĉi libron mi ĵus tenas en miaj manoj — la kolekton de pensoj de la imperiestro Marko Aŭrelio, sentencojn de Konfucio, Bagavadgitaon el hinduisma tradicio, Daode Jing de Laozi; sentencojn de Budhao — Dammapadao kaj, certe, la libreton Apologio de Sokrato, verkitan de Platono. Ĝi raportas pri la lastaj momentoj de la plej saĝa homo de ĉiuj tempoj, Sokrato.”

”Sed kial via fingro montris ĝuste la tekston de Anaksagoro?” volis ĝisfunde kompreni la aferon Tanja.

”Eble tial, ĉar tiu ĉi filozofo antaŭ du mil kvincent jaroj provis respondi la samajn demandojn, kiuj turmentas ankaŭ la modernajn fizikistojn.”

”Tion ĉi mi efektive ne komprenas, ja la scienco precize scias, kiel la materio estas konstruita,” diris Adela.

”Tiu via ‘precize’ estas tre maldika afero!” refutis ŝin la profesoro kaj kontinuigis: ”Mi vidas, ke ni devas tion pli grunde preparoli. Rigardu, per martelo ni povus materian pecon principe rompi ĝis la grandeco de molekulo. Sed sur molekulon ni povus bati laŭplaĉe, nur pro tio ĝi ne disiĝus. Ni abstraktu ĉi tie la temperaturon, kiu tiamaniere ekestus kaj efikus sur la molekulon! Do, kiamaniere ni povus rompi la molekulon? Per varmo, per certa acido, per elektro. Unuvorte: per kemia procezo. Tiel ni atingas la grandecon de atomo, kiun oni dum

longa tempo tenis nedividebla (kion la greka vorto a-tomos signifas), ĉar oni ĝin per kemiaj procedoj ne povis plu dividi, kaj eĉ speciale ne per simpla martelo ... Sed ek de la komenco de nia jarcento ni kapablas disrompi ankaŭ atomojn. Tion ni faras tiel, ke ni pafas al ili per partikloj, kiuj estas pli malgrandaj ol atomoj — ekzemple per neŭtronoj. Ĉar ni havas malbonajn spertojn pri la homa optimismo, kiu ĉiam opiniis trovi la plej malgrandan partiklon, ni povas konkludi, ke ankaŭ la atomparkoj ne estas la plej malgrandaj eroj de la materio, ke oni ankaŭ ilin povas plu disigi. Eble ni tion baldaŭ kapablos fari, sed kiel filozofoj ni jam anticipe povas diri, ke la plej malgrandan partiklon oni neniam trovos kaj difinos. Neniam oni povos diveni, kia ĝi estas kaj el kio ĝi konsistas.”

”Do kial ne, se oni malkovras kelkajn novajn metodojn disrompi partiklojn?” demandis Georgo.

”Unu ebleco estas, ke la plej malgranda partiklo ne ekzistas, ĉar la serio de dividiĝoj estas senfina, do oni ne povas ĝin konstati. Sed la dua, pli verŝajna ebleco estas, ke la plej malgranda partiklo, do la baza partiklo ekzistas, sed oni ne povas al ĝi proksimiĝi.”

”Kial ne, se ĝi ekzistas?” diris Adela.

”Rigardu, kiamaniere oni ekkonas la konsiston de la horloĝo?”

”Per diserigo de ĝi,” respondis Duŝan.

”Kiel oni ekkonas la konsiston de la metalo, el kiu ĝiaj elementoj estas faritaj?”

”Oni trempas ilin en acido por ricevi salon — kaj la salon oni elektrolize analizas ...” denove diras Duŝan.

”Kiamaniere oni ekkonas, el kio konsistas la fero, kiun ni konstatis laŭ la kemia analizo?”

”Oni disrompas la atomon de la fero,” klarigas Adela.

”Do, la afero estas klara: ajnan substancon oni povas ekoni nur, se oni ĝin disrompas, analizas je pli malgrandaj eroj. Sed kiam ni atingus la lastan ŝtupon, la ne plu disrompeblan substancon, oni ĝin do ne povus plu dispartikligi. Ne ekzistas plu ’martelo’ por ĝin disrompi. Antaŭ niaj okuloj ekbrilus la partiklo de plene nealpaŝebla mistero. Nur ĉi tie ni vidas, ke dum la tuta historio de natursciencoj, ni efektive ne okupiĝis pri la substanco mem, sed ĉiam nur pri la rilatoj inter ĝiaj diversnivelaj partikloj, kiuj ĝin konsistigas.”

”Tion mi ne komprenas tre bone!” reklamaciis Georgo.

”Nu bone, ni rigardu la aferon de alia flanko. Se ni rigardas la radon kun la spokoj, kiu rapide turniĝas, ni havas impreson, kvazaŭ la rado estus plenkorpa disko. Ni ne povas enŝovi bastonon, ĉar la spokoj tiel rapide moviĝas, ke tio efektivas, kvazaŭ temus pri plena disko. Sed tiuj spokoj mem konsistas el molekuloj kaj molekuloj el atomoj, inter kiuj ĝenerale troviĝas malplena spaco. Sed ankaŭ molekul- kaj atomnivele tiuj malplenaj spacoj por ni prezentiĝas kiel firma substanco pro la rapida moviĝo de la partikloj. Ju pli profunda la nivelo, kiun ni descendas, des pli grandaj estas la malplenaj spacoj. Tiel ni vidas, ke efektive ne troviĝas antaŭ ni la plena rado, sed rapide moviĝantaj spokoj; efektive ne bastonoj, sed maldenso da molekuloj; eĉ ne tio, sed pli granda maldenso de atomoj; ke finfine nenie plu vidiĝas atomoj, sed senkompare kaj terure maldensaj partikloj; kvazaŭ finfine ĉio estus nur plu fizik-matematika trompo — kvazaŭ ĉio estus nur la impreso post la enorme rapida turniĝo de — nenio ... Aŭ, ni diru, de tiu mistera partiklo, kiun ni per neniuj instrumentoj povos registri, ja en ĝi ne estas plu io pli malgranda, kio en ĝi

turniĝus kaj tiel ĝi ankaŭ ne povus impresigi kiel firma substanco.”

”Tio diras, ke la homa mano efektive neniam ion realan tuŝis, ĉu?” ekmiris Tanja.

”Jes, proksimume tiel. Sed nia intenco ne estis pruvi, ke nenio ekzistas, ja pura nenio nin eĉ trompi ne povus, sed nur, ke tio, kio finfine vere ekzistas, restas por ni nekaptebla kaj neekkonebla. La lasta substancpartiklo estas same neatingebla per simpla martelo, per kemilaboratoria acido, per elektronika mikroskopo kaj eĉ per nia racio. ... ’Ni estas el tia ŝtofo, el kia fariĝas sonĝoj!’ (*We are such stuff as dreams are made on ...*) diras Prospero en la lasta akto de la dramo *La Tempesto* de Shakespeare.”

Sub la tendo plaĉe leviĝis fumo. En la pototo gluglis akvo por teo. Sinjorino Majda dismetis tasojn kaj ĵetis en la pototon kelkajn kuleretojn da ŝrilanka plukaĵo.

”Ĉu vi scias, Andreo, ke hodiaŭ iu enrompis en la loĝveturilon de iu turisto kaj preskaŭ tute prirabis ĝin?” ŝi turnis sin de la fajro al li.

”Ah, tio venas kvazaŭ mendita!” ekĝojis la profesoro.

”Nu, tio vere valoras rapidan mendon! Ĉe vi oni neniam povas scii ...” ŝi aminde koleriĝis trans siaj tasoj.

”Vi ne komprenas, kion mi volis diri. Nun komencos okazi io, kio ligiĝas kun nia hieraŭa diskuto en la rubejo. Mi supozas, ke tiuj enrompintoj multe helpos al ni klarigi tion, kio en la rubejo ŝajnis tiel malpura kaj nebula ...”

Neniu vere komprenis, pri kio temas; ĉu la profesoro kaj lia edzino ludas misteran teatraĵeton? Andreo kapablis pri ĉio; kaj sinjorino Majda kapablis eĉ iom pli ...

Dume jam alhurlis la polica veturilo — el ĝi elsaltis du poli-

cistoj kun hundo. La proprietulo de la loĝveturilo, en kiun estis enrompите, tuj alpaŝis la policistojn kaj komencis al ili rakonti. Unu el ili notis en sian kajeron, la alia kondukis la hundon al la veturilo, ke ĝi deekstere kaj deinterne ĝin pri-enketu per sia nazo. La policisto, kiu antaŭe notis, nun per iaspeca peniko penikumis la klinkon kaj la pordon kaj poste metis sur tiujn lokojn iajn foliojn, ilin denove deprenis kaj deponis en sian aktujon.

La uniformitaj viroj kun la hundo poste pridemandis naj-barajn turistojn, tiu kun la kajero denove notis. Finfine ili igis la hundon iri laŭ sia plaĉo kaj ili ĝin sekvis. Adela, Georgo, Tanja kaj Duŝan jam intencis postsekvi ilin, ja junaj homoj estas pli turmentitaj de la kuriozemo ol pli aĝaj, sed Andreo ilin decide haltigis:

”La unua instruo, kiun la malfeliĉaj enrompintoj povas al ni doni, estas, ke nia okupo ne estas, fariĝi deĵoraj atestantoj de ĉio, kio ĉirkaŭ ni okazas. Neniu el ni povas flari spurojn aŭ legi la deprenitajn fingrospurojn, do ni bele atendu ĉi tie!”

La bravaj tendumantoj ne trovis tion tre bona, tiel rezigni pri sia kuriozo, sed neniu kuraĝis kontesti la profesoron. La sinjorino enverŝis teon, milda eskorto da mevoj aranĝis sian flugdemonstracion, la maro petole plaŭdis, kvazaŭ ĝi volus ellitigi la firman teron.

La hundo kondukis la policistojn al iu luksa loĝveturilo, ligita al same luksa aŭto. La hundo saltis rekte en la veturilon kaj komencis boji. Tra la pordo sin ĵetis du fraŭloj, unu laŭŝajne deksexjara, la dua eble dekokjara. Tuj post ili saltis la hundo kaj kaptis la pli aĝan je kubuto, tiel ke li ne povis plu sin movi. Tuj aperis ankaŭ la gepatroj de la du fraŭloj. Ili per

grandaj gestoj provis ion klarigi al la policistoj, de malproksime ĉio aspektis kiel vera burlesko.

La fraŭloj devis tuj surloke meti siajn montrofingrojn kaj dikfingrojn sur certan farbkuseneton kaj poste sur pretan formularon. Post kelkaj minutaj la afero finiĝis tiel, ke la priŝtelita posedanto ricevis siajn objektojn kaj ambaŭ fraŭloj devis veturi kun la policistoj al prienketado.

”La blua aŭto forveturis!” diris sinjorino Majda kaj viŝis siajn manojn per sia antaŭtuko.

”Do, venis tempo, ke ni faru niajn konkludojn ...” ekridetis Andreo.

”Oni opinius, ke filozofoj pri tiaj temoj ne zorgas tro. Pri kriminologio ekzemple ...” ironiis Majda.

”Se la policisto kaj la filozofo laŭ siaj profesioj ŝajnas troviĝi sur polusaj pozicioj, mi preferas diri, ke ili tamen iamaniere faras la saman laboron ...” Andreo surpaŝis la terenon de mistero.

”Ĉu vi volas komplimenti la policon?” diris Adela.

La profesoro dum certa tempo nur silente ridetis, fine li provis malligi la nodon:

”Vidu, tiujn du kompatindulojn finfine ne perfidis io alia ol iom da disblovita aromo, tamen sufiĉa por la hunda nazo — kaj kelkaj duone postrestintaj fingroŝtampaĵoj, kiujn la instruita okulo tamen povis legi.”

”Kian rilaton tio ĉi havas kun nia problemoj?” diris Georgo.

”Antaŭ ĉio, ke ni en nia serĉado je la vero ne dependas de kelkaj duone perditaj aromhaladzoj kiel tiu hundo; ke ni ne vivas en la mondo de kelkaj duonforviŝitaj fingropresaĵoj. Ni ne bezonas gliti per nia nazo surterene — kaj ni ne bezonas

penikumi la universon por registri ian spuron. Kaj nun bonvolu konsideri, kiom pli saĝa estas la policisto kompare kun kelkaj filozofoj, se li surbaze de tiom minimumaj spuroj povas trovi deliktulon — dum ni, kiuj per apertaj okuloj rigardas tiun 'corpus delicti' (= objekton, kiu pruvas delikton) en sia tuta majesto, multfoje ne kapablas trovi la 'deliktulon', kiu produktis tiun senkompare grandskalan realaĵon. Se la policistoj kaj iliaj hundoj tiel kondukus kaj procedus, kiel kelkaj filozofoj, la ŝtelistoj vivus en paradizo!"

Profesoro parolis, kvazaŭ pli ol al siaj gejunuloj li parolus al si mem. Li perdis sin, kvazaŭ li troviĝus en la prelegejo. Eĉ Adela nenion rimarkis; vesperiĝis, sur la tenda tolo petole aŭdiĝis falantaj pinkonusoj ...

V.

*Inter leonoj en la romia areno;
pri tio, kiamaniere aranĝis sin ŝtonoj,
iomete pri la ĉevalpovo
de nia racio.*

Se ne vekus ilin mevoj, vekus ilin la paruo, kiu senĉese ion propagandis de sia pinarbo; kaj se ne vekus ilin ĝi, tion certe farus la viro, kiu el malpeza valizo el ledimitaĵo ofertis ekskurson: iom da navigado, por sperti luladon sur la maraj ondoj, ĝis stomako revoltiĝas; iom por trinki, iom por pretere manĝi en iu taverno — kaj finfine inspektvizito al iu romia amfiteatro.

La afero havis sian logon. La viro efektive ne bezonus en kvin turiste egalrajtaj lingvoj inviti al tiu senpretenda aven-

tureto. Do, kial finfine ne? Kial foje ne ŝoforu iu alia, ne ĉiam Andreo? Sian "jes" ĉiu el ili eldiris kun la rezervo de Sloveno, kies etno ĉiam troviĝas en embarasa ŝancelado, se iu ion ofertas kontraŭ mono. Tamen tiu ĉi "jes" estis sufiĉe serioza, ke la viro deŝiris ses vojaĝbiletojn kaj informis, ke la barko post unu horo ekvelos.

Ĉio, per kio ekskursantoj poste fanfaronas sur la firma tero, jam estis travivita kaj registrita en memoro kaj sur filmbendoj. Nun ili staris antaŭ la majesta ronda konstruaĵo, masonita el grandaj ŝtonblokoj, kiuj tiel precize kuŝis unu sur la alia kaj apud la alia, kvazaŭ ili estus fanditaj muldile, la ĉiĉerono klarigis, kio okazis kie kaj kiamaniere io servis al iaj celoj. En kelkaj lokoj aŭdiĝis fotoaparataj kraketoj, iu alia filmis, kvazaŭ li estus Griffith.

Profesoro Andreo kun sia grupo eliĝis el la amaso, nia sokrateca tendumularo okupis ŝtonbenkojn, sur kiuj antaŭ du jarmiloj sidis dorlotitaj damoj de la centurionoj kaj oficistoj de la provinco Dalmatia.

"Se mi nun laŭ mia maniero rakontus al vi, kiamaniere tiu ĉi konstrukoloso ekestis, vi certe ne kredus al mi ..." per ironia petolemo komencis paroli Andreo.

"Sed vi povas provi," Georgo montris emon.

"Unue ĉi tie troviĝis nur rokoj. Antaŭ milionoj da jaroj. Poste iom post iom komencis viciĝi ŝanĝoj; vento, pluvo, suno, transformis la senformajn rokojn en tiun ĉi mirindan konstruaĵon. Estas grave, ke ..."

"Tio evidente apartenas al la antologio de ŝercoj!" interrompis lin Adela.

"Tion ĉi neniu kredos al vi, eĉ se vi estas profesoro!" aŭdiĝis el iu alia buŝo.

”Kial nur, ja vi kredas multe pli dubindajn aferojn, kiujn rakontas al vi elementlernejaj instruistoj!” rebatis la argumentpilkon per malmola bato Andreo.

”Kion ni tiel kredas, ekzemple?”

Profesoro sin gratis ĉekape, iomete atendis, ke la etoso fariĝu eĉ pli streĉa kaj poste rekomencis paroli.

”Tion, ke kelkaj rokoj laŭ la efiko de hazardo povus enviĉi en rektan linion, vi ne kredas; sed vi ekzemple kredas, ke laŭ kelkaj hazardaj procesoj estiĝis la estaĵo, kiu kreskas, sin defendas, sin multobligas — kaj en certa momento de la planeda historio maturiĝas kaj fariĝas homo ... Ĉu vi ne scias, ke la plej primitiva prabesteto estas senkompare pli komplika afero ol tiu ĉi kolosa amfiteatro kun ĉiuj siaj instalaĵoj? Kaj tamen: koncerne la amfiteatron por vi estas tute klare, ke komence de ĝi ne troviĝas nur la iloj de la konstrumajstro, sed ankaŭ la genia intelekto de la arkitekto. Male vi pretas kredi, ke la organismoj, kiuj per ĉiu el siaj multegaj funkcioj kaj detaloj demonstras senkompare pli ol homan geniecon, povus estiĝi el amasiĝo de hazardaj ŝanĝoj, kvazaŭ la kaprica vento ilin amasigus survoje ...”

”Ni ja ne kredas, ke ĉio okazas tiel blinde kaj hazarde. Organismoj evoluis kaj pliperfektigis en la batalo por pluvivi. Kaj pluvivis nur tiuj, kiuj sin adaptis al la medio, dum la aliaj pereis,” insistis Adela.

”Bone bone, sed vi pretervidis du aferojn,” respondis profesoro. Unue: al materio, kiu ne jam estas la materio de pli alte evoluitaj organismoj, vi senintence atribuas la volon transvivi kaj evolui al tiu pli alta stato. Tio signifas ĝuste, ke vi atribuas al tiu materio la intelekton, la volon, la animon. Kaj due: tute ne estas vero, ke la organismoj laŭ sia evolua

linio pli kaj pli adaptiĝas al la medio por tiel pligrandigi sian pluvivkapablon. La fakto estas ĝuste kontraŭa. La evoluo montras evidentan distanciĝon kaj ĉiam pli grandan distingiĝon de vivaj estaĵoj disde sia medio. Kaj tiuj estaĵoj fariĝas ĉiam pli detruiblaj kaj disponigitaj al la kaduko. La prabestoj estas ankoraŭ tiugrade konformaj al sia medio, ke ili efektive neniam mortas, ili simple dividadas sin senhalte. La plej simplaj estaĵoj vivas plej sekure kaj plej longe. Se la evoluo irus la vojon de pli kaj pli forta sekuro kaj medikonformo, ili efektive ne 'evoluis', sed malevoluis, involviĝus por tiel pligrandigi la daŭron kaj certecon de sia supervivo.”

Ili devis akcepti la penon de nova marŝado. La arkeologia muzeo estis abunde sieĝita de romiaj monumentoj kaj sarkofagoj. En la unua salono troviĝis vitrinoj kun prilaboritaj ŝtonoj — atestaĵoj de iu praolda homa kulturo en tiu ĉi regiono. Nur fine de la salono la ŝtonpecoj montris pli evidentajn formojn de iloj, per kiuj antaŭ miljaroj iu tranĉis, hakis kaj tornis.

Duŝan interesiĝis, kiel oni povas distingi, ĉu temas pri ŝtonpeco, hazarde fajlita en riverlito — aŭ pri peco, intence fajlita de homa mano.

”La rivero fajlas laŭhazarde, dum la homo fajlas konforme al sia celo por akiri tranĉilon. La fakulo en unu momento distingas inter ambaŭ eblecoj!” certigis al li la muzegardisto.

Tanja perdis okulojn inter tiuj ŝtonpecoj; ŝi prenis el sia mansako mirindan turbanon, konkon de markankro, dirante:

”Tamen tiom da fakuloj hezitas agnoski, ke ankaŭ tiun ĉi kalkpecon meandre formis kaj tiel bele ornamis ia inteligento ...”

Kiam ili jam sidis antaŭ sia tendo kaj rigardis al semoj, kiuj, provizitaj per semoflugiloj, alteriĝis kiel delikata helikoptera ofensivo, Georgo, kun iomete malpli da romantika sento inter siaj brovoj, demandis la profesoron:

”Pri io mi tamen miras: Ni ĉiuj havas similan cerbon en niaj kapoj, tamen kelkaj el la samaj fenomenoj sekvigas konkludojn, kiujn mi per mia plej bona volo ne povas vidi. Mi ĵuras, ke vi eĉ en tiuj alteriĝantaj semoj vidas certan ĉiopovon ...”

”Se vi estas blinda, vi estas blinda; tia rezonado jam proksimiĝas al impertinento,” perdis sian paciencon Tanja.

”Ne, Tanja, vi ne pravas,” intervenis profesoro. Georgo tute bone rezonas. Verdire mi tuj antaŭe enpenisiĝis en tiujn mirindajn flugilmodelojn, kiuj aperas simple tiel el la humida tero. Koncerne la demandon ni devas scii, ke por filozofio ekzistas unu sola afflikto: malĉeesto de la demandoj. Demandoj povas esti malagrablaj nur por tiranoj — ni reagis al ili tiel, ke ni honeste serĉas respondon. Georgo, almenaŭ tion vi verŝajne agnoskos al mi, ke oni devas esti majstro de flugila modelfarado, se oni volas fabrikii objekton, kiu bone glitos en aero — kaj eĉ tio nur iomete povus imiti la eleganton de tiuj ĉi flugantaj semoj ...”

”Tio ĉiuokaze veras,” devis agnoski Georgo.

”Kaj se tiu majstro la flugadon eĉ volus vere kompreni, por ke li ne kapablu fabrikii nur la paperan aviadileton, sed ke li povu konstrui ĉe iu aviadila instituto, do li devus havi en sia kapo ion pli ol nur hobian emon, ĉu?”

”Jes, kompreneble, li devus elfari almenaŭ aviadilan akademion kaj studadon por maŝiningeniero!” lasis sin gvidi Georgo.

”Kion do diri pri tiu, kiu ĉiujn tiujn komplikegajn sciojn ne povis akiri el libroj aŭ en altlernejoj kaj laŭ la jam faritaj aparatoj, devis malkovri ilin mem? En la tempo, kiam ne jam ekzistis aviadilaj kluboj, sed parencoj kaj kunvilaĝanoj, kiuj lin priridis kiel frenezulon, kiu disŝutas sian tempon — ĉu sekve ne postulis tia invento ĝuste eksterordinaran geniecon?”

”Nur talento ĉi tie vere estus nesufiĉa!” konsentis Georgo.

”Ĝis nun ni havis la saman opinion pri tio, ke la kapablo, laŭ kiu la homo povas konstrui unue paperan glisaviadileton, poste sportajn aparatojn, transportajn aviadilojn ĝis la kosmaj taksioj unuflanke kaj sportaj kajtoj kaj glisparaŝutoj aliflanke aŭ ekstreme precizaj kaj facilaj aviadiloj, kiuj leviĝas nur helpe de homa korpa forto, ke tiu kapablo povas kaj devas esti nur inteligento, kiu sin disponigas al inspiro kaj progresas per konstanta lernado. Kaj ĝuste tiu lasta atingo, kiam oni fabrikis tiun mirindan ekstreme facilan flugilon, akcelatan de la homaj muskloj, kiu estis fabrikebla nur helpe de komputilaj kalkulegoj, pravas, ke la plej alta nivelo de certa invento estas atingata nur tiam, kiam la modelo puriĝas ĝis plena simpleco kaj eleganto, kiam oni cetere ĉie trovas en la naturo. Se vi observas la flugantajn semojn, vi rimarkos la rezulton de la pinta aerodinamika racio. Ilia genia simpleco kaj eleganto demonstras ankaŭ la pintan estetikajn kapablon de la aŭtoro. Nek ero de la materialo estas tro. Ĉu vi ne vidas, ke ankaŭ tiujn miniaturajn konstrugeniaĵojn devis elkalkuli iu racio, kiu superas ĉion, kion ni povas elkalkuli sur la tero?” la trankvila baritono de la profesoro provis persvadi la insiston de Georgo.

”Por ne paroli pri mevoj ...” ekkriis Tanja.

”Verdire, pri mevoj ni prefere ne parolu, ja jam la flugan-

taj semoj mem superas ĉiujn niajn teknikajn institutojn; ĉe mevoj ni pro la krea forto, en ili uzita, perdus ekvilibron!” konsentis profesoro.

”Mi persone perdas ekvilibron jam ĉe tiuj senpretendaj flugsemoj!” diris Duŝan. ”Ne temas pri tio, ke ĝi estus nur ĉarma semparaŝuteto, kiu elegante flugas foren de la arbo, ĝi mem enhavas altkapacitan komputilon, kiu kapablas fari tion, kion la tuta homa scienco povas nur iel priskribi: ĝi komandas al akvo, karbonoksido kaj suna lumo, ke ili sin aranĝu en altan arbon. Kaj tiu arbo poste ĉiujare denove eksplod- os en milojn da tiaj mirindaj flugsemoj ...”

”Duŝan, he, min via romantiko ne impresigas tiom!” ribelis Adela.

”Kio do, vi pensas, ĉion tion majstras?” profesoro deman- dis al Adela.

”Simple afero de la evoluo, ja ne mankis tempo,” ironiis Adela.

”Sed la evoluo, kian povas dokumenti homoj, estas ekskluzive la afero de la homa racio kaj de la inspiro, kiun oni ne povas alvoki propravole. Do kio povus kaŭzi evoluŝanĝojn antaŭ la apero de la homa estaĵo?”

”Hazardo!”

”Se tiel,” kontinuis la profesoro, ”oni devus starigi al la hazardo la plej imponan templon. Oni devus fermi ĉiujn lernejojn, hospitalojn, fabrikojn, ĉion, kio estas regata de la homa racia ordo. Oni devus proklami unu solan leĝon: Disponigu vin al la hazardo! Nome: se la hazardo produktis tion, kion ni tiel estime admiras, do nur la hazardo povus kontentige solvi niajn ĉiutagajn problemojn kaj eĉ speciale la grandajn proble- mojn de la homa raso tutmonde! Samgrade, kiom la mevo

estas pli eleganta kaj pli perfekta ol niaj aviadiloj kun benzina motoroj, tiugrade ankaŭ la solvoj, kiujn elĵetus la hazardo, estus pli elegantaj kaj perfektaj kompare kun tiuj, kiujn povas produkti la homa racia penado,” Andreo dismetis siajn gambojn por kontribui al sia stabileco.

”Ankoraŭ io,” rimarkis Duŝan. ”La leĝon pri la hazardo kiel nia gvidpovo ni efektive ne povas proklami, ja ajna leĝo forigas hazardon. Al la hazardo ni povas nin disponigi nur ’hazarde’ — kaj tio signifas, ke la hazardo ne povas esti la plej alta kaj ĝenerala leĝo kaj principo. Se la hazardo estas donita leĝe, ĝi estas per ĝuste tiu leĝo senhazardigita; se ĝi restas hazarda, ĝi restas limigita per sia escepteco. La hazardo, se ĝi ekzistus, estus ĉiam nur io escepta, ĉiam nur parazito sur la arbo de la regulo kaj leĝo.”

Adela devis al si konfesi: eĉ tiu lasta elpafita kartoĉo estis nur manovra ...

VI.

*Tribunala debato,
Adela pledas por la plej
severa puno;
rigardo al iu plua,
iom stranga rubaĵejo.*

Dum Tanja kaj Adela streĉis siajn korpojn, pendante de arbbranĉo, dum Duŝan kaj Georgo perdis spiron sin trejnante per halteroj, dum ĉiuj apenaŭ povis kapti aeron post la tria rondkuro ĉirkaŭ la tendaro, sinjorino Majda portis sur la ŝtonon, kiu funkciis kiel tablo, pelvon da kaĉo, en kiu oni povis rekoni nur fajne tranĉitajn pomojn kaj sekajn vinberojn. Tiun abomenaĵon ili devis kulerumi kaj tio estis proklamita matenmanĝo.

”Mi devis hieraŭ ion mueli, ne diru, ke tio ĉi devenas de

tio!” protestis Georgo. Ju pli li maĉis, des pli da tio troviĝis en lia buŝo.

”Verŝajne vi pensis, ke en tiu eta muelilo vi muelas verdan, ne jam rostitan kafon, ĉu? Ne, vi muelis simplan hejme kultivitan tritikon,” klarigis sinjorino.

”Sed la aĵo estas tute kruda,” ribelis ankaŭ Andreo, la profesoro.

”Rusaj soldatoj ricevis nemuelitajn grenojn, ili muelis ilin en siaj buŝoj dum marŝoj kaj bataloj, tamen ili puŝis Germanajn armeojn trans Odro. Se vi trempas la muelitan tritikon dumnokte en iom da akvo, ĝi komencas fermentiĝi, kvazaŭ vi produktus acidan lakton. Se vi matene aldonas kulereton da mielo kaj iom da raspita pomo, vi havas porcion, kiu vin bone vivtenas dum duontago,” kontinuus Majda. ”Mi simple pensis, se ni jam okupiĝas pri filozofio, do ni konsekvence ankaŭ manĝu iom pli saĝe ...”

Post la matenmanĝo profesoro dum kelkaj minutoj trafo-liumis gazeton. Nu, li ne atendis savigan novaĵon, li legis prefere pro sia kultura rutino.” Ho, jen rigardu! Hodiaŭ en la urba juĝpalaco okazos proceso kontraŭ tiuj du friponoj, kiuj malplenigis la tendumajn trenveturilojn,” Andreo legis al la tuta societo.

”Mi volas ĉeesti je ajna prezo!” ekkriis Adela. Andreo iomete pripensis, poste li kapjesis.

”Vi pravas, Adela, ni ĉiuj iros.”

Aliaj iomete miris, ke Adela sukcesis tiel rapide persvadi profesoron; sed certagrade ili jam al kutimiĝis je tio, ke li subite ion decidis kaj daŭre per io surprizis.

Ili eniris veturilon, Andreo turnis ŝlosilon kaj provis persvadi motoron al starto. Subite ĝi ekhenis, kvazaŭ oni alpor-

tus avenon al ĉevaloj. Pinarboj ekkuris pretere. Ili parkigis tiel, ke ili troviĝis flanke de glaciaĵvendisto.

”Foje ni devas surprizi nin mem, por ke ni ne konduitu kiel hundoj de Pavlov!” rekomendis Andreo, eltirante sian ŝlosilon de la panelo. Ĉiuj komprenis: Ne preni glaciaĵon, kvankam la suno sputas sur vin lafon de varmego ... ”Foje estas tute agrable ĝin preni, sed foje estas bone ne preni, ke vi sentu vin mem!” li klarigis, vidante, ke ĉiuj lin komprenis.

La diino de la justeco en fasada niĉo tenis en unu mano pesilon, per la alia mano ŝi apogis sin sur glavon, ŝiaj okuloj estis bandaĝitaj. Tiuj ĉi simboloj povas provoki klarigon malpli oficialan, ironian. Ne venis jam multaj homoj.

La proceso mem estis enua, kiel ĉiuj similaj procesoj. La fraŭloj provis konvinki la juĝiston, ke ili nur ”ŝercis” — ke ili eĉ intencis ĉiujn ŝtelitajn objektojn redoni.

La juĝisto estis spertoplena kompetentulo kaj refutis la sineskuzon de la fraŭloj per sia ironio: ”Bonvolu akcepti, ke ankaŭ la tribunalo iomete ŝercos — poste ĝi redonos vin al viaj gepatroj ...”

La publiko ekridis el tiuj malmultaj buŝoj, kiuj en tiu varmego povis ridi. La juĝisto per sia rutina oficeco relative rapide finis la aferon. La asizo decidis, ke ambaŭ friponoj estu proklamitaj kulpaj, la juĝisto kondamnis la pli aĝan je unu monato da malliberejo kaj al la pli junan je du monatoj kondiĉigite.

La publiko estis disrevigita pro tiel milda verdikto, sed ĝi ne povis protesti, la juĝisto jam malaperis el la salono. Kiam ili jam troviĝis surstrate, Adela afliktite ekkriis: ”Mi opinias tiun ĉi juĝiston komplete malkapabla!”

”Mi opinias, ke tio estas tre kompetenta juĝisto kun granda sperto!” refutis ŝin profesoro.

”Ĉu tial, ke li kondukis tiel mole kontraŭ tiuj du rabistoj?” la kolero kvazaŭ haladzis el ŝia korpo.

”Ne, sed tial, ke li faris la plej bonan aferon, kiu en tiuj ĉi cirkonstancoj estis farebla. Li ne povis ilin liberigi de ajna ŝuldo, ja la prokuroro ilian ŝuldon pruvis, do li faris kompromison.”

”Vi do la krimulojn simple malpunus, anstataŭ sendi ilin malvarmigi iliajn temperamentojn en konvenaj ĉeloj, ĉu?”

”Se vi volas al iu homo instrui skiadon, vi sendos lin verŝajne sur neĝe kovritan terenon kaj ne en dezerton, ĉu?” per sia petola okulo demandis Andreo.

”Kompreneble.”

”Kaj se vi volas al iu instrui naĝadon,” li kontinuis, ”vi sendos lin en akvon, ĉu ne?”

”Memkompreneble, ke en akvon!” jam fariĝis senpacienca Adela.

”Kaj por instrui skiadon, vi la knabon ne sendos inter tiujn, kiuj mem ne scias skiadi, sed inter tiujn, kiuj posedas tiun scion kaj lerton, ĉu ne?”

”Tiel estas ...”

”Kaj la alian knabon ni ne sendos al la grupo de nenaĝuloj, ĉu?”

”Sendube, ni devas lin sendi al la majstroj de naĝado, kiuj ne scias nur naĝi, sed ankaŭ savi tiujn, kiuj en akvo ne jam estas tute certaj,” aŭtomate eliĝis el Adela.

”Se tiel, do ankaŭ tiujn, kiujn ni volas instrui pri honesto, ni sendu en lokon kun honestaj homoj, ĉu?”

”Hm ...”

”Kontraŭe, se ni estus rabista banditaro, ni sendus nian lernanton al la loko, kie kunvenas multaj lertaj friponoj — kaj tio ĝuste kaj unuavice estas la karceroj, ĉu ne?”

”Jes, mi jam komprenas.”

”Bona juĝisto do aljuĝos nur tiom da karcero, ke la punito, kies animo ne jam estas koruptita, nur iomete gustumu tiun etoson, ĝis la gusto al li ne jam komencu plaĉi. Li preferus lin sendi al iu kontempla monaĥejo, kie li havus eblecon primediti la direkton de sia vivovojo kaj konsulti homojn de kontrasta moralmodelo. Sed li devas konsideri stultajn leĝojn starigitajn de la ŝtata povo. Tiel li faras kompromison, kiu ebligas al li resti juĝisto kaj samtempe ne detruas la junan homon. Nu, tial mi diris, ke temas pri bona juĝisto.”

Dum tiu ĉi dueleto ili venis al ĉarma bufedo, kie oni povis ricevi ĉion, ek de kafo ĝis glaciaĵo. Sinjorino Majda taksrigardis siajn prizorgitojn kaj decide diris:

”Memkontrolo tia aŭ alia, nun ni eniros por ricevi ion dolĉan!” ”Ĉu vi aŭdas la voĉon de Eva sub la arbo?” priŝercis la profesoro — kaj baldaŭ ili eksidis ĉirkaŭ la ronda tablo sub baldaheno.

Kuleretoj portis la ruĝberan, ĉokoladan kaj vanilian fridigitan guston en buŝojn; la disreviĝinta venĝemo de la tribunala salono malvarmiĝis ĝis la agregata stato, ĉe kiu oni povis saĝe interparoli.

”Tamen io ĉe vi tre ĝojigas min, Adela!” komencis Andreo.

”Ho, tio min vere ĝojigas, se ankaŭ vi pri io ĝojas!” ironiis Adela.

”Propravole vi kapkliniĝis antaŭ tiu Inteligento, pri kies ekzisto mi antaŭe al vi vane parolis.”

”Sen, ke mi pri tio konsciu ...”

”Diru al mi vere: Ĉu laŭ vi havas sencon diri, ke sako de ia materio ŝtelas de alia sako iom da ties substanco? Kaj ĉu estas sencohave, ke tiu alia sako de materio, antaŭ la tria, la unuan vokas antaŭ tribunalon? Kaj tiu tria sako al la unua solene proklamas esti ŝulda, ĉu?”

”Tio estus vere iomete strange ...” provis elturniĝi Adela.

”Se vi volas al iu fari proceson, se vi volas al li verdikti ŝuldon, do vi devas en lia apero supozi pli ol nur sakon da atomoj.”

”Kial la homo devus esti pli ol materio por povi esti ŝulda?” demandis Adela.

”Ĉar la materio neniukaze povas agi kontraŭ si mem. La materio ne povas 'ŝteli', ja ĉio apartenas al ĝi; la materio ne povas 'mensogi', ja ĉio en ĝi estas al si egala, identa. Ĉiuj tiuj vortoj, per kiuj oni povas iun akuzi kaj juĝi, venas el iu alia mondo. Antaŭ proklami certan homon mensogulo aŭ ŝtelisto, vi devas atribui al li senmortan animon, kiu iam devos perfekte respondi pri siaj decidoj kaj agoj. Se la homo ne estas io pli ol nur materio, estas ridinde lin puni. Se ĉio estas nur materio, kiun oni povus bati; la materio povas bati nur sin mem, sian tuton.”

Tamen Adela ne jam plene kaptis la ideon.

”Sed, se vi insistas, ke oni tiujn du friponojn punu, sen atribui al ili la senmortan animon, do oni devus kondamni ankaŭ la atomon de oksigeno, ĉar tiu atakis la atomon de la fero ĉe mia aŭto kaj tiel kaŭzis la malutilan rostiĝon. Oni devus kondamni acidojn, kiuj detruas metalojn; oni devus akuzi la leĝon pri gravito, kiu nin premas al la tersurfaco kaj ne permesas nin libere naĝi en aero ...”

”Kion vi diras, estas freneze ...”

”Tamen ekzistas homo, kiun tiun frenezaĵon jam praktikis.”

”Kiu?”

”Kserkso, la persa reĝo, kiu ordonis vippuni la maron Helspontan ...”

”Se tiel,” intervenis Duŝan, ”oni povas prepari nek akuzskribon nek defendoskribon, sen supozi la ekziston de la nemateria animo, ĉu?”

”Nek oni povus certan homon kritiki nek laŭdi, ke tio havu solidan validon!” aldonis Andreo.

”Sed kial oni tamen procesas kontraŭ la krimuloj kaj premias la meritulojn ankaŭ tie, kie oni ne kredas je la ekzisto de animo?” elĵetis la lastan karton Adela.

”Oni facile diras: Mi ne kredas. Sed preskaŭ neeble estas, vere ne kredi.”

Post tiuj ĉi vortoj ili eksilentis. Ĉiu primeditis ilin laŭ sia maniero. Poste ili veturis al la tendaro. Ili interkonsentis, ne malfrui la majestan vesperan artspektaklon. Pentroarto kaj teatro en unu fenomeno: La sunsubiro en la maron ...

VII.

*Kiamaniere oni lernas spiri;
pri la nekutima olimpiko por
kvin favoritoj ...*

De iu ŝipo aŭdiĝis sirenurlado. Zipoj sur la dormosakoj sesfoje faris brrr. Da matena gimnastiko okazis iomete malpli, neniu devis barakti pri sia spirado. Profesoro paŝis antaŭ ilin kaj demandis:

”Diru, ĉu vi scias spiri!”

Tion li demandis tiel, kiel oni demandas, ĉu iu scias bone stiri velŝipon aŭ bone kuiri. Kvazaŭ li demandus ion tute saĝan ...

”Kiel vi tion opinias?” konkrete montris sian embarason

Tanja. Sed en ŝia kapo efektive kaŝiĝis la supozo: "Ion tian povas demandi nur homo kun problemoj subtegmente ..."

"Bone, unue ni faru, poste ni pridiskutu," decidis Andreo, vidante, ke ili ne elsendas sur la sama frekvenco.

"Ni malrapide paŝos kaj spiros tiel, ke la enspiro daŭros dum kvar paŝoj; dum tiuj ĉi kvar paŝoj do ni devas bone pleniĝi nian pulmon. Dum la sekvaj kvar paŝoj ni retenos la spiron — kaj dum la lastaj kvar paŝoj ni kontinue elspiros. Ni kontinuos la paŝadon kun malplena pulmo dum du paŝoj, poste ni ripetos la tutan ciklon."

"Kvar paŝoj por enspiro, kvar por reteno, kvar por elspiro, du por esti sen aero enpulme, se mi bone komprenis, ĉu?" volis esti certa Duŝan.

"Precize tiel. Kaj dum enspirado vi levu brakojn, por ke la torako povu ampleksiĝi; kiam vi elspiros, lasu la brakojn fali!" diris Andreo siajn lastajn instrukciojn.

Poste la procesio ekmoviĝis. Georgo jam post sia tria paŝo ĉion konfuzis. Unu brakon li levis, la alian li samtempe lasis fali. Aliaj ridis. Andreo haltigis la vicon kaj atentigis ilin, ke ili estu plene koncentritaj kaj seriozaj, poste ili komencis denove. Nun funkciis. Tamen la paŝoj estis necertaj, kvazaŭ ili marŝus sur ŝnurego. Iel ili sukcesis traspiri tiel ses ciklojn. Fine la profesoro permesis al ili eksidi sur ŝtonoj.

"Ĉu vi nun jam scias, pri kio mi antaŭe demandis?" preskaŭ petole demandis Andreo en espero, ke nun ili lin komprenas.

"Mi ankoraŭ ne komprenas, kion oni ĉi tie sciu. Ja ekde nia naskiĝo ĉiu el ni spiras. Se ni tiel spiras kaj vivas, do ni sekve scias spiri ..." diris Adela.

"Sed mi diras al vi, ke vi ne scias. Jam ĉe tiu ĉi tre simpla

ekzerco vi estis konfuzitaj, do mi ne komentu la vere komplikajn teknikojn de bona spirado, kiujn vi devos ankoraŭ lerni!”

”Kial estas bone spiri per certa tekniko?” demandis Georgo. Li volis fari bonan impreson.

”Vidu,” pli profunde enspiris Andreo, ”la besto povas ekmarŝi jam la saman tagon, kiam ĝi naskiĝas, dum la homo bezonas por la samo du jarojn aŭ foje pli. Sed vere ĝuste iri lernas nur malmultaj homoj. La besto naĝas, sen lerni tion, la homo devas tiun lerton aparte lerni. La besto povas mem manĝi jam post la anonco de la unua malsato. La homa ido bezonas kelke da jaroj por iel kontentige manĝi homnivele. Vere home manĝi lernas nur malmultaj post multa ekzerco kaj memregado. Ĉu do estu alimaniere, se temas pri spirado? Jes, vi iel spiras, sed proksimume tiamaniere, kiel la bebo iras. Ĝi ja moviĝas, sed tion oni ne povas jam nomi vera irado. Aŭ tiel, kiel unujara bebo manĝas. Ĝi ja plenigas sian ventron, sed kiel kaj per kio, se ne ĉeestas la asista mano de la patrino? Ni do povas supozi, ke ankaŭ nia spontanea spirado pli malpli samnivele kiel la manĝetiketo de la bebo. Antaŭ ĉio, nia spontanea spirado estas tre supraĵa, kaj la konsekvenco estas manko de la oksigeno ensange. Kaj nia cerbo uzas superaveraĝe multe da ĝi por povi iel funkcii.”

”Bone, se la afero estas tiom signifa,” ekinteresiĝis Tanja, ”kial en la lernejo neniu rakontis al ni pri tio? Nek ĉe la instruo pri la homo nek ĉe gimnastiko.”

”Bedaŭrinde tro da instruistoj sekvas la regulon: ”Kion mi mem ne scias, pri tio mi almenaŭ instruos la aliajn ...” Multaj instruistoj sian profesion ne elektis laŭ sia interna impeto kaj misiemo, kiu ilin instigus neniam fini aldonan studa-

don kaj librolegadon. Ili en la klasĉambroj pliparte nur perlaboras sian ĉiutagan panon. Ili ankaŭ ne instruas al vi, kiamaniere rigardi, same ne, kiamaniere bone aŭskulti, kvankam ili bone regas la anatomion de la orelo. Ili same ne instruas vin ĝui en bona manĝado, kvankam ili turmentas vin per ĉiu parteto de la dika intesto. Ili ne instruas vin pri ĝustaj vojoj, kvankam ili vin trejnas por longdistanca kurado. Ili ne instruas vin ĝuste paroli kaj ĝuste silenti, kvankam vi havas tro da lingva instruado. Ili ne instruas vin distingi inter justo kaj maljusto, kvankam dum la historia instruo ili tre precize parolas pri la datoj de unuopaj ribeloj kaj revolucioj. Sekve, ne atendu tro de la lernejo! Plej merita estas por vi la instruisto, kiu tute en komenco vin instruis legi kaj skribi, elemente kalkuli kaj bone konduti. Preskaŭ ĉio alia estas pura balasto. Pli detranĉado de viaj flugiloj ol vera instruo por bone flugi ...”

”Eĉ se tiel, kion ni povas fari? Ni ne instalas instruistojn kaj ni ne planas instruhorojn,” koleriĝetis Georgo.

”Tamen vi povas multon fari. Markso ie diras, ke efektive la infanoj pli edukas siajn gepatrojn ol inverse. La samo validas por viaj instruistoj. Se vi ne havas intereson por la materio, se vi evitas viajn devojn, la samon pli kaj pli faras via instruisto. De la antikva tempo de la bona greka lernejo la generacioj de pigraj lernantoj evidente faris sian laboron ...”

”Kaj kiamaniere ni ion faru?” entuziasmiĝis Tanja.

”Antaŭ ĉio, ne lasu ilin en ilia trankvilo! Ne toleru al ili supraĵe klarigi aferojn. Kiam ili rakontas al vi pri la teoremo de Pitagoro, ne permesu nur skribi sur la tabulon la matematikan formulon. Postulu de la instruisto konduki vin spirite en la urbon Krotono en suda Italio, kie tiu filozofo kaj matematikisto vivis kaj agis. Postulu kompletan ripetdemonstron de

la teoremo, same, kiel tion faris Pitagoro. Se la instruisto tion ne scias kaj falas en embarason, ne skandaligû kaj ne ĝuu pri lia senkompetenco. Helpu al li fari la aferon komplete. Petu de li prepari sin pli bone por venonta lekciado. Via instruisto propravole elektis tiun noblan profesion, do li ŝuldas al vi altkvalitan instruadon. Se li iam rakontos pri la eklezio, kiamaniere ĝi persekutis sciencistojn, kio okazis al Koperniko, al Galileo kaj aliaj, petu de ili precizajn informojn, prenitaj el seriozaj fontoj. Postulu, ke li konduku vin vespere subĉielen kaj montru al vi la firmamenton kun stelkonstelacioj. Postulu, ke li demonstreu sur la tabulo, kiamaniere oni elkalkulas la venontan sun- kaj luneklipson. Se li tion ne kapablas, petu lin ĝentile prepari sin pli bone por la venonta lekcio! Se Tales el Mileto antaŭ preskaŭ 2600 jaroj tion povis kontentige fari, do faru ankaŭ via moderna instruisto, kiu cetere scias tiom multe rakonti pri la persekutado de la sciencistoj fare de la eklezio ... Kiam li rakontos al vi pri Giordano Bruno kaj lia malfeliĉa destino, efektive kaŭzita de la tiama eklezia inkvizicio, petu de li raportu pri liaj verkoj, almenaŭ nomi ilin! Kiam li ridindigos la mezepokan skolastikon, rerakontante la banalan anekdoton pri la ĉevalaj dentoj kaj Aristotelo, demandu vian instruiston pri la detaloj, pri la nomo de la stulta anekdota monako, kiu kontrolis la dentonombrojn en la Aristotelaj verkoj anstataŭ en la ĉevala buŝo ... Kaj petu de li nomi almenaŭ tri filozofojn de skolastiko kaj iliajn verkojn.”

Ili iomete meditis pri la vortoj de la profesoro. Aŭdaca ideo, sed efektive sencohava. Neniu protestis. Supraĵeco kaj stulta ripetado de propagandaj eldiroj ne havas argumenton por si.

”Se la lernantoj procedus tiel,” rimarkis sinjorino Majda,

”en la konferencaj salonoj de la lernejoj oni ĉesus diskuti pri salajroj kaj banalaj aferoj. La eldonkvantoj de seriozaj libroj kaj leksikonoj multobliĝus, la lerneja sistemo tre rapide superus ĉiujn optimismajn atendojn.”

”Kaj por atingi tion, jam unu tia lernanto en ĉiu lernejo, kiu leviĝus kontraŭ la stulta ripetado de sensencaj frazaĉoj, malantaŭ kiuj ne troviĝas persona konvinko kaj vera scio, sufiĉus,” diris Duŝan.

”Kial vin tiel ĝenas, se en la lernejo instruisto parolas pri la aŭtodafo de Giordano Bruno?” nun anonciĝis Adela.

”Mi certas,” sen embaraso diris Andreo, ”ke ankaŭ tiutempe la plej multajn brulŝtipojn portis sur la brulŝtiparon por Giordano Bruno la tiamaj instruistoj. Ne temas pri aprobo de la tiama krimo kontraŭ tiu filozofo kaj sciencisto, temas pri tio, ke ne kredu al la protestoj kontraŭ tiu krimo ĉe la homoj, kiuj nuntempe per aliaj metodoj faras la samon aŭ almenaŭ silente servas al tiuj, kiuj tion faras. Kaj ne forgesu, kiom da promesoplenaj talentoj de junaj homoj tiaj reĝimservemaj instruistoj ĵetas sur metaforan ŝtiparon nuntempe!”

Andreo iomete atendis, ĝis la pensoj kvietiĝis en iliaj koroj, poste li diris iel repaciĝe:

”Sed ne forgesu, kion skribis la serba pedagogo de la 19-a jarcento Dositej Obradoviĉ: ’Malgrandaj estas tiuj, kiuj la laboron de la instruisto tenas malgranda.’ Nature, tio ĉi validas por kompetentaj kaj honestaj instruistoj.”

Ĝis la tagmanĝo ili libertempis. Ĉiu faris ion propran. Duŝan, ekzemple, per sia eta filmkamerao la eleganton de la mevaj flugoj transformis en helŝanĝiĝojn sur la arĝenta emulsio ... Tanja kompletigis sian kolekton de porcelano, kiun serpentigas, durigas kaj tiel nekredeble cizelas krabetoj, helikoj kaj

konkmluskaj. Adela. Vere, kion povus fari Adela? Kun sia tuta apero ŝi disponis sin al la sakramento de la suno, kiu sen ajna nuba opozicio alparolis sian idan planedon ... Georgo simple purigis salaton. Sinjorino Majda sur la kuirila flamo ion sintezis. La profesoro blovis en la tubeton de la karburatoro ...

”Hodiaŭ ni honoros la memoron de la barono Pierre de Coubertin,” du horojn post la atingo de satiĝo ĵetis en la grupon profesoro Andreo.

”Pri kiaspeca feŭdismo temas?” Adela sentis pikon en sia liva gambo.

”Ni surscenigos etan olimpikon,” dispelis kontraŭfeŭdajn dubojn la profesoro. Adela iomete ekhontis pri sia nescio, kiu estas la menciita barono, renoviginto de la olimpikoj en la moderna epoko.

”*Citius, altius, fortius*” (pli rapide, pli alte, pli forte) estis skribite inter la du tendaj fostoj jam post kvaronhoro — la fama slogano de Coubertin.

La afero iamaniere startis. Per kurado. Kaj jen la unua surprizo. Anstataŭ, ke Andreo, kiu la tutan aranĝon gvidis kaj estis samtempe la startisto, juĝisto, kelnero por citronakvo kaj cezaro sur la honortribuno, aranĝu ĉiujn kvin kurantojn en unu linio kaj ilin samtempe kurigu, li igis kuri ilin unuope, ĉiun en propra tempo. Post preciza mezurado li notis la kurotempojn por ĉiu aparte.

Tiel ĉio funkciis ĝis la fino. Bataldisciplinoj ne troviĝis. Pilk-ludoj ne troviĝis. Ĉio pli similis al ĉambromuzika koncerto ol al vere sporta aranĝo. Nu, eble almenaŭ la proklamo de la rezultoj kaj de la venkintoj estos pli vigla. Sed tio tute ne okazis.

”La rezultojn ĉiu ricevos en propra koverto, kaj ne necesas montri la paperojn antaŭ la sekva parto, kiu okazos venont-semajne,” lakone klarigis pipre sobra Andreo.

”Mi ne garantias, ĉu mi ankoraŭ estas normala!” satiĝis de ĉio Georgo.

”Verŝajne vi volis diri, ke vi komencis pridubi mian normalecon ...” ridete diris al li la profesoro.

”Nu, bonvolu diri, ĉu ĉio tio havas rilaton kun la sporto? Ni eĉ ne kuris kune. Neniaj publikaj rezultoj, neniaj venkin-toj, neniaj venkitoj; mi ne komprenas kaj fino!”

”Dum la dua parto vi informiĝos pri ĉio. Povas esti, ke vi ĉiuj venkis, povas esti, ke neniuj.”

”Kiamaniere ni povus venki ĉiuj? Ja nur unu sola povas esti la unua kaj nur unu sola la lasta ...”

”Inter la homoj neniuj havas numeron. Ne estas iu unua, alia la dua, iu la lasta ...”

”Do ni ne konkuris unu kontraŭ la alia, ĉu?”

”Ne.”

”Bone, kontraŭ kiu do, se jam tiel ...?”

”Ĉiu kontraŭ si mem.”

”Ĉiu unuope ...”

”Tiel estas. Ĉiu unuope kontraŭ si mem. Tial ni hodiaŭ ne jam scias rezultojn. Post la ripetita vetkuro post unu semajno ni nur scios, ĉu ĉiu el vi venkis super via unua rezulto aŭ ne ...”

”Bone, sed kial ni ne vetkuris inter ni, unu kontraŭ la alia, kiel tion faras la tuta normala mondo?”

”Konfucio, la granda ĉina filozofo, diris: ’La noblulo ne emas vetkuri.’ Kaj la slovena poeto Oton Županĉič diris ver-se: ’Agletoj vetkure ĉi-sube flugetas, dum agloj solece en al-

toj disglisas ...' — Se ni estu justaj, kaj kiel disĉiploj de la filozofio, ni antaŭ ĉio estu justaj, ni efektive ne povas vetkuri inter ni, ja ni ne havas la saman startpunkton. Ni ne naskiĝas kun egalaj muskloj kaj ostoj, ni ne ricevas egalan edukon kaj trejnadon, ni ne manĝas egale, ni ne estas egale sanaj. Egaleco sur la sporta kronometro ne estas la egaleco en la reala vivo.”

”Ĉu tio estas ĉio?”

”Efektive tute ne. La ĉefa kialo, kial niaj ludoj diferencis de tiuj, kiujn aranĝas la ”normala mondo”, estas, ke nia celo ne estas supervenki la alian, sed nin mem. Mia hodiaŭo devas esti pli rapida, pli alta, pli forta ol mia hieraŭo. Kaj tiu ĉi hodiaŭo devas esti supervenkota de mia morgaŭo.”

”Kio malbona troviĝas en tio, se oni supervenkas la alian?” demandis Adela.

”Eĉ se tio ne estus malbona kiel provo, antaŭ ĉio tio estas neplenumbla afero. La alian homon oni simple ne povas supervenki, ja inter li kaj mi troviĝas la nevidebla membrano de la persono. Unu homo pli diferencas de alia homo, ol la homo kiel speco diferencas de la ŝtono.”

”Tion vi probable ne rajtas diri ...” pridubis Duŝan.

”Tamen. De la ŝtono la homo diferencas laŭ sia esenco. Sed la esenco estas pli malalta nivelo de la distingo ol la persono. Se mi konas la esencon de la ŝtono, mi konas ĉiujn ŝtonojn. Se mi konas la esencon de la homo, mi esencnivele konas ĉiujn homojn. Sed se mi konas la personecon de certa homo, mi konas nur tiun homon, ja la personeco troviĝas super la esenco. Esencoj estas inter si kompareblaj, sed personecoj ne. Ili estas unikaj, nekompareblaj, do ili ne povas vetkuri inter si.”

”Bone, se tiel, do la personoj ankaŭ ne povas juĝi unu la alian, sekve ankaŭ ne kondamni kaj puni,” ekideis ĉe Tanja.

”Kompreneble. Ne tekstas senlige: ’Ne kondamnu, por ne esti kondamnitaj!’ (Mt 7, 2) Nur tiu rajtas juĝi kaj puni, kiu konas ĉiun personon pli profunde ol la persono konas sin mem. Tiu, kiu pli klare vidas en ĉiun koron ol ni mem vidas ĉiun en la sia.”

”Do ni forigu la policon, juĝejojn kaj prizonojn kaj lasu krimulojn en libero, ĉu?” pledis por pli da ordo Adela.

”Vidu, unu afero estas malebligi krimon kaj gardi la leĝojn, sed alia afero estas kondamni la homon, kvazaŭ ni povus vidi en lian animon. La polico devas aresti ĉiun, kiu rompas la justan leĝon; la tribunalo devas al la leĝrompulo preskribi punon kaj edukterapion, se lia krimago estis pruvita. Sed ne ni rajtas eldiri la juĝon pri li kiel homo, pri lia supozita kulpo. Same ne ni rajtas lin aflikti, korpe torturi aŭ iel ajn damaĝi lian personon.”

”Do ne ekzistas rajto revenĝi por la krimo?” el Georgo elparolis nedigestita privakera filmo.

”En civilizita ŝtato ne. De la homoj, kiuj ĵuras je Dio, milfoje ne.”

”Kio pri la plej grandaj krimuloj?” ankoraŭfoje hurlis el la hollywooda prerio.

”Ĉu ni scias, kiu vere estas tre granda krimulo? Ni scias pri agoj kaj efikoj. Sed tio ne estas ĉiam en rilato kun la vera kulpo. La plej grandaj krimuloj siajn krimojn tute ne faras, ja ili estas tro kalkulemaj, tro perfidaj por elmeti sin al persekuto. Aliflanke multaj homoj jam estis ĵetitaj en intrigon de la krima ago, kvankam iliaj koroj estis pli noblaj ol averaĝe. Ni havas rajton kompari la agojn de la homoj kun la leĝaj tekstoj

kaj tiri el tio konsekvencojn. Ni rajtas homojn pro ilia kontraŭleĝa konduto devigi al repago kaj al partopreno ĉe eduk-terapioj, sed ni ne havas rajton ilin juĝi kaj kondamni. Tiun povon la homo ne havas super alia homo.”

Silento.

Minuto, du — kun rigardoj surteren.

”Ĉu nun vi komprenas, kial la granda Ĉino diras, ke la noblulo ne vetkuras? De la senkulpa vetkuro al la propravola venĝo estas foje nur unu paŝo. Nur bonvolu rigardi, kiel la sportaj terenoj pli kaj pli fariĝas kanibalaj scenejoj. Eĉ ĉe Helenoj ĉiu olimpiko, kvankam respektanta la interkonsenton pri armistico, efektive estis nur paŭzo antaŭ la sekva milito. Kion diri pri la nuna tempo, kiam eĉ dum olimpikoj eksplodas bomboj kaj krakas maŝinpistoloj ...”

”Tamen io mankis ĉe nia olimpiketo, eĉ se ni ĝin komprenas en via senco,” sentis certan malhavon Adela.

”Diru!”

”Ne aŭdiĝis aklamoj, instigadoj, ne krakis petardoj, neniu trumpeto kaj fajfis, neniu aplaudis ...”

”Ĉu vi opinias, Adela, ke estis tumulto kaj kriado, kiam el la stelaj fajregoj naskiĝis nia planedsistemo; kiam el la unua albumena muko naskiĝis la unua prabesteto; kiam al certa estaĵo defalis vosto kaj fariĝis la homo ... Ĉiuj grandskalaj ŝanĝoj okazas en sankta silento, en mirinda festa trankvilo. Kiam unu homo vetkure leviĝas kontraŭ la alia, tiam konvenas tumulto kaj beste hurli. Tio donis ĉarmon al la romiaj batalarenoj ... Sed kiam iu vetkuras kontraŭ si mem, tiam li lokas sin en tiun okazadon, kian mi antaŭe ilustris, resumante skize nian planedan kaj vivan historion. Por tio konvenas festeca, rita silento!”

VIII.

*Aranĝo kun
laŭvice falantaj domenpecoj
kaj iomete pri tio,
kion signifas la sunsubiro.*

Ili jam asimiliĝis al la maĉado de tritiko kun fruktoj kaj mie lo. Georgo volis ĉimatene iomete prokrasti sian eldormsakiĝon.

”Finfine ni libertempas,” li provis argumentadi favore al pigreco de siaj membroj. Andreo estis nepersvadebla. Li diris:

”Se ni atribuas antaŭrajton al dormado kompare kun vekado, do ni pli ŝatas la foreston de nia spirito ol ĝian ĉeeston. Se ni toleras la letargian insistadon de niaj korpoj por kelkaj minutoj, baldaŭ ni perdos jarojn ...”

Tamen eĉ Georgo devis agnoski al si: ĉi tie, kie pri leviĝo ne

troviĝis mizerikordo, li leviĝas multe pli facile ol hejme, kie li kun sia patrino aranĝas verajn diplomaciajn negocojn laŭ ĝeneva maniero.

”Ĉu vi vidis tion ĉi?” Tanja proponis gazeton al la profesoro.

”Ne, montru!”

Temis pri loka gazeto, kiun niaj filozofoj ĉefe aĉetis por pli facile ĉendi fajron, por involvi forĵetaĵojn kaj similaj uzoj.

”Lernanto de la marista mezlernejo hodiaŭ je la 15-a horo antaŭ la loĝbloko 7. en la strato ”Heroo Krĵiĉ” demonstros faligon de domenkubetoj. D. P. en unu semajno aranĝis en la formo de la silhueto de nia urbo 30.000 da domenkubetoj. Kiam li per sia fingro tuŝos la unuan, ili en bela ondado laŭvice falos, kio por niaj turistaj gastoj sendube estos interesa evento,” laŭte legis profesoro Andreo el la gazeto. Duŝan estis verdire iomete malravita, ke la profesoro pretis laŭte legi tiun infanaĵon.

”Ĉiukaze ni devas tion plej precize spekti!” diris Andreo al la surprizita grupo.

Sinjinorino Majda levis brovojn:

”Do tamen, ĉe ajna hundfrizado ni ne bezonas ĉeesti, ĉu?”

”Sendube ni iros!” restis la profesoro firma, dum li ion umis ĉe la tendoŝnuroj.

”Vi viroj estas eternaj infanoj!” el la buŝo de sinjinorino Majda elparolis la eterna patrino ...

”Tion vi bele formulis, Majda!” Andreo ŝin petole refutis. ”Ĉu vi ne scias, ke ĉion, kio sur tiu ĉi mondo estas bona kaj eminenta, alportis al ni infanoj? Ĉu vi kredas, ke iu serioza homo irus antaŭ tiun sicilian kavon ludi kun trianguloj por atingi genian ideon pri la rilato inter la lateroj kaj iliaj kvadra-

toj? Tion povis fari nur infano Pitagoro. Kaj vi eraras, pensante, ke iu serioza vilulo atingis ideon, ke grandan ŝarĝon oni povus translokigi ankaŭ alimaniere ol ke la tuta tribo ĝin tiru per lianoj ... Estis certe iu infano, kiu rulis ĝin sur arbtrunketo sur la deklivo — kaj li ekhavis ideon pri rado. Kaj ĉu vi vere kredas, ke iu serioza kaj plenkreska homo povus lanĉi kajtojn en la ĉielon kaj eksperimenti per atmosfera elektro? Tion faris infano Benjamin Franklin ...”

La sinjorino jam delonge sciis, ke ŝi ne havas ŝancon pravi kun la profesoro. Nu jes, ankaŭ li estas infano, havanta kaj realiganta ĉiujn rajtojn atribuitajn al infanoj ...

Efektive ne venis tiomaj homoj, ke regus denseco. Ĉi tie kelkiu elementlernejano, tie pensiulo, poŝtisto — kaj nia delegacio. Ja ne okazis io spektinda: knabo en marista ĉemizo venis el vestiblo de sia loĝbloko, rigardis iomete ĉirkaŭ si, paŝis al plato, plena de vertikale starigitaj domenbriketoj, aranĝitaj laŭ la formo de la urba silueto. De iu flanko ekfulmis fotoaparato. La knabo ekkaŭris kaj per la pinto de sia kraĵono tuŝis la unuan domenbriketon. Estis, kvazaŭ vento blovus trans la tritika kampo kaj tritikaj spikoj laŭvice kliniĝus. En kelkaj sekundoj la unusemajna zorgega laboro de la pacienca lernanto falis en etan optikan miraklon.

”Ĉiukaze mi respektas la knabon, kiu uzis tutan semajnon por barakti kun tiuj domenbriketoj, sed tamen, mi ne komprenas, kial ni nepre devis tion vidi?” disravigis la sinjorino Majda.

”Antaŭ sekundoj vi ĉeestis al unu el plej konvinkaj argumentoj por la ekzisto de Dio!” senĉirkaŭire proklamis Andreo.

”Por povi tion digesti, mi devas sidiĝi!” malesperiĝis Adela.

”Mi aŭdis ĉion eblan, sed argumenti por la Dia ekzisto per falantaj domenpecetoj, tion mi ne povas tiel simple gluti!” diris la nekredema Georgo.

Ili iris ĝis la unua restoracio kaj sidiĝis. Antaŭ ol la kelnero ilin rimarkos, ili jam konsumos ĉiujn metafizikajn vojkruciĝojn.

Tanja komencis kun kaŝita timo, ke ĉe la profesoro io ne funkcias orde:

”Sinjoro profesoro, ni atendas, ke vi kontentige klarigu neprecon, pro kiu ni iris spekti la faligon de tiuj domenkvadretoj!”

”Se vi deziras, ni povus vere komenci,” Andreo trankvile diris. ”Imagu, ke vi estas unu el la domenbriketoj, dum ili ankoraŭ staris rekte. Unu el tiuj ie en la mezo. Ĉu vi imagas?”

”Jes!” ili respondis unuvoĉe.

”Se tiel, ni baldaŭ atingos finon. Do, vi estas unu el la domenkvadretoj en tiu longa vico — kaj subite io vin puŝas, ke vi falas. Kaj falante, vi puŝas la sekvan domenkvadreton, do efektive vian kolegon aŭ koleginon, ĝis tiu ĉi ankaŭ falas. Tiom vi scias ĝis nun kaj ne pli. Nun vi komencas pensi. Se la domenkvadreto, kiu falis post vi, falis pro vi, ĉar ankaŭ vi falis, do vi povas kun certeco konkludi, ke ankaŭ vi ne falis el propra movo, sed ke ankaŭ vin faligis la falo de iu domenkvadreto respektive kolego antaŭ vi, ĉu ne?”

”Granda scienco tio precize ne estas!” grimacis Adela.

”Ne miksu grandan sciencon kun komplika scienco! Bone. Mi konkludos plue. Se mi falis pro la falo de la antaŭa domenbriketo respektive kolego, sekve ankaŭ tiu devis fali el la

sama kaŭzo, ĉu? Sed la falado mem tiamaniere ne jam estas klarigita. Tiel mi konkludas de unu domenbriketo al la alia kaj ĉiam antaŭen ... Ĉar antaŭ mi troviĝas, ni diru, 15.000 da tiaj domenbriketoj, tiaspeca konkludado konsumas multe da mia tempo. Finfine mi venas ĝis la lasta specimeno — kaj finfine ĝis la knabo, kiu ĉion aranĝis kaj faligis. Nur konsiderante lian agon mi trovis definitivan respondon. Ne nur al la demando, kial mi falis, sed ankaŭ, kiamaniere kaj pro kio mi en tiu ĉi ludo troviĝis, kvankam mi unue tute ne interesiĝis pri tio. Ĝuste tio estas karakteriza por la homoj ĝenerale. Unue ili ekscitiĝas pri la demando, kial ili falas, nur fine de sia konkludado ili foje atingas la respondon al la demando, kial ili tute ekzistas. Sed, ĉu mi ĉe tia konkludado vere devas konsideri ĉiun unuopan domenbriketon aparte, ĝis mi venas al marista knabo? Ĉu mi ne povas jam post kelkaj specimenoj ĝenerale konkludi, ke senkonsidere pri la nombro de la unuopaj domenbriketoj, je la komenco de la ludo troviĝas la knabo, kiu la tutan ludon starigis kaj poste lanĉis faladon?”

Adela sciis, kien la tuta afero kondukas, do ŝi provis stariĝi por la profesoro etan enfalaĵon:

”Kio, se da tiaj domenbriketoj troviĝas infinito?”

”Nenia problemo,” sur la sama notlinio rekantis al li la profesoro. ”Se tiel, ni povas konkludi jene: Dum mi falas kaj vidas, ke mi ne falis el propra impeto, tio estas por mi argumento, ke la kaŭzo de la falado ne kuŝas en mi, sed ie alie. Ĉu tiel?”

”Jes, bone ...” agnoskis Adela.

”Nu, konkludante pri la domenkvadreto antaŭ mi, tio estas jam la dua kialo, ke la falado ne troviĝas en mi, rolanta domenkvadreton. Se vere ekzistus 15.000 da tiaj domenkva-

dretoj, do mi iom post iom fine kolektus 15.000 da argumentoj por la hipotezo, ke mi ne falas el la kaŭzoj en mi mem, sed pro io, kio troviĝas ekster la falanta vico. Do, se ekzistus infinito da tiaj unu post la alia falantaj domenbriketoj, mi konkludus, ke ekzistas infinito da argumentoj, ke la unua kaj la vera faliganto staras ekster la vico de la domenbriketoj. La infinito ne forigas kaj ne solvas la problemon, ĝi nur infinitigas ĝin! Se la falon de unu sola domenbriketo oni malfacile povas kompreni, do la faladon de infinito da ili oni povas kompreni senfine malfacile! Sed per via demando vi pruvis ankoraŭ ion. La fina nombro de la domenbriketoj nepre supozas homojn, kiuj tiujn objektojn produktis, kaj la knabon, kiu ilin starigis kaj fine faligis — dum la senfino da domenbriketoj senpere demonstrus la ekziston de Dio.”

”Ĉu ne iom tro haste?” pridubis Georgo.

”Nu, ni rigardu!. Se ni imagas infiniton da domenbriketoj, do nenie troviĝas loko por la homoj, kiuj produktas, kaj por la knabo, kiu aranĝas kaj faligas ilin. Se ili ekzistus ili okupus certan lokon — kaj tie domenbriketoj ne povus ekzisti. Ĝuste tio pruvas, ke da domenkvadretoj — kaj da neniaj objektoj — ne povas ekzisti infinito. La vera infinito ne havas lokon por io apuda. Sed, eĉ se la infinito da objektoj ekzistus, daŭre validus la logiko, ke iu devas ilin movi, kiu mem ne apartenas al la senfina vico da domenbriketoj. Temas pri la estaĵo, kiu ne estas limigita tempe kaj loke, kiu ne ’konkurencas’ kun la domenkvadretoj por ilia tempo kaj loko. Al tia estaĵo oni jam dum jarmiloj diras — Dio!”

Jam troviĝante en la urbomezo, ili vizitis iun alian eventon: malfermon de la pentrista ekspozicio en la urba galerio. Iu

legis de sia paperfolio. Koruso kantis tri kantojn. La urbestro solene malfermis la ekspozicion.

Estis unu sola problemo kaj embaraso. La pentraĵoj, pendantaj sur la tolvandoj, estis pentritaj tiel, ke nia grupo vane gapis tien. Neniu bildo sugestis motivon kaj enhavon. Tanja la unua kuraĝis rimarki:

”Bone, sinjoro profesoro, kion tiuj ĉi bildoj verdire prezentas?”

Andreo ekridetis kaj respondis per propra demando:

”Bone, Tanja, kion prezentas finfine vi?”

Ĉiuj interŝanĝis rigardojn.

”Min mem!” fine iel elturniĝis Tanja.

”Kie do vi vidas problemon koncerne la pentraĵojn? Kial ankaŭ la bildoj simple ne povus signifi sin mem?” komentis Andreo. Sed ankaŭ sinjorino Majda ne permesis tiel simple foriri de la temo:

”Ja ĉiu bildo devus prezenti certan objekton, personon aŭ scenon, se temas pri vera bildo. Cetere temus pri simpla surfaco de diversaj koloroj kaj linioj.”

”Al vi do plaĉas, se vi sur la bildo rekonas herbejon, bovinon, birdon, arbon kaj paŝtiston, ĉu ne?”

”Memkompreneble!”

”Sed la sunsubiro al vi ankaŭ tre plaĉas, ĉu?”

”Jes, ankaŭ ...”

”Do, nun bonvolu diri al mi, pri kio la sunsubiro konkrete memorigas, kion ĝi prezentas? Ĉu ĝi similas al certa besto, homo, instalaĵo aŭ konstruaĵo? Ĉu ne estas ankaŭ ĝi simpla kampo de diversaj koloroj kaj kolornuancoj, kiuj signifas nenion konkretan krom sin mem, sed ĝi tamen nin impresigas fortege?”

”Pri tio vi pravas ...” cedis la sinjorino.

”Do ankaŭ la bildo povas elvoki admiron, sen nepre montri ion, kion oni jam konas de aliaj lokoj. Ĝi povas montri ankaŭ tute novan formon aŭ kolorskalton kaj tamen esti arta kreaĵo. Ja bela nuboj ankaŭ estas artaĵoj, kvankam sur ĝi oni ne povas rekoni teleron kun mortaj fiŝoj aŭ narcisbukedon ...”

”Bone, sed kiamaniere post ĉio tio diferencigi verajn artaĵojn disde la malveraj, se oni ne povas ilin plu kompari kun originaj objektoj?” demandis Adela.

”Temas pri tre saĝa demando. Antaŭ iom da tempo ne estis tiel malfacile kritiki. Oni devis nur rigardi, kiugrade pentristo certan objekton ’trafis’. Ju pli la bildo similis al la objekto, ju pli perfekta ĝi estis en la senco de fotobildo, des pli granda ŝajnis la artaĵo. Ĉiu povis partopreni en tiel facila kritiko. Nuntempe, post la eltrovo de fotografio, la afero ne estas plu tiel simpla. Oni devas uzi pli profundan pentroartan sentivon, kiu diras, ĉu temas pri vera oro aŭ nur pri malmultekosta tombako. Risko maltrafi aŭ eĉ rikolti blamon, estas, nature, pli granda, tial multaj sentas antaŭ tia arto embarason aŭ eĉ kontraŭsenton.”

Duŝan ĵus paŝis de iu abstrakta motivo kun lazurkoloraj dentoj:

”La esenco de la arto sekve ne estas imiti, kiel laŭdire instruis Aristotelo, ĉu?”

”Ho, tamen ĝi estas,” respondis la profesoro, kvazaŭ li forgesus pri ĉio, kion li ĵus antaŭe diris.

”Ja vi antaŭe diris ...” rapide intervenis Adela.

”Jes, antaŭe mi diris, ke la esenco de la pentra arto ne estas en tio, ke ĝi sorĉu antaŭ niaj okuloj plenan similecon kun la objekto fenomenoj aŭ personoj, kiujn ni konas en la reala

mondo. Sed tio ne signifas, ke bona pentristo tamen siamaniere ne imitas tiujn motivojn en alta grado!”

”Sed diru, Andreo, nun vi konfuzis ankaŭ min,” protestis lia edzino Majda, ”ĉu la punkto de imitado ne estas ĝuste, trafi la formojn de la originalaĵo?”

”Ne, tio ne estas imitado, tio estas kopiado. Mi donu ekzemplon el la teknika mondo. Kion vi opinias, Georgo, ĉu la aviadila konstruktoro dum konstruado de sia aviadila modelo la birdon kopias aŭ imitas?”

”Klare, ke li ne kopias, ja sekve ankaŭ aviadiloj devus flirti per flugiloj same kiel la birdoj, ili devus pepi kiel birdoj kaj konstrui nestojn kiel birdoj, anstataŭ ripozi en hangaroj ...” ĝercis Georgo.

”Vi bone diris. Aviadilo, kiu provus esti kopio de birdo, estus ege mallerta aparato. La historio de la aviadila evoluo postlasis al ni kelkajn tiuspecajn kuriozaĵojn. Sed sukceson havis nur tiuj modeloj, kiuj ne provis la birdon kopii, sed laŭeble bone laŭesence imiti. Kaj tiel la aviadiloj kun la turniĝanta helico multe pli bone imitas la esencon de la birda flugado, ol tiuj mallertaj kriplaĵoj, kiuj trifoje saltetis duonan metron en alteco kaj poste kolapsis. Se oni bone pripensus ĉiujn grandajn teknikajn solvojn, oni vidus, ke ili ĉiuj sprite imitas la manieron, kiel la saman problemon solvis la naturo. Kaj ĉiam, kiam iu volas la naturon senpene kaj senfantazie simple kopii, lia laboro sinkas en malgloron. Ankoraŭ unu ekzemplo. La veturilo ne havas alian taskon ol la ĉevalo, kiu ĝin tiras: transporti ŝarĝon de unu loko al la alia. Sed imagu, kian monstron oni ricevus, se oni provus simple kopii la ĉevalon, farante ĉaron kun gamboj anstataŭ kun radoj ... Kaj se tiel estas en la mondo de tekniko, kial estu alie en la mondo

de la arto? La pentristoj, kiuj provas ravigi observantojn nur per perfekta simileco de siaj bildoj al la motive uzitaj objektoj aŭ personoj, faras la samon kiel inventistoj de aŭtomobilo per ĉevalaj gamboj anstataŭ kaŭĉukmantelaj radoj. La pentristo, kiu estas vera artisto, objektojn ne kopias, sed resumas ilian internan veron per propraj solvoj. Tiuj solvoj ne estas plu nur aŭ nepre laŭforme similaj al la originaj objektoj, tamen ilin envere multe pli fidele imitas ol tio kion povas fari nur lerta desegnisto, ilin kopianta. Same, kiel nur tiu aparato povas flugi, kiu la birdan flugadon imitas kaj ne kopias, tiel ankaŭ nur tiuj artaĵoj vivas, kiuj la naturon imitas, dum nur morta teknika lerteco ĝin blinde kopias.”

Ili sentis, ke la profesoro pravis. Tamen ne estis facile subite meti sin en tiun novan manieron observi la ekspoziciitajn verkojn. Tanja finis sian ĉirkaŭiron. Ŝi trovis tualetejon, ekstaris antaŭ la spegulo kaj demandis al sia spegula bildo:

”Nu vere: kion efektive prezentas vi?”

IX.

*Malfacilaĵoj kun televido;
filozofoj montriĝas nesatigeblaj riĉuloj;
leciono pri ŝakludo.*

Akvo estis tiel varma, ke ili tuj post la matenmanĝo sin ĵetis en maron. Ĉiuj jam havis bele sunbakitan haŭton, nur Adela aspektis iel ruĝe bruligita. Ŝi ne havis paciencon per sia haŭto kaj per la suno kaj ŝi iomete troigis. La suno ne konsideris multe ŝian puberecan nervozon — kaj ĝi simple bruligis ŝiajn knabinajn ŝultrojn. Verdire tio jam estas pasinto; doloro ne plu troviĝas, nur la haŭtkoloro ne tro konvenas. Ankaŭ tio venos.

Subite iu estaĵo komencis sur unu piedo salteti direkte al dunoj. Estis Tanja, kiu tretis ekinon. En ŝia pieda dikfingro troviĝis nigra punkto — injektilo de la ekinata sindefenda arzenalo ... Ili kunvenis ĉirkaŭ la malfeliĉulino. Sinjorino Majda jam prenis el sia korbo pinĉileton, nadlon, fajrigilon. La ope-

racio estis baldaŭ finita kaj la societo sidiĝis ĉirkaŭ la torpedita dikfingro de Tanja.

”Ĉu ni ne fartas spite al ĉio ege bone?” ekmeditis la profesoro.

”Io tamen mankas!” diris Adela.

”Mankas, ĉu?”

”La televidilo!” ŝi klarigis.

”Ni povus ĝin simple kunpreni, ie ni certe ĝin trovus, tian je akumulatora nutrado,” estis entreprenema Duŝan.

”Tio eble funkcius,” diris Andreo. ”Ni ĝin certe ie trovus, sed mi pensas, ke estas ĝuste, ne havi ĝin ĉi tie.”

”Nun vi estas eĉ kontraŭ la televidon ...” volis polemiki Adela. ”Ĉu ni faris monakajn promesojn ...”

”Aĥ ne, neniuj estas kontraŭ la televidon. Nur lige kun tio troviĝas certaj malfacilaĵoj. Cetere ni povas tuj mem konvinkiĝi!” respondis la profesoro.

”Kiamaniere ni povas pri tio konvinkiĝi?” diris Tanja.

”Ni bezonas tre fortan lornon. Ni iru al niaj tendoj, eble ni ion konvenan trovos.”

Ili paŝis inter la arbojn, kie staris iliaj du tendoj. La profesoro enketis, kie trovi lornon.

”Mi havas la solvon!” ekkriis Duŝan.

”Diru!”

”Sur mia filmokamerao mi havas tri objektivojn. Unu el ili estas 200 mm teleobjektivo, kiu povas uziĝi kiel lorno.”

”Racia solvo, alportu!” Andreo ĝojis. Al sinjorino Majda ĉio tio ne tro plaĉis, ja ŝi vidis neniun ligan inter la diskuto pri la televido kaj tiu ĉi lornoserĉado. Sed ŝi sciis, ke rilate Andreon estas pli bone pacience atendi. Ĝis io elĝermos.

Intertempe Duŝan jam aperis kun sia kamerao. Ĝian turno-

platan objektivon li turnis tiel, ke oni tra la serĉfenestreto povis vidi malproksimajn objektojn tute proksimaj, same kiel ĉe vera lorno.

”Nun ni faros eksperimenton,” anoncis la profesoro.

Li vokis Adelan kaj taskigis al ŝi fermi la maldekstran okulon kaj per la dekstra rigardi tra la objektivo. Kiam ŝi tion faris, li ordonis, ke ŝi malrapide paŝpaŝe proksimiĝu al la boato, kiu kuŝis kvindek metrojn fore en sablo. Adela vere ekpaŝis, sed ŝiaj paŝoj estis malcertaj, tre malcertaj. Ŝi balancis tien reen — kaj post kelkaj aldonaj paŝoj ŝi haltis kaj sidiĝis teren, ĉar alie ŝi estus falinta.

La profesoro igis eksperimenti ankaŭ ĉiujn aliajn, sed neniu sukcesis veni pli foren ol Adela.

”Bone, sed kian ligan tio ĉi havas kun la televido?” tute konfuzita demandis Adela.

”Vi mem vidis, ke kun lorno surokule oni ne povas marŝi en tiu ĉi mondo. La rilatoj inter la objektoj, kiujn starigas la lensoj en la aparato, estas tiaj, ke ili malkongruas kun nia praktiko, kun niaj spertoj — tial ni ne povas plu ĝuste orientiĝi en la spaco, kaj ni falas.”

”Interese, sed kio pri la televido?” insistis Adela. Se ŝi jam estis poreksperimenta kuniklo, ŝi almenaŭ volis ekscii la rezulton.

”Ĉu ne alportas la televidilo en niajn ĉambrojn scenaĵojn el plej grandaj malproksimoj? Ĉu tio ne estas la plej forta teleskopo, kiujn la homa cerbo iam inventis? Oni sidas en sia ĉambro kaj tute akre vidas la bildon, kiamaniere ie en Azio la fremda soldato pafas senkulpan vilaĝanon; kiamaniere en Sudameriko la policistoj iun homon arestas kaj turmentas; kiamaniere en orienta Eŭropo la alia polico pri iu enketas ...

Kaj kiam oni ĉion tion tiel deproksime rigardas, ĉu oni ne ricevas impreson, ke tio estas la propra afero, pri kiu oni plene respondecas kaj povas multon interveni? Sed kiam ĉesas la dissendo, kiam oni foriras en la ĉiutagan vivon, ĉu oni ne ricevas la saman senton, kvazaŭ marŝi kun lorno surokule? Neniu afero plu estas en ĝusta proporcio, ĉiu objekto estas necerta, same kiel la trompa bildo surekrane. Ĉar la ekrana bildo vin narkotis kaj sugestis al vi kredon, ke vi povas ion entrepreni en Azio, vi subite fariĝas malkapabla fari ion realan en propra vilaĝo. Ĉar vi respondecas pri la revolucio en Latinameriko, vi fariĝas indiferenta pri la malpura aŭtobusa stacio en propra urbo ... Same, kiel sub la efiko de la lorno ŝanceliĝas viaj gamboj, tiel subefike de la televido ŝanceliĝas via spirito. La lorno vin trompas, ke la objektoj estas tute ĉemane kaj tial vi perdas ekvilibron. Sed la televido vin trompas, ke ĉiuj okazintaĵoj kaj movadoj en la tuta mondo troviĝas en la regiono de via respondeco, kono kaj intervenopovo. Tial vi iom post iom perdas vian psikan ekvilibron kaj transformiĝas en pasivan observanton, kiu senkritike suĉas ĉion, kio flirtas surekrane. Anstataŭ mem vivi, vi spektas, kiamaniere oni vivas en Florido aŭ en Parizo aliaj personoj. Anstataŭ mem ribeli kontraŭ maljusto, vi surekrane akompanas malproksimajn ribelojn kaj revoluciojn.”

”Mi esperas, ke tio ne anoncas detruon de ĉiuj lornoj kaj teleobjektivoj, ektimis pri sia Tessar Duŝan.

”Kompreneble ne. Eĉ la televidilon ni povas senzorge posedi en niaj domoj. Sed tiel, kiel ni nur esceptokaze rigardas tra la lorno, same nur esceptokaze havas sencon spekti televidan programon. Ni ne permesu, ke la maŝineto nin supersorĉu. Dum tuta tempo de nia spektado ni devas konscii, ke

ni spektas tra la objektivo, kiu ne estas parto de ni. Ni mem vidus la saman aferon alimaniere, se ni mem tie troviĝus,” trankviligis la situacion Andreo.

Post la tagmanĝo neniu ekhavis konvenan ideon, kion fari. Sur la vando de la gazetara kiosko afiŝo invitis: Ŝaksimultana matĉo de la internacia majstro Teplov kun 25 plej bonaj ŝakludantoj el nia komunumo ... Nu, tio povus esti io ne ekstreme enua por hodiaŭ. En la granda hotela salono, kien cetero venas sidi eksterlandaj negocistoj, sportorganizantoj kaj foje kulturorganizantoj ...

”Ĉu la ŝako havas rilaton kun la filozofio?” palpe demandis Duŝan, sekvinta sian intereson kiel ĉampiono de la lernejo.

”Depende de la aspekto,” respondis la profesoro. ”Se vi prenas ĝin kiel dimanĉan distron, la ligo kompreneble ne ekzistas; sed se vi komprenas ĝin kiel certan tension inter la hazardo kaj tendenco, inter tio, kio estas ebla kaj tio, kio estas efektiva, do, tiam la ŝako eĉ povas esti bona filozofia maŝino.”

Tio signifis, ke la motoro baldaŭ komencos heni kaj ĉiuj veturos en la urbon spekti tiun matĉon de unu kontraŭ 25.

”Principe ne plaĉas al mi, se iu, kiu suverene regas certan disciplinon, kiel koko sur sia sterkoamaso volas vetkuri kontraŭ la amaso de aliaj, kiuj ne atingas lian nivelon. Sed min allogas io alia. Mi volas, ke vi ĉiuj en tiu ĉi ludo ekkonu ion, kio situas tute ekster de la ŝaktabulo mem!” ankoraŭ diris Andreo, jam pesante en sia mano aŭtoŝlosilon.

Ili veturis preter luksaj vilaoj, ĉirkaŭitaj per flegitaj ĝardenoj. Antaŭ ĉiu el ili brilis aŭtomobila lado, ĉe multaj domoj kuŝis sur apogtrabaroj motorjaktoj foje ne malpli kostaj ol la

domoj. Ne estis dubo: la tajdo puŝis plaŭde surborden ankaŭ riĉecon. La suno ne helpis en kresko nur ĝardenajojn, fruktarbojn kaj arbedojn, sed ankaŭ monkapitalon en bankoj.

”Verdire, kiom havu la homo, kiu serioze volas okupiĝi pri filozofio kaj vivi laŭ ĝiaj kriterioj?” diris Tanja post tiu paŝtado de okuloj sur la riĉeco, altajdita de la maro kaj de la suno.

”Se li havas multe, tio ĉiuokaze ne sufiĉas,” respondis Andreo; se li havas malpli, tio jam signifas ion pli — sed mi rekte asertas, ke li, simple, devas havi ĉion!”

”Se iu tion komprenas, mi pretas lin preni por edzo!” sputiĝis el Adela.

”Ne diru dufoje!” proponis sin Georgo.

”Vi povas libere diri dufoje,” ridetante respondis la profesoro. ”Jes, mi scias, ke estis iomete strange dirite kaj ke unuavide la kapo ne diferenciĝas de la plandoj ...”

”Do, sinjoro profesoro, trankviligu nin finfine per io pli klara!” estis sufiĉe ankaŭ por sinjorino Majda.

”Unue mi devas klarigi, kion mi opiniis per la vortoj: havi multe estas tro malmulte — havi malmulte estas jam havi ion pli. Unuavide nelogike kaj neeble. Bonvolu tamen konsideri, ke oni atribuas al la vorto ‘havi’ diversajn signifnancojn. Mi pensas tiel: ju pli da diversaj objektoj oni havas, des malpli oni el ili unuope havas. Se oni teorie havus senfine da aferoj, por ĉiu unuopa disponiĝus senfine malmulte da tempo kaj ebleco ĝin vere havi. Poligamiulo havas de ĉiu sia unuopa edzino malpli ol monogamiulo de sia unusola. Tial mi diris, ke pli distancas de la filozofia idealo tiu, kiu havas pli ol necese multajn aĵojn, ja li de ĉiu el ili apenaŭ ion povas havi, ĉar li devas dividi sian tempon por ili ĉiuj. Jam en pli bona situacio troviĝas tiu, kiu havas nur malmulte da aĵoj, ja li povas

por ĉiu unuopa de ili dediĉi pli da tempo kaj energio, li do pli 'havas' ĝin — kaj sub la fina kalkullinio li havas ĉiuaspekte de sia havaĵo pli.”

Georgo ne povis tute akcepti la ideon:

”Ĉu ne estas finfine egale, ĉu oni havas multajn havaĵojn pli malpli pretere, aŭ malmultajn pli malpli intense? Mi eĉ dirus, ke la vivo en plureco, en pitoresko tamen estas pli interesa ...”

”Tiu,” redonis la pilkon Andreo, ”kiu volas trovi la veron — kaj tio estas la afero de la filozofio — devas procedi tiel, kiel faras serĉantoj de nafto. Ili ne komencas bori ĉiam aliloke, se ili post kelkaj metroj ne tuj trovas la serĉatan substancon. Ili boras kelkajn cent metrojn sur la sama loko. Nur profundaj boraĵoj donas nafton, nur profunda fosado donas bonan rikolton — kaj ĉu ĝuste filozofoj kuru kiel obseditaj de unu objekto al la alia kaj leku ĝian eksteran aperon kaj diferencon pitoreskon. La supraĵa homo serĉas tion, en kio la aferoj diferencas — dum la filozofo finfine serĉas tion, laŭ kio ĉiuj aferoj similas aŭ eĉ identiĝas.”

”Ni diru, ke ĝis tiu ĉi punkto ni povas vin kompreni. Sed kiamaniere klarigi al si vian aserton, ke plej bone tamen estas, havi ĉion. Ne preskaŭ ĉion, sed ĝuste ĉion ... Ĉu tio ne kontraŭdiras tion, kion vi ĵus antaŭe diris?” malesperiĝis Duŝan.

”Kompreneble, ke kontraŭdiras. En tiu senco, kiel 'pli bone' kontraŭdiras al 'bone'.”

”Bone, eĉ tion mi povas iel kompreni,” diris Georgo, ”sed kial damne, la vivo ju pli kongruas kun la filozofia idealo, des malpli da aĵoj oni havas, ĉar la profundeco de tiu 'havi' kreskas — dum aliflanke, la plej alta kongruo ne troviĝas, kiel oni

devus konkludi laŭ via logiko, se oni posedus nur plu unu solan aĵon, ĉar tiam oni sin povus komplete dediĉi nur al ĝi, sed oni, kiel vi diris, posedu ĉion. Tion mi vere ne povas kompreni, diru kion vi volas!”

”Ne estas tiel katastrofe, kiel al vi ŝajnas. Pli poste vi vidos, ke via ’unu aĵo’ kaj mia ’ĉio’ eĉ ne estas en tioma kontraŭdiro, kiel unuavide aspektas. Sed portempe ni lasu tion. Mi volas bazmasoni la tezon de iu alia flanko. Vi verŝajne agnoskas, ke la plej multaj konfliktoj kaj luktoj inter la homoj estiĝas tial ke unuopaj homoj aŭ homgrupoj opinias, ke nur malgranda parto de la mondo apartenas al ili, dum ĉio alia apartenas al aliaj homoj. Se ili volas sian posedon pligrandigi, kio estas la natura deziro de ĉiu homa estaĵo, ili devas per ruzaĵo aŭ per perforto certajn aferojn forpreni de aliaj. Sed la homo, kiu uzas en sia vivo ruzon kaj perforton, ne sidas en la ĝusta vagono survoje al filozofia idealo. Aliflanke ankaŭ tiu, kiu cetere volus vivi laŭ la instruoj de la filozofio, ne povas ŝanĝi la homan naturon kaj ĝiajn rajtojn. Ankaŭ al li lia naturo flustras, ke li havas rajton ne nur posedi certan limigitan kaj laŭleĝe atribuitan parton, sed senrezerve kaj senlime ĉion. Tiu, kiu volas vivi filozofie — kaj tio ankaŭ signifas, kongrue kaj en paco kun la aliaj homoj kaj al sia kaj ilia naturo, tiu verdire devas posedi ĉion. Ĝis kiam li ne havos ĉion, daŭre ekzistus kialo por la konduto kaj agado, kiuj ne kongruas kun la filozofia saĝo.”

”Dio mia, mi freneziĝos!” ekflirtis per siaj haroj la sinjorino. ”Kiamaniere eĉ tiel granda filozofa havu ĉion, se ni estas ses miliardoj kaj ĉiu el ni jam kelkion havas?”

”Tio estas la plej malgranda el ĉiuj obstakloj por ke certaj homoj havu ĉion!” ne permesis sin ŝanceli Andreo.

”Diru do, kiamaniere!”

”Ni havas, ni diru, nian fraŭlinon Adela kiel koleginon, ĉu ne? Kaj en tiu ĉi eco ni havas ŝin tuta, ne nur poparte, ekzemple nur ŝian kapon, kvankam ĝi iel utilas ĉe filozofiaj okupoj, ĉu ne?”

”Jes, vi pravas, ni havas ŝin tuta!” ili ridete respondis laŭvice.

”Sed iliaj gepatroj ŝin havas kiel filinon, ĉu ne? Kaj ili ne havas ŝin nur parte, ekzemple nur ŝiajn manojn, kiuj povas utili ĉe certaj laboroj en kuirejo, ĉu?”

”Jes, ĝuste tiel estas!” gaje kapjesis ŝiaj kolegoj, dum Adela iel embarase retiriĝis, nepropravole fariĝinte objekto de filozofia argumentado.

”Ĉu ni povas el tio konkludi, ke oni ne devas objekton de havado dispartigi, kiel proponis la mensoga patrino antaŭ la Salomona tribunalo, sed oni ĝin povas havi samtempe kun la sama havado flanke de aliaj, ĉu?”

”Mi opinias,” nun aŭdiĝis Adela mem, ”ke temas pri vortluda truko. Havi ion tiel, kiel miaj gepatroj min havas filino aŭ vi havas min koleginon, estas nur io, kio okazas en la kapo aŭ eble eĉ en la koro, sed tio ne estas io reala. Dume, vere havi, signifas efektive posedi, kaj tion ĉe la sama objekto ne povas fari pluraj samtempe.”

”Interesa interveno, Adela!” laŭdis la profesoro. Tio signifis, ke Adela eraras, sciis ĉiuj, Adela inkluzive. ”Mi tamen pensas, ke iu ajn formo de ’havi’ okazas nur en la kapo kaj foje en la koro kaj neniam korespondas kun realo.”

”Tamen,” kontraŭargumentis Adela, ”pri vera havaĵo vi povas disponi kaj tio estas io reala!”

”Bone, Adela, ni prenu simplan ekzemplon. Vi veturas en

aŭtomobilo, kiun vi havas, ĉar ĝi estas ĉiuaspekte via. Vi realigas tiun posedon tiel, ke vi pri ĝi vere disponas, ĝin manipulas, ke vi ĝin stiras. Sed vi havas ankaŭ domon. Tion vi realigus tiel, ke vi en ĝi loĝus, ĝin diversmaniere uzus kaj probable per ĝi manipulus. Sed en la tempo, kiam vi stiras vian aŭton, vi ne povas loĝi en via domo kaj uzi ĝin kaj tiel efektiviĝi vian posedon de ĝi. Sekve, laŭ via kriterio, la domo en tiu tempo ne estus vere via. Kompreneble la domo ankaŭ tiutempe estas via havaĵo. Sed la fakto, ke vi la domon havas, ne tuj signifas, ke vi pri ĝi plene disponas. Paralele vi efektive disponas pri multaj aferoj, kiuj tute ne estas via propraĵo. Kaj, pripensu, kiamaniere vi 'havas' vian domon tiam, kiam vi ne disponas pri ĝi, sed pri io alia, kio nek estas la domo, nek estas via propraĵo? Evidente tiel, ke vi konceptas ĝin via havaĵo. La vera temo de la ago 'havi' do ne estas disponado, ja ĝuste koncerne disponon diversaj objektoj ekskluzivas unu la alian, sed konceptado. Se mi diras, ke ĉio estas mia havaĵo, tio certe ne signifas, ke mi povas pri ĉio disponi, ja mi eĉ ne povas disponi pri ĉio, kio ankaŭ formale, laŭjure estas mia propraĵo. Tio nur diras, ke ĉio senrezerve apartenas al mi. Alia afero estas, ke mi pri ĉio tio ne povas senkondiĉe disponi. Mi havas mian tutecan propraĵon dise en la mondo kaj eĉ dise en la tuta kosmo. Mi havas nafton en Arabio, tritikrezervojn en Usono, vinkelojn en Francio, teon en Londono, diamantojn en Transvalo ...”

”Pa, tio estas fascina afero!” ironiis Adela. ”Laboristoj povas ĉesi per sia movado kaj fermi sindikatojn. La kapitalon de iliaj entreprenoj kaj laborejoj ja ne havas nur plu kapitalistoj, sed ankaŭ ili mem, eĉ ĉiu el ili havas ĉion, ne nur la tutan entreprenon, en kiu oni estas dungita, sed ĉiujn entreprenojn

en la mondo. Bone, ili ne povas pri ĉio tio disponi, sed ili tion havas ... Por tiu spritaĵo la financaj baronoj superŝutus vin per vera oro, pri kiu vi povus eĉ efektive disponi!”

”Jes, vi pravas, financaj baronoj tion povus fari, ĉar al ili mankas saĝo. Sed verdire nur la tezo, laŭ kiu ĉiu estas propriulo de ĉio, faras el ekspluatado la plej akran problemon. ‘Havi’ kiel fenomeno tuŝas du mondojn: tiun eksteran en la objektoj kaj la internan en ĉiu homo aparte. Al la homo jam per la pura fakto, ke li naskiĝis, apartenas la tuta mondo. La mondon vi ne povas dispecigi, ĉar ĝi funkcias nur kiel tuto. Ĉu oni donu dezertojn nur al Araboj kaj fekundajn vinberejojn nur al Francoj? Tial al ĉiu novnaskito apartenas la tuta kosmo. Sed oni la mondon ne povas dispecigi nur pro moralaj motivoj, sed ankaŭ pro ĝia naturo. Mi estas la posedanto de la tuta kosmo ankaŭ tial, ĉar la tuta universo, ekde la planedo Tero ĝis la plej profundaj galaksiaj senfinoj efektive konsistigas mian grandan korpon. Kial? Ĉu ekzistas materia limo inter mia haŭto kaj aero ĉirkaŭ ĝi? Maldenso de la aero kaj relativa kompakto de mia organismo kaj aliaj solidaj objektoj estas iel ‘reala’ nur en nia homa dimensio kaj perceptokapablo. Se ni povus malgrandiĝi ĝis la dimensio de atomoj, la diferencon inter la homa korpo kaj la aero ekster ĝi, ni ne povus rimarki. La atomo de karbono kiel partiklo en mia korpo estas samtipa aĵo ol la samelementa atomo en la aero ekster mi. Kie do troviĝas la ekzakta limo inter mia korpo kaj mia ĉirkaŭaĵo? Por niaj supraĵaj sensoj tiu ĉi limo verdire evidentas, sed por la fizikscienca rigardo ĝi ne ekzistas. Por la fiziko ekzistas unu sola grandega korpo de la universo, kies limojn ni ĝis nun ne jam tuŝis. Tio, kio faras limojn, estas la spirito, estas la spiritaj konceptoj, sed korpo estas unu

sola kaj ni ĉiuj estas nur ĝiaj aŭtonomiaj partoj. Ni ĉiuj, la tuta homa raso, estas nur pluraj kapoj de la sama giganta drako. Ĉiu el tiuj ses miliardoj da kapoj havas sian konscion kaj sian liberan volon, sed la drako estas la sama. Sekve ĉiu el la unuopaj kapoj tenas la tutan drakan korpon propra, sen tiel ĝeni la aliajn, koncepti same.”

”Kaj kian utilon de tiu ĉi konceptado havas la laboristaro?” socialistis Georgo.

”Se la tuta kosmo estas mia pli vasta korpo, sekve ne estas indiferece, kio al tiu korpo okazas. Diru al mi, Georgo, ĉu vi konas homon, kiu manĝas tiamaniere, ke kelkaj korpopartoj ricevas ĉiujn bezonajn substancojn, dum la aliaj devus malsati kaj tiel iom post iom kaduki?”

”Tian digestan strangulon mi, kompreneble, ne konas.”

”Adela, eble vi konas iun homon, kiu dumvintre zorge kovrus sian kapon, sed siajn piedojn li lasus nekovritaj, pensante, nu, la piedoj, tio efektive ne plu estas mi ... Ĉu?”

”Mi iel oblikve lin alrigardus, se tia ulo troviĝus ...”

”Kiel vi mem vidas, ni zorgas por nia korpo kiel tuto. Ni aranĝas ĝian reĝimon iusence laŭ la komunisma principo: ĉiu funkcio laŭ siaj kapabloj kaj eblecoj — kaj ĉiu ricevu laŭ siaj bezonoj! Se mia maldekstra mano rompiĝas kaj ne povas plu labori, mi ne ĉesas ĝin nutri kaj prizorgi, ĝuste kontraŭe! Ĉu ne estas klare, ke ni ankaŭ nian grandan korpon, la planedon, kaj iam poste eble eĉ la tutan kosmon, traktos kaj prizorgos laŭ tiu ĉi principo nur tiam, se ĉiu ĝin sentos kaj konceptos propra korpo? Ekspluati aliulon laŭ tio signifus — ekspluati sin mem. Torturi aliulon kaj lin mortigi signifus efektive — torturi kaj mortigi sin mem. Tiusence la problemaro, kiu ĝis nun koncernis iun foran fremdan mondon, subite fariĝas mia

propra problemaro, koncernas la saman mondon, kiun ankaŭ la mio surloĝas, eĉ pli, koncernas mian propran pli larĝan korpon. Tiel la malsato en Afriko fariĝas ankaŭ mia malsato. Atomeksperimentoj ne kontaminas plu nur fremdajn dezertojn kaj oceanojn, sed mian propran tutecan korpon. Verdire, en la momento, kiam mi sukcesas ĉion percepti mia propraĵo, kiam la tuta kosmo fariĝas mia giganta korpo, mi komencos kontraŭ la tuta medio kondukti kiel interesita mastro kaj ne kiel pigra luanto. Por la tuta atingebla mondo, kiu pere de tekniko kaj sciencoj fariĝas ĉiutage pli granda, mi penas realigi same racian kaj justan reĝimon, kiel estas tiu en mia individua eta korpo. Same kiel la cerboĉeloj, respondecaj por kunordigi la funkciadon de mia korpo, estas je sama dispoŝo por ĉiuj periferiaj ĉeloj kaj organoj, ke la organika kibernetikiko tuj enŝaltas helpon, se ie ajn estiĝas problemo, samtiel mia racio kaj la konsiliĝo de ĉiuj individuaj racioj, senegoisme en deĵorgardado por la intereso de mia kaj nia tuteca kosma korpo. Same tiel, kiel mia eta korpocerbo ne silentigas la doloron de certa korpoparto, sed reagas je ĝi per tuja helpo kaj interveno, tiel ankaŭ la dolorojn en nia giganta korpego — ni diru, la kriojn de la humiligitaj kaj prirabitaj individuoj kaj popoloj, kaj ankaŭ protestojn de pli saĝaj kaj antaŭvidemaj homoj — oni ne silentigu per la aspirino de la cenzuro kaj teroro aŭ per mensoga propagando kaj falsifikado de faktoj, sed ni devas la problemojn solvi. Ĉu vi do ne havas impreson, ke la mondo estus multe pli bone aranĝita, ke en ĝi troviĝus multe pli da justo, se pli multaj sciis, ke ĉio apartenas ankaŭ al ili, al ĉiu unuope, al ĉiu ĉio; ke ili pri ĉio respondecas, ke ĉio konsistigas ilian ĝeneralan korpegon?”

Post tiuj ĉi vortoj Andreo komencis serĉi parkejon. Io ŝajnis stranga.

”Ĉu vi ne rimarkis, ke ni dumtempe jam trifoje ĉirkaŭveturis la tutan urbon, ĉar vi tiel perdiĝis en viaj vortoj?” tiklis lin sinjorino Majda.

Evidente la simultana ŝakludo jam venis ĝis sia duona stadio. Sur ĉiuj 24 ŝaktabuloj venkis la provokinto, nur sur unu okazis pato. La ludintoj silente enmiksiĝis inter aliajn spektantojn. Demonstristo sur granda panelo ripetis ĉiun ŝakmovon. Tiu, kiu atingis paton, estis la ĉampiono de la regionaj kluboj.

Kompreneble, la fino estis ĝuste tia, kiel anonciĝis jam dekomence. La provokinto venkis sur 24 tabuloj, sur unu li devis cedi pate. Post la matĉo la internacia majstro Teplov respondis al la demandoj de la ĵurnalistoj kaj de la spektantoj. La spektantoj demandis pri tiuj kutimaj duonstultaĵoj kaj kuriozaĵoj pri kiuj interesiĝas la prisensacia gazetaro. Post momento de silento, Andreo levis sian manon.

”Majstro; mi ne estas bona konanto de la ŝaka ludo kaj tial mi eble iomete naive demandas, se mi rajtas ...”

”Bonvolu, sinjoro, ankaŭ mi ne respondas ekstreme saĝe ...”

”Jen, tio ĉi min interesas: Ĉu estus eble, ke inter tiuj 25 viaj kontraŭludantoj sidus homo, kiu komprenus pri la ŝaka ludo nur tion, kien oni povas movi unuopajn figurojn, sed efektive li ne scius ludi — kaj li tamen gajnus la partion, ĉar hazardo lin favorus kaj li hazarde movus siajn figurojn tiel, kvazaŭ lin gvidus lia faka kompetento?”

”Ne, neniu povas supervenki bonan ŝakludiston, se li ludas nur hazarde. Hazardo povas favori nur unu el du same ne-

kompetentaj ŝakludistoj, sed luktante kontraŭ la racio kaj scio, hazardo ne havas ŝancon.”

”Do laŭhazarde oni eĉ ne povas plekti sistemon de bonaj movoj, ĉu?”

”Apenaŭ kredebla estas laŭ pura hazardo jam unu sola iel bona movo. Ne valoras paroli pri la tuta sistemo de bonaj movoj ...”

”Dankon, majstro, tion mi volis aŭdi!”

Ili forlasis la hotelon. Ili sidiĝis en la parko, aranĝita apud la konstruaĵo.

”Nu, mi scias, kial vi demandis ĝuste pri tio kun la hazardo ...” diris Adela.

”Ĉu vere?”

”Vere, vere! Vi volis per tio diri proksimume jenon: Se jam tiel simpla ŝakpartio povas esti nur rezulto de la klara inteligento, plano kaj alcelitaj decidoj, kiamaniere do la naturo, estante senfine pli perfekta ol eĉ tiel komplika ŝakpartio, povus esti produkto de la pura hazardo ...”

”Vi pravas, Adela, ĝuste tion ĉi mi volis per tio esprimi. Sed la afero vin ŝajne pli tiklas ol oni imagas unuavide. Bonege, brave!”

X.

*Pri tio, kiamaniere Adela volis
frekventi nudistan plaĝon;
ĉu Dio kubĵetas ...*

Dentobrosoj, plenaj de ŝaŭmiĝinta pasto, moviĝis supren, suben inter la gingivoj. La broso de Tanja, de Duŝan, de Adela, de Georgo, la broso de sinjorino Majda kaj de la sinjoro profesoro. La origina peko de la blanka pano, kiel diras medicino, kaj de bonbonoj. Iun tagon Eva, kvazaŭ la homa gento ne jam sufiĉe suferis pro ŝia pomo, prenis el la forno molan blankan panon — kaj de tiu tempo ni estas forpelitaj ankaŭ el la paradizo de sanaj blankaj dentoj — en la valon de la ĉiutaga brozado kaj porokaza borado ...

”Ĉu ne domaĝe,” tute el sia pastoŝaŭmo diris Adela, ”ke oni ne povas sin tute disponigi al la suno? Mi opinias, ke la hontosento pri propra korpo ne nur ne estas malpli sana, sed eĉ malpli kongrua kun la filozofio, se ni jam pri ĝi okupiĝas ...”

Aliaj iomete interŝanĝis rigardojn, sed la profesoro trankvile respondis, ke Adela tute pravas kaj ke vere ne sencas honti pri propra korpo. Tanja elsub sia ruĝiĝo demandis: ”Ĉu vi intencas nin konduki al la nudisma plaĝo?”

”He, tio estus unuaranga afero!” jam entuziasmiĝis Georgo.

”Se mi diris, ke ni ne bezonas honti pri niaj korpoj, mi per tio ne jam diris, ke estus bone tuj seniĝi de ĉiuj vestoj antaŭ publiko!” diris la profesoro.

SinJORINO Majda ŝmiris ion sur pantranĉaĵojn, venteto ludis per bankalsonoj, kiuj sekiĝis sur ŝnureto. La suno tuŝis la unuajn pintojn de pinoj. Strange. Ĉiuj aĵoj en la naturo verdire estas nudaj; tiaj, kiaj ili simple estas. Nur la homo sentas bezonon ion surmeti.

”Pri kio do ni hontu, se ne pro propra korpo, ke ni tamen ne estu nudaj?” demandis sinJORINO Majda, kiam ŝi viŝis tranĉilon ĉe sia lasta pantranĉaĵo.

”Probable ne la honto estas, kio nin metas en pantalonojn ...” diris Georgo.

”Bonvolu sendi nian koleginon Adela sen ĉio en urbomezon, kaj vi vidos ŝian hontosenton!” diris Andreo.

”Bone, se jam temas pri la honto — pro kio oni hontu, se ne temas pri la korpo?” iel indiferece aldonis Adela.

Dum certa tempo neniu sin esprimis, poste la profesoro komencis paŝi ronde ĉirkaŭ la tendoj, kiel li kutimis, se li volis sin prepari por certa temo. Li spiris iomete pli profunde, li rigardis ien al horizonto, kvazaŭ li atendus la solvon de tiuj montoj. Poste li komencis per obstino de fosisto kaj per prudento de detektivo starigi demandon post demando, ĝis la disĉiploj efektive mem trovu respondon al sia demando. Kaj tiun metodon, ke li ne metis sian respondon antaŭ iliajn piedojn, sed ili sub lia akompano mem trovis ĝin, ili pli kaj pli aprezis, konsciante, ke surtabligita vero baldaŭ fuĝas el homa

memoro kaj malpli lin tenas ol tiu, kiun oni atingas sur la dekliva pado mem.

”Bone. Diru al mi, ĉu elektronika inĝeniero hontus pri elektronika valvo, kiu disponus pri kelkmil kontaktiloj ĉepiede — kompare kun kvin ĝis ok kontaktiloj, kutimaj?”

”Tian valvon oni ne povas produkti!” diris Duŝan, mem radioamatoro.

”Tamen ĉiu el niaj nervĉeloj estas tia elektronika valvo, kun centmiloj da kontaktoj. Ĉu fakulo pri kibernetiko hontus pri roboto, kiu 639 musklojn kaj 206 ostojn akordigus al kelkcent movdirektoj, ja ĝisnunaj aŭtomatoj povas moviĝi nur al kvar direktoj ...”

”Tio signifus, produkti roboton, kiu povus flegi bebon!” ekmiris sinjorino Majda.

”Kaj tamen tio estas unu el ne tro postulemaj programoj de nia vegetala nervsistemo. Sed kion diri pri komputilo kun 14 miliardoj da elementoj, el kiuj ĉiu povas registri dudek milo da informoj, kombineblaj je dekmil manieroj? La tuta nombro de eblaj kombinoj estas proksimume centoble pli granda ol la nombro de atomoj en nia sunsistemo. Kaj apud tiu ĉi komputilo sen komparo funkcias ankoraŭ cent trilionoj da memstaraj mekanismoj, kiuj regulas la vivon de unuopaj ĉeloj. Kiu mondkonata firmao, kiu produktas komputilajn sistemojn, hontus pri tia atingo, kiu apud ĉio ne pezas pli ol du kilogramojn kaj uzas nur kelkajn vatojn da energio?”

”Estas granda demando, ĉu iam ajn oni povos ion tian produkti per homaj rimedoj,” dubis Georgo.

”Tamen ĝuste tia estas jam tute averaĝa, eĉ ne speciale sagaca homa cerbo. Ni disponas do pri aparato, kiu jam en sia origina stato, do malsolida kaj facile vundebla, super ĉiuj

komparoj superas la tutan homan scion kaj fareblon. En tiu ĉi aparato estas, kiel en futureca sciencfikcia filmo, kaptita spirito, kiu pliparte vivas ankoraŭ en ŝtonepoko; kiu eĉ proksimume ne estas same sagaca, kiel estas sagaca la plej malgranda piedfingro; eĉ proksimume ne tiel nobla, kiel estas nobla la lasta leŭkocito en ties sango, kiu brave sin ĵetas kontraŭ la atakanto, kvankam ĝi tiukaze mem pereas. Se ni havas motivon por honti, do ni hontu pri tiu primitiva kaj ne jam evoluita spirito kompare kun tiel alte evoluita korpo. Kiam niaj bibliaj prapatroj surmetis bestajn peltojn, ili tion ne faris tial, ĉar ili rekonus senvaloron de siaj korpoj; en la lumo, kiu ankoraŭ rebrilis el la malproksimiĝinta paradizo, ili vidis nesufiĉan valoron de siaj spiritoj. Vualo tiel ne kovras la korpon antaŭ la spirito, sed inverse, la spiriton antaŭ la korpo. Nome: niaj korpoj falis nur parte, sed niaj spiritoj falis katastrofe ...”

Sekvis sekundoj de silento. El kruĉo verŝiĝis varmega teo. Georgo kun delico eltrinkis kaj iomete etendis siajn membrojn.

”Sinjoro profesoro, io en tiu ĉi rakonto min ĝenas. Vi parolis tiel, kvazaŭ ekzistus iel du inteligentoj. Inteligento de la korpo, kiu estas elstare altranga — kaj inteligento de la spirito, kiu la unuan ne atingas. Sed mi ne povas al mi klarigi, kiamaniere la malpli evoluita inteligento de nia spirito povas havi pri si konscion, dum la pli evoluita inteligento de nia korpo ĝin ne posedas ...”

”Tiel povas demandi nur iu, kiu jam multon lernis!” komplimentis lin la profesoro kaj daŭrigis:

”Verdire ni pli kaj pli havas impreson, ke en ni agas du diversspecaj inteligentoj. Unu, kiu jam la simplan nazan muk-

membranon ekipas per tremviletoj, kiuj en severa ordo puŝas mukon kaj malutilajn partiklojn el la nazo; kiu precize distingas bonan substancon disde la venena, kiam ili atingas la stomakon kaj provas fari ĉion por eligi la venenan substancon; kiu per du gramoj da superrena glando — per kapacito, kian ne posedas iu ajn generalstabo — aranĝas defendan militon interne de la korpo, ekde la universala defendo per leŭkocitoj, ĝis la plej speciala batalado per kontraŭkorpuskloj, kiujn la korpo produktas por ĉiu atakanto aparte. Ne nur, ke la korpo tuj 'scias', pri kiu malsano temas, sed ĝi tutfronte unuece al ĝi reagis. Se ekzemple oni operacias duodenon, tiu ĉi inteligento de la korpo aŭtomate fermos ĉiujn elirejojn el la stomako, por ke la fluaĵo ne fluu el la vundo kaj ne provoku inflamon de la ventra membrano. Kaj tiu fermiĝo daŭras dum kvar horoj — precize tiom, kiom fibroino bezonas por plene kunglui elirejojn. Se oni perdas sangon, la tempo, bezonata por sangsolidiĝo aŭtomate malplilongiĝas proporcie kun la sangoperdo. En nia korpo do evidente 'iu' regas kaj mastras, kiu samtempe estas perfekta kemiisto, biologo, militista stratego, fizikisto, kibernetikisto, ekonomiisto, energetikisto, ekologiisto kaj multalio. Ke ĉi tie temas pri alcelita plano, kiun povas programi nur superinteligento, pri tio ne povas plu esti duboj. Tiu ĉi inteligento ankaŭ en plej simplaj vivestaĵoj estas tiel evidenta, ke ni ne havus motivon honti, eĉ se nia memo inkarniĝus en la korpo de ne tro impona kaj renoma raŭpo! — Kaj tamen tiu ĉi inteligento ne estas nia propra inteligento. Se ĝi estus nia propraĵo, ni havus konscion pri ĉiuj tiuj procesoj. Ni digestus kiel kemiistoj, ni moviĝus kiel fizikistoj, ni batalus kontraŭ mikroboj kiel generaloj ...”

”Kion diri, se temas pri nuraj aŭtomatismoj?” demandis Adela.

”Vidu, aŭtomatismoj estas procedoj, kiujn ni unue faris malrapide kaj konscie, poste la granda cerbo ilin delegis al la aŭtomatiko de la vegetala nervsistemo. Sed estas neeble kredi, ke la homo unue konscie pumpus sian sangon, konscie spirus, kreskus kaj asimilus sian nutraĵon, sin defendus kontraŭ mikroboj kaj virusoj, kaj poste ĉion tion iom post iom delegus al sia aŭtomatiko. Ne, tio certe ne estas aŭtomatiko en la sama senco, kiel ni biciklas aŭ ludas fortepianon. Sed estu kiel ajn: ĉiu aŭtomato estas produkto de racio, kiu celplane ligas partojn en funkciantan tuton. Oni ne povas forigi la fakton, ke en niaj korpoj regas inteligento, kiu venas el alia fonto ol tiu ĉi, per kiu ni tiun ĉi fakton mallerte perceptas.”

”Do temas pri fremda, luprenita inteligento, ĉu?” ekhavis ideon Tanja.

”Ĝuste tion mi volis jam mem diri. Vole nevole, ni devas agnoski, ke en ni agas io, kio ne estas parto kaj produkto de ni.”

”Kaj kiu estas tiu grandanima ludonanto, kiu disponas pri tiom da racio, ke li povas ĝin ludoni en tioma kvanto?” iomete ironie diris Georgo.

”La homo tio certe ne povas esti. Ja ne pasis tiel granda tempo de tiam, kiam li malkovris sangocirkulan sistemon. Nur en la 19-a jarcento li produktis unuan vakcinon.”

”Kio pri naturo mem?” demandis, inspirita de la oficialaj lernejoj Adela.

”Kiu naturo? Ĉu besto? Ekzemple kokino, kiu malpigre kovas siajn ovojn eĉ, se ili estas fabrikitaj el gipso? Ĉu eble unu

el plantoj? Probable tiu filiko, kies semo en popolfabeloj dum la solstica nokto kapabligas homon kompreni la parolon de la bestoj ... Sed, se ne la plantoj, do eble mineraloj? Eble la stela plasmio? Tiu, kiu volas atribui racion al la naturo, tiu devas tiun ĉi substantivon skribi per majusklo, kvazaŭ temus pri ĉiopova kaj raciĥava personego. Kvazaŭ temus pri Dio mem!”

Adela tute bone sciis, kiu ebleco restas. Tamen ŝi provis savi, kion ŝi kredis povi: ”Finfine tiu ĉi inteligento povus evolui mem, dum la lukto de organismoj por supervivo, dum la adaptiĝado al propra medio kaj dum la natura selektado de la specioj!”

Profesoro Andreo estis ĝentlemano kaj al Adela li ne volis senpere diri, ke el tiu ĉi pripensio parolas iu rapide kunveldita falsiĝo de Darwin, kiun Darwin mem same malvole akceptus, kiel li ne volis akcepti la konteston de la anglikana primaso de Londono.

”Bone, Adela, ni marŝos de la lasta vorto al la unua. Ni pripensu, kion la nocio ’selekto’ en nia kunteksto signifas. Se la noción uzis Darwin, tio havas certan sencon. Tiu sinjoro estis — same kiel pri evoluo de la specioj — konvinkita pri la ekzisto de Dio. Se do endis elekti kaj selekti, kio plu vivu kaj kio probable malaperu, en la mondo de Darwin ekzistis ankaŭ la estiĝo, kiu povis elekti kaj selekti. Elekti kaj selekti povas nur inteligentohava estiĝo. Sed se pri la selekto parolas vi, Adela, tio signifas, ke vi al la senviva materio atribuas inteligenton, kiu suverene povas selekti inter la perspektivaj mutacioj kaj iliaj maloj. Se do la nocio de selekto ion pravas, ĝi pravas la ekziston de la inteligento, kiu povas kaj volas selekti, kiu do agis jam antaŭ la ekesto de la unua viva ĉelo.”

”Ne estas facile sekvi ...”

”Ni marŝu antaŭen! Vi diras, ke vivestaĵoj adaptiĝis al sia naturmedio. Tio estas kompleta falso. Se la estaĵoj pli kaj pli adaptiĝus al sia medio, ili iĝus al tiu medio pli kaj pli similaj, sekve pli kaj pli primitivaj kaj fine senvivaj, kiel la medio mem. La lasta ŝtupo de la adaptiĝo tiel signifus kompletan identiĝon de tiuj estaĵoj kun sia medio, sekve la ĉeson de si mem, de ajna vivo. Tia asimilado verdire okazas. Ĉiumomente ĉiuj vivaj ĉeloj proksimiĝas al tiu fina adaptiĝo, kiun ni nomas morto. Sed la vivo kiel tuto, ĝuste kontraŭe ol vi pensas, pli kaj pli distingiĝas de sia medio — laŭ la instruo de Darwin — ek de la plej primitivaj formoj ĝis la plej kompleksa kaj de la naturmedio plej diversa, la homo mem. Tiel la homo estas la plej maladaptita viva estaĵo — kaj lia inteligento devas konstante okupiĝi pri la streĉo inter la medio kaj lia diverseco.”

”Sed kio pri la lukto por supervivo?” jam preskaŭ armistis Adela.

”La lukto por supervivo mem estas mirinda pruvo — sed ne por tio, kion vi volis diri. Rigardu: ĉu la steloj luktas por supervivo? Ĉu tion faras la neĝo, kiam albrilas fruprintempa suno? Ne. Ĉiuj spertoj montras, ke la bazo de ĉiu lukto por supervivo estas ekzisto de la volo. Ĝuste la volo estas tiu fenomeno, kiu la inteligenton de vivaj estaĵoj definitive distingas disde la ’inteligentaj’ maŝinoj, kiel oni diletante false nomas komputilojn.”

”Ĉu vi volas diri, ke la arbo samtiel vivas kaj luktas per sia vivovolo, kiel tion faras la homo?” enmiksitis sin Tanja.

”Tion, se mi volas esti preciza, oni ne scias. Sed mi supozas, ke vere propran kaj liberan volon posedas nur la homo, sed en aliaj vivestaĵoj kaŝiĝas ne nur iu fremda inteligento,

sed same ankaŭ iu fremda, luprenita volo, iu enkonstruita imperativo, ke endas ĉiupreze vivi kaj multobliĝi. Vidu, eĉ la homa libera volo ne regas super nia tuto. Nia korpo havas, samtiel kiel ĉiu besto kaj planto, aldone luprenitan iun alian volon, iun alian imperativon, kiun ni senpere ne povas percepti kaj same ne kontroli. La homo povas per sia volo decidi fari suicidon, sed la luprenita volo de la organismo, de ĉiuj homkorpaj ĉeloj tamen reagos kaj faros ĉion por protekti la vivon.”

”Jes, mi vidas ...”

”Por pluvivo do povas lukti nur tiuj estaĵoj, kiuj posedas ĉu sian propran volon, ĉu enkonstruitan luprenitan volon de ie aliloke, ni nomu ĝin provizore Pravolo. Tia Pravolo tamen ne povas esti io alia ol aparta aspekto de Prainteligento, pri kiu ni jam parolis.”

”Do, bone ...”

”Restis por nia pritrakto ankoraŭ unu nocio: evoluo, evolucio. Ĉiuj, kiuj parolas pri memevolucio, uzas rimedon, kiu por ĉiam fermu la buŝon de ajna kontesto: la tempon. Per sintagmo, ke la unua vivo aperis dum la longtempa kuniĝado de albumenoj, en epoko de antaŭ milionoj da jaroj, ili provas fari ebla tion, kio cetere ne ŝajnas ebla. Sed la tempo mem ne povas ion fari. Kial? Nia ĉiutaga sperto pruvas, ke ĉiuj procesoj, kiuj iras laŭ propra tendenco, kondukas el ordo al malordo. En la naturo, en la universo, la probableco de la malordo estas senkompare pli granda ol la probableco de la ordo. Ni prenu simplan ekzemplon. Se infano ĵetus aeren plomb-literojn el la presista kompostujo, normala probableco diras, ke ili falos teren sen ajna ordo. Ili nek faros ordigitan alfabeton, nek iun sencoĥavan tekston. Oni povus tiel ĵeti dum mi-

lionaĵoj da jaroj, sed praktike neniam oni tiamaniere atingus hazarde la frazon: Mi ne ĵetos plu! La dua ekzemplo apartenas al la fizika kampo. Se ni hejtas fornon, ni starigas ĉe la molekuloj iaspecan varmordon. La molekuloj, kiuj konsistigas hejtmaterialon, fornon kaj aeron tuj ĉe la forno, atingas altamplitudan osciladon; aliaj, pli malproksimaj, oscilas malpli alte. La unuaj fariĝas 'varmaj', la aliaj estas kompare al la unuaj 'malvarmaj'. Negrave, ĉu ni hejtas plu, ĉu ni ĉesas hejti, post certa tempo tiu ordo malordiĝos. Se ni hejtos plu, ĉiuj molekuloj fariĝos proksimume same varmaj, ĉiam pli samgrade; se ni ĉesas hejti, ĉiuj molekuloj iom post iom perdos varmon, do osciladon. La proceso tendencas al malordo. Sed tia proceso ne okazas nur ene de la ĉambro, sed en tuta universo. Fizikistoj parolas pri la termika morto de la universo. La tuta universo moviĝas ek de la komenca ordo al la fina malordo. Tiu leĝo havas nomon entropio kaj konsistigas la faman 2-an leĝon pri termodinamiko.”

”Se tiel, ĉu la fenomeno vivo ne estas efektive rompo kontraŭ tiu ĉi leĝo?” vekigis Duŝan.

”Jes, tiel estas. Rompo senkompara. Sed ĝi ne estas escepto hazarda kaj unuopa. Eble ni eĉ povus iamaniere toleri teorion, ke unufoje en la universo la hazardo produktis ordon en komplekseco de la viva ĉelo. Sed ĉi tie temas pri tiom ampleksa invado de la vivo, en si mem komplementa kaj kongrua, ke estas vera infanaĵo, paroli pri hazarda ludo de la blinda naturo. Ĉiu, kiu ne estas propravole blinda, devas agnoski — kaj ni esprimu dankon pro tio ankaŭ al Darwin — ke la tuta viva mondo estas penetrata de du tendencoj: tendenco de memkonservado kaj tendenco de evoluo. Ili ambaŭ esence kon-

traŭagas la bazan tendencon de la naturo: tendenco al malordo, al entropio.”

”Bone, sed kiamaniere tiuj du tendencoj estas konstruitaj ene de la materio, ke ĝi povas organiziĝi en ĉiam pli alte evoluitajn sistemojn?” demandis Tanja.

”En kibernetiko validas regulo, ke por ajna funkcianta sistemo estas bezonataj tri elementoj: materio, energio kaj informo. Kaj la informo konsistas el ordigo, instrukcio kaj enhavo. Komputilo ricevas sian informon de la homo. Iel ajn perfekta estu maŝino, neniam ĝi povos memstariĝi. Al ĝi mankas la esenca organo, kiu nura kapablas iniciati kaj prijuĝi — la personeco. La maŝino havas gigantan kapablon rapidege aranĝi tion, kion enmetas en ĝin la homo — sed ĝi neniam el si mem starigos demandon. Biologoj malkovris, ke ankaŭ en la ’komputilo’ de vivaj ĉeloj troviĝas certa ’programo’. Temas pri la genetika kodo DNA, nomita ankaŭ ’duobla spiralo’. En tiu ĉi molekulo estas koditaj ĉiuj informoj pri tio, kiamaniere el la koncipita ovo evoluu nova viva estaĵo; ĝis tiaj detaloj, kiel koloro de haroj, formo de ungoj aŭ emo pentri, se temas pri homa ido. Ĉio, kio okazas en la utero, okazas laŭ la preciza programo de tiu ĉi genetika kodo. La fakto, ke la tuta kresko kaj vivo estas kontrolata de la ’teksto’ en tiu spirala molekulo, surprize memorigas pri la unua frazo en la evangelio laŭ Johano: ’En la komenco estis la Vorto ... ’”

La tenda tolo malforte ondis pro venteto. La profesoro devis laŭvice kuiri, aliaj foriris al la strando. Junaj korpoj forpuŝis akvomason kaj pleniĝis de freŝa maraero. Super la fajro gluglis akvo kun ĉiuj eblaj legomoj kaj plantoj, kiujn proponas la ĉestrandaj standoj. La suno sin oferis, kvazaŭ ĝi brilus la lastan fojon.

Tra vapore, kiu leviĝis el kaldroneto, vidiĝis fluetado de la naĝkalsono de Georgo.

”Ĉu vi do jam enuis de banado?” kliniĝis Andreo trans la kaldronon.

”Eh, nenio speciala ...” provis Georgo ion kaŝi.

”Vi havas problemon, ĉu ne?”

”Vi bele eskapis la temon pri nudeco ...”

”Ĉu vi trovas?” mire rigardis la profesoro. ”Ĉu ni ne sen-vestigis ĝisnude kelkajn malnovajn jam fiksiĝintajn antaŭ-juĝojn kaj konvinkojn?”

XI.

*Pri abismoj internen;
pri tio, kion diris la olda sinjoro
el Königsberg;
ĉu moralo donas profiton ...*

Morgaŭ ni leviĝos nur je la naŭa!” reglamentis profesoro
Andreo.

”Kial?” demandis la ordemo de lia edzino.

”Ĉar ni pliparte laboros dumnokte,” li respondis, sen per
tio ion ajn pli precize klarigi.

Ili vere dormetis ĝis la naŭa. Verdire ili trovis la okazon
bona, iomete ili povis ĝui pli longan restadon sur siaj matra-
coj. Ĉu oni sur tiuj ĉi junaj, ne jam plene proporcie elkreskin-
taj korpopartoj povus legi, ke ili ludas la pilkon de filozofia
dialektiko; ke ili en belaj ludmanovroj, lerta ludruzado kaj en
honesta sporta konduto provas ĵeti la pilkon en golejon de la
vero?

Tute ne. La suno sur tiu ĉi haŭto same intense provokis
estiĝon de bruna pigmento kiel sur la haŭto de ajna persono
surstrande. Ilia specifa pezo kreis en la akvo la saman supren-
puŝon, kiel se temus pri naĝanto, kies intereso koncentriĝas
al la rezulto de sporta vetkuro. Se temis pri ia diferenco, oni
povus diri, ke en tiuj ĉi scivolaj okuloj ekbriletis je kelkaj luk-
soj pli da brilo. Kiam la homo serĉas ion tian, kio ne estas
vendata en memservaj vendejoj, en li troviĝas io reĝeca ...

Posttagmeze ili forveturis en la urbon. Praaĝa faŭno de antaŭ milionoj da jaroj brulis en ĉiuj kvar cilindroj de ilia aŭtomobila motoro kaj puŝis ilin per permesitaj 40 km pohore kontraŭ la urbocentron. Se tiu nafto estis postrestaĵo de iamaj fiŝoj, kiom da enmara eleganto oni forbrulas je 100 km? Se de surteraj bestoj: kiom da amindaj muzeletoj, kiom da petolaj oreletoj kaj kornetoj, kiom da postĉasa forto kaj ruzo, kiom da kopulacia ardo kaj superviva lerto estas enverŝitaj ĉe la benzinstacio, antaŭ ol la rado montranta konsumgaŭĝon trifoje turniĝas ...?

Ili haltis antaŭ konstruaĵo de nekutima formo. Ĝi povus esti cirka tendo, sed temis pri kupolo tro sfera. Povus temi pri artkovejo de io ajn ...

Super la enirejo estis ĉizite per belaj klasikstilaj literoj: PLANETARIUM. Ili elaŭtiĝis, la profesoro parkis sian veturilon sub tre aĝa platano, por havi ĝin enombre. Tra pendolpordo ili venis en aŭlon, kie ili unue vidis kasbudon, kiel en kinejo. Sur la vandoj pendis bildoj de renomaj viroj el pasintaj tempoj, kiuj rigardis tra siaj tuboj aŭ baraktis per siaj geometriaj instrumentoj, cirkeloj kaj trianguloj. Apude fascinaj kolorfotoj pri aliaj planedoj kaj malproksimaj sunsistemoj.

Andreo por ĉiuj aĉetis enirbiletojn. Deĵoristo kondukis ilin en etan amfiteatron, kiu memorigis pri cirko. Nur, meze de ĝi ne troviĝis stangoj kun trapezo kaj aliaj gimnastikaj iloj, sed iaspeca eksmoda kanono sur forta lafusto, sur sia tuta korpo ekipita per diversdimensiaj vitraj okuloj. Ili sidiĝis sur benkoj. Lumoj iom post iom estingiĝis. La kupolo, kovrita per blanka tolo, fariĝis pli kaj pli malhela, ĝis ĝi plene malaperis. Tiam ili aŭdis mallaŭtan muzikon per harpo. Ili troviĝis en plena mallumo. Subite supre, kie antaŭe vidiĝis tolo, ekbrilis unu-

opaj steloj. Pli kaj pli da ili. Kvieta baritona voĉo komencis rakonti pri fenomenoj, kiuj montriĝis sur tiu ĉi eta, sed tre konvinka artefarita firmamento. Dum la eksplikado, lumsaĝeto montris jen tiun, jen alian parton de la stelplena firmamento.

Distancoj ne estis en kilometroj. Ĉi tie ili ne estas kategorio. Ĉi tie oni devas kalkuli per lumjaroj. Terano preskaŭ ne povas imagi, ke lumo por sia vojo eĉ bezonas tempon. Tamen jam la suna lumo vojaĝas ĝis ni iomete pli ol ok minutojn. Ĝis la unua plej proksima stelo kiel nia suno la lumo bezonas bicikladon de unu plena jaro! Sed tio estas ankoraŭ nia hejma korto. La diametro de la Lakta Vojo (en kelkaj lingvoj ankaŭ Romia strato), do de iom pli granda stela 'vilaĝo', en kiu nestas ankaŭ nia sunsistemo kaj ene de ĝi nia planedo Tero, povas esti travojaĝita en proksimume 100.000 jaroj! Da tiaj galaksioj, eĉ multe pli grandaj ol nia Lakta Vojo, troviĝas laŭ ĝisnunaj prijuĝoj pli ol miliardo ...

Niaj senintencaj astronomoj perdis spiron. En tiuj dimensioj eĉ la plej rapida raketo, akcelita per kemia karburajo, estas helika piedirado. La planedo Tero en tiuj spacegoj estas malpli ol pulvero, kiun la kosma flegistino forgesis balai ... Ili ne plu aŭdis la muzikon. Eĉ la eksplikadon ne. Ili ekhavis impreson, ke ne ekzistas plu io 'supre' kaj alio 'malsupre', ke troviĝas nur plu abismegoj, en kiuj oni dronas kaj ĝisfine perdiĝas, se ekzistas io por perdiĝi ...

Ekster la planetario ili sentis svarmon en siaj okuloj kaj apenaŭ ion povis vidi. Ili ŝancele paŝetis, kvazaŭ ili estus beboj, kiuj ne jam lernis paŝi. Apud la planetario troviĝis eta zoologia ĝardeno por reptilioj. Inter serpentoj kaj kameleo-

noj ili aranĝis siajn impresojn. Duŝan demandis al sia profesoro:

”Ĉu la universo de ĉiam estas tia?” — Andreo sin turnis de la baseno kun du krokodiloj:

”Same, kiel la fiksjaj steloj efektive ne estas fiksjaj, sed ili fakte ege rapide moviĝas — nia suno ekzemple preskaŭ dudek kilometrojn po sekunde en la direkto de la stelsistemo Herkulo — tiel ankaŭ la universo kiel tuto ne de ĉiam estas tia, kia ĝi nun estas, kvankam por niaj okuloj ĝi ŝajnas fiksa.”

”Tio signifas, ke ankaŭ la universo evoluas, ĉu?” diris Tanja.

”Tiel ŝajnas. Laŭ la teorio de Lametrie, kiu nuntempe ĝuas ĝeneralan akcepton, la universo, kian ni konas, estiĝis antaŭ 10-15 miliardoj da jaroj. Tiam iaspeca ’praatomo’, en kiu laŭ tiu ĉi teorio estis komprimita la tuta nuna maso de la universo, eksplodis — kaj post tio ekestis sistemo de elementoj, estiĝis la nuna formo de materio, estiĝis stela kaj interstela materio kaj stelarsistemoj, kiuj ĉiam pli rapide distanciĝas de tiu supozata eksplodcentro.”

”Bone ...” intervenis Adela, ”sed tio ja signifas, ke antaŭe estis nenio krom tiu praatomo. Se tiel, do bezoniĝas tiu fama Diofingro, por ke el nenio estiĝu io: unue tiu praatomo kaj post la supozata eksplodo la nuna universo ...”

”Ĉio, kion vi diris, sonas sufiĉe racie!” ŝin laŭdis la profesoro.

”Sed mi pli entuziasmiĝas pri la modelo de la eterna universo, kiu jen eksplode ekspansias, jen inverse koncentriĝas kaj tiel senfine kaj ne bezonas komencanton kun dia atributo por ĝin krei, kion vi opinias?” ŝi rondigis siajn lipojn, ruĝajn kiel post la konsumo de la edena pomo ...

”Bona filozofa evoluas nur tie, kie troviĝas bona kontestanto ...” rimarkis sinjorino Majda, kiu ne povis sin disponigi al admiro de iu venena lacerto. La profesoro donacis sian rideton ankaŭ al ŝi. Ekregis certagrada streĉo.

”Ĉu vi nenion diros?” montris zorgemon Duŝan, kiu cetero tute fidis al sia profesoro, se temis pri malfacilaj problemoj.

”La universo disponis por sia evoluo pri dekkvin miliardoj da jaroj, dum vi ne povas pacienci eĉ dum unu sola minuto ...” ludis severecon Andreo. ”Sed bone, ni pridiskutu la aferon!” li finfine kapjesis.

”Ĉiuj aferoj, fenomenoj, kiuj ekzistas, estas tiaj, ke vi povas ilin kalkuli, ĉu ne?”

”Klara afero!” konfirmis Adela.

”Speciale, se temas pri tiel simplaj kaj samtipaj mezurunuoj, kiel la tempo de unu jaro, ĉu ne?”

”Jes, ĝuste tiel.”

”Sed, diru, ĉu povus ekzisti la tempo de unu jaro aŭ de kelkaj jaroj, kiun vi ne povus kalkuli, kaj ĝin adiacii al jam konata tempo?”

”Se mi povas kalkuli ajnajn jarojn, do mi povas kalkuli ĉiujn, kiuj povas ekzisti!” konkludis Adela.

”Do, ĉu tiel la tuta tempo jam pasinta iamaniere estas kalkulita tempo?”

”Jes, verdire kalkulita ...”

”Sed, se kalkulita, do ankaŭ fina. Tio, kion oni povas kalkuli, ĉiam estas fina, limigita afero, eĉ se la kalkulo estas neimageble granda, ĉu?”

”Ĉu vi volas diri, ke senfino tiel tute ne ekzistas?” la knabino komencis kompreni.

”Ĝi ekzistas kiel nocio, kiu por neniu konkreta fenomeno

estas aplikebla. Ĉio, kio konkrete ekzistas, estas kalkulebla kaj kalkulita. Tio, kion oni ne povas kalkuli, se temas pri nia materia mondo, tio simple ne ekzistas. La jarojn oni povas kalkuli, do ili ekzistas. Sed da ili ne estas senfino, sed iu fina nombro. Se ekzistus senfino da jaroj, do apud tiuj jaroj, kiujn oni povas kalkuli, devus ekzisti alispecaj, kiujn oni ne povus kalkuli ...”

”Sed kio pri la senfina serio de negativaj nombroj, tio tamen ekzistas, ĉu?” Adela provis trovi sian lastan ŝancon de eskapo.

”En tiun kaptilon falis eĉ la fama profesoro Bertrand Rusel. Sed tio ne ŝanĝas la aferon. Ankaŭ la senfina serio de negativaj nombroj estas nur abstrakta nocio. Kaj, ĉefe, ĝi ne signifas senfinon, sed nur malfermon de la serio, ke oni ĝin povas kontinui. Sed kvankam vi povas ĝin laŭplaĉe kontinui, ĉiam vi diros iun finan nombron, neniam la senfinon!”

”Do ankaŭ antaŭ ni, en perspektivo, la senfino ne estas ebla, ĉu?”

”En konkreta senco certe ne. Oni povas nur senĉese aldoni finajn nombrojn, sed oni neniam atingas senfinon.”

Estiĝis silento. Ekmankis argumentoj. La logiko de la profesoro estis strikta. La mondo estas en sia daŭro senkontesteble fintempa — kaj se ĝi tiulogike iam havis komencon, ĝi bezonis la Komencanton.

”Sed, bonvolu diri, kiamaniere Dio mem povus esti senfina, se la mondo tia ne povas esti?” enmiksiĝis Georgo.

”Vi surprizas min pozitive pli kaj pli,” Andreo laŭdis siajn disĉiplojn. Poste li respondis al Georgo:

”Se Dio apartenus al la sama serio de finaj aferoj, kiujn ni povas kalkuli, do ankaŭ por Li validus la samo: kiel ekestis Li?

Sed Dio estas alimaniere senfina, kiel estas senfina la abstrakta geometria fenomeno, la rekta linio. Dio ne daŭras per senfina aldonado de finaj temperoj, sed Li samtempe vivas la senfinon, ĉar Li vivas ekster ĉiuj tempoj, ekster ĉiuj dimensioj. Dio havas nek spacan nek tempan dimensiojn, tio estas Lia eterneco.”

Tiam Tanja ekkriis:

”Do la astronomio senpere pravas la ekziston de Dio, ĉu?”

”Jes, ĝi pruvadas Lin, sed ĝi ne povas Lin al ni montri, ĝi ne povas Lin al ni finpruvi. Ni jam diris: pruvoj havas nur kondiĉan valoron. Finfine ni devas ankaŭ al la forto de la pruvoj kredi. Ni devas logikon krediti per morala volo kaj kredo.”

”Ĉu vi volas diri, ke la materiismo, kiu instruas, ke la kosmo estas senfina space kaj tempe, estas en konflikto kun la scienco?” insistis ĉe sia pozicio Adela.

”Unue: tia aserto ne apartenas al la kompetento de la scienco, ja oni ĝin ne povas kontroli. Sed ke ĝi kontraŭas la logikon, tion ni jam montris. Pri materiismo ni devos paroli ankaŭ aliokaze. Nun mi diros nur, ke ne temas nur pri la konflikto de la materiismo kun baza logiko. Ĝi troviĝas ankaŭ en konflikto kun elementoj de la fiziko.”

”Kiel do?”

”Enkadre de fiziko vi certe aŭdis anekdotojn pri stranguloj, kiuj provis konstrui ian perpetuum mobile, maŝinon, kiu senfine movus sin mem, sen ekstera energio. Via instruisto klarigis al vi, ke tia maŝino principe ne estas ebla.”

”Tio estas vera.”

”Nu, la materiisma doktrino en sia esenco asertas tamen ĝuste tion, ke tia perpetuum mobile ne nur eblas, ke ĝi jam ekzistas kiel donita fakto.”

”Tion mi ne tuj komprenas ...” aŭdiĝis Georgo.

”Se la universo estus de ĉiam, kiel instruas la materiismo, kaj evidente ĝi moviĝas kaj ĉiam moviĝis, do ĝi kiel tuto estas perpetuum mobile, ĉar ĝi ne povas ricevi energion de ie ekstere, ja ĉiuj ’eksteroj’ jam inkluziviĝas en la universo mem.”

”Vi do asertas, ke la materiisto ne lernis la elementlernejan fizikon kaj vere kredas, ke perpetuum mobile ekzistas?” ekkriis Georgo.

”Ne nur tion. Por vera materiisto perpetuum mobile estas la esenca bazo kaj supozo por klarigi la materian mondon. Frideriko Engels diras, ke moviĝo estas maniero, laŭ kiu la materio ekzistas. Tio estas nur alia lingva redakto de la sama ideo: ke perpetuum mobile ekzistas, ke la tuta universo estas tia maŝino ...”

”Sed, sinjoro profesoro,” nun eĉ Duŝan provis advokati favore al materiistoj, ”tiaj homoj kiel Engels ĉiukaze ne estis idiotoj. Kiel vi klarigas al vi la fakton, ke ĝuste li, kiu surprizis siajn samtempulojn per sia profunda scio pri matematiko kaj natursciencaj aferoj, povus aserti ion tiel stultan?”

”Kredu al mi Duŝan,” iel lame diris la profesoro, ”ke tio ankaŭ por mi estas granda enigmo. Kiamaniere la homo, kiu ludis per integraloj, kiu sciis ĉiun novaĵon el la evoluo de fizika kaj aliaj natursciencoj, kiamaniere tiel klara spirito povis kredi je tioma sensencaĵo, kiel memmoviĝo de materio kaj memestiĝo de la vivo ...”

”Do klarigo ne troviĝas, ĉu?” ektimis Tanja laŭ sia knabina maniero.

”Mi opinias, ke iaspeca klarigo tamen troviĝas. Ni rigardu tiel: Ekzistas granda fakulo, ni diru, pri mono kaj financaj sis-

temoj. Oni tiamaniere povus atendi, ke tia homo havos racian rilaton al la mono. Tamen — alia, multe malpli fake lerta homo eble ĝuste prijuĝas, ke la mono ne povas feliĉigi la homon, dum la unua, la fakulo, eble idolos la monon, vidos en ĝi fetiĉon.”

”Sed kio povas al eĉ tiel forta cerbo ombrigi la rigardon, ke li ne trovas racian respondon?” diris Adela.

”La ĉefa eraro de multaj intelektuloj estas, ke ili unue difinas, kia estu la solvo, kiun ili provas ’trovi’ kaj poste ili ĝin nur ŝajne serĉas. Efektive ili el ĉiuj trovitaj elementoj implicas en sian konkludon nur tiujn, kiuj ne kontraŭas ilian anticipan atendon kaj imagon. Bonvolu nur konsideri, kiel la vere superinteligenta kaj instruita amiko de Marx, Frideriko Engels, provis nuligi la duan leĝon pri termodinamiko de Clausius, pri kiu ni hieraŭ diskutis!”

”Ĉu temas pri tio, ke la universo tendencas al ĝenerala ekvilibro kaj malordo, do sekve al temperatura morto?” diris Duŝan.

”Jes, ĝuste pri tio. Tiu ĉi leĝo ĉiukaze ne estas argumento por materiisma imago pri la mondo. Se la mondo iam devos ’estingiĝi’, do ĝi iam devis kun certeco ’ekbruli’. Tion ĝi ne povas fari mem. Mem ĝi povas nur estingiĝi. Do nepras forto, kiu ne estas forto de tiu ĉi mondo. Nepras la Spirito. Kaj tiu Spirito ĝenis la anon de la manĉestra burĝa rajdklubo Frederikon Engels’on. Tial li lanĉis kontraŭ Clausiuson tiun ĉi ridindan riproĉon: ’Tio signifas ... , ke la energio devis esti kreita, ke ĝi do estas kreebla, do detruebla. *Ad absurdum!*’ Por Engels do la bezono de origina krea akto, sekve Diekzisto, estas pruvo por tio, ke la fizikisto Clausius eraris. Se io estas ’ad absurdum’, do certe tia maniero argumenti! Ĉar oni ne

volas, ke Dio ekzistu, oni ĉiun teorion, kiu supozas tiun ekziston proklamas absurda ... Sed por Engels la supozo de Dia neekzisto kaj eĉ malpermeso de Lia ekzisto estas pli ol nur supozo. Tio por li estas religia dogmo, kiun oni ne rajtas pridubi aŭ kritiki. Kiam Engels rakontas pri aferoj, kiuj ne ligiĝas kun tiu ĉi dogmo, li rakontas tute raciajn aferojn, foje eĉ sciencnivelaĵojn. Sed kiam li alproksimiĝas al la nocio de Dio, iu kaŝita ordono el lia interno faras en lia cerbo fuŝkontakton, ke li ne plu povas pensi logike.”

Ĉi tie Adela atendis por kapti sian ŝancon ĉe la profesoro:

”Sinjoro profesoro, ĉu ne same blinde procedis ankaŭ religiaj homoj, kiam ili ĉiun novan ekkonon prijuĝis nur el la vidpunkto, ĉu tiu nova scio faligas certan bibliajn rakontojn kaj mondpercepton aŭ ne?”

”Bedaŭrinde,” trankvile diris Andreo, ”bedaŭrinde mi devas vin komplete pravigi. Dum longa tempo vere tiel estis kaj kelkfoje plue estas. Sed aliflanke same veras, ke ĉe kelkaj sufiĉe kompetentaj mensoj — kaj prefere mi diras sufiĉe kredantaj koroj — neniam estis kverelo inter la kredo kaj scienco, senrigarde, kion tiu scienco asertis pri la mondo. Vera scienco, kiel emis ĉiam denove emfazi granda moderna aŭstrabrita filozofo Karl Popper, starigas nur tiajn hipotezojn, kiujn oni povas principe erarecigi, tio estas per eksperimento aŭ simple revizio refuti. Ĉar oni per neniu eksperimento povas refuti la aserton, ke anĝeloj ekzistas, tiu ĉi temo ne povas aparteni al la scienco. Ĝi apartenas al la kredo. Tiel kredo kaj scienco, se scienco ne estas nur maskita negativa kredo, neniam povas kolizii! Se ‘la scienca socialismo’ koliziis kun religia kredo, tio nur pravas, ke ĝi mem estis religio kaj neniel scienco. Sed aliflanke estas vero, kaj tiun ĉi fakton oni neni-

am sufiĉe bedaŭras, ke tro multaj religianoj tremis antaŭ la sciencaj laboratorioj, timante pri sia 'kredo', same, kiel la unuaj apostoloj tremis en la tanganta boato kaj la Sinjoro poste riproĉis al ili mankon de la kredo."

"Do vi asertas, ke inter la scienco kaj religia kredo principeniam povas ekesti kolizio aŭ malkongruo?" iomete surprizite demandis Georgo.

"Neniam, se ĉiu el ili restas fidela al sia kampo. Se la kredo rakontas pri supernatura, transcenda mondo kaj se la scienco rakontas pri la natura mondo, ne ekzistas kolizia loko. Estas simile, kiel ĉe radiofoniaj ondoj, kiuj ne povas kolizii kun la ondoj, kaŭzigitaj en akvo per ĵetita ŝtono ..."

"Sed," provis sian bonŝancon Adela ankoraŭfoje, "se la scienco iun tagon tamen sukcesus produkti artefaritan vivestaĵon, eble eĉ inteligentan, ni diru eĉ geniulon?"

Ĉiuj ekrigardis al Andreo. Kion li diros pri tio ĉi? Oni povis trovi en kelka eklezia presaĵo principan polemikon kontraŭ tia ideo. Kion do diros la profesoro? Ĉu li procedos same kiel Engels, nur de la alia flanko? Ĉu li do refutos tian eblecon nur por savi kredon je Dio? Sed la profesoro nur iomete ridis, kvazaŭ la demando ne tuŝus ion tre gravan:

"Kredu al mi aŭ ne, eĉ mi mem foje ludas per la penso, ke la scienco iam faros ankaŭ tion. Kial finfine ne?"

"Diable!" Georgo elĵetis la vorton, kiun oni kutime ne uzas ĉe filozofiaj disputoj, "ĉu vi ne opinias, ke sub tia supozo la ekzisto de Dio fariĝus superflua?"

"Neniel! Se io, do ĝuste tia sukceso de la scienco vere devus por ĉiam fermi la buŝon de la lasta ateisto, se oni akceptas la elementan logikon!"

"Nun ankaŭ mi ne komprenas vin!" disapontite konfesis

Duŝan, kiu cetere al kutimiĝis al la logikaj kaj spiritaj ekzercoj de la profesoro sur lia filozofia cirktrapezo. La profesoro daŭre provoke ridis. Ili marŝetis sub olivarboj preter ĝardenoj per ruĝkolora humo. Fruktoj jam klare montris siajn formojn. Mankis nur la maturkoloro. Andreo komencis tiel:

”Adela, mi supozas, ke vi plej bone povas al mi respondi, se mi demandas vin pri la sekvo ...”

”Do, mi provu ...”

”Diru al mi, kiu el du meblistoj havas pli da ebleco fabriki tablon: ĉu tiu, kiu unue desegnas planon, se ne surpapere, do almenaŭ enkape — ĉu tiu, kiu tute hazarde kaj senpripense metas lignotabulojn tien reen kaj krucdirekten, ilin senplane segas kaj kunnajlas, tute spontanee, sen ajna ordo?”

”Certe tiu pli verŝajne ion saĝan produktos, kiu unue faras planon ...”

”Vi bone respondis,” diris la profesoro, ”sed nun diru al mi ankoraŭ, se vi havas emon, kiu el ili du estas modelo por la scienco: ĉu tiu kun plano, ĉu tiu komplete spontanea kaj hazardkaosa?”

”Do, certe tiu kun plano ...”

”Bone, diru al mi la trian fojon, Adela, ĉu ne ŝajnas al vi, ke ĉio, kion donis al ni la scienco, estiĝis el eksterordinara penado kaj planado de la homa racio? Aŭ ĉu vi eble kredas, ke ĉio rezultas el blinda ludado kaj hazarda eksperimentado sencela?”

”Mi opinias, ke ĉio, kio apartenas al la scienco, estas rezulto de cele orientigita racia agado kaj ne de blinda hazardo.”

”Nu, eĉ se en iu laboratorio io malkovriĝus mem el pura hazardo, tio ja foje okazas, tio tuj perdiĝus kaj forgesiĝus, se la esploristoj tion ne sciis tuj registri kaj inkluzivi en la tuton.

Sed nun, Georgo, bonvolu al mi diri: Ĉu vi ne havas impreson, ke por produkti la vivon, eĉ speciale por artifike produkti inteligentan estaĵon, bezoniĝus la kapacito de ĉiuj plej bonaj cerboj sur nia planedo en plena akordo de la funkciado?”

”Tio kompreniĝas mem, sinjoro profesoro!” gaje respondis Georgo.

”Do, se tiel, kiel nun senrezerve vi mem konfirmis, estus iel strange kredi, ke por la kreado de la inteligentaj estaĵoj aŭ eĉ nur de la plej primitivaj vivoformaj estaĵoj en la naturo la plej bona rimedo estus blinda hazardo, dum ĉe artifika produktado la plene ordigita pinta racio, ĉu?”

”Vi do pensas ...” diris Georgo konsternita.

”Mi pensas, jes,” ne lasis sin plu ĝeni la profesoro, ”ke la scienco, se io tia vere iam de ĝi estus atingita, tiamaniere elstare demonstrus la nepran bezonon de la menso kaj de la amo. Du elementoj, per kiuj laboras la scienco — kaj per kiuj laboras Dio!”

Estis nokto. Trans la firmamento etendiĝis dense stelplena Lakta Vojo, nia stelara kortego kun diametro de 100.000 lumjaroj. Verdire malgranda ĉirkaŭdomo kompare kun aliaj galaksioj kaj iliaj dimensioj. Tuj super iliaj kapoj brilis la stelaroj Sagitario kaj Skorpio. Oriente brilis Aglo kun sia perlo Altairo. Poste Cigno, Liro kun sia Vego. Okcidente Virgulino, iom poste Arkturo. Sekvis du maŝinoj por transporti la homan fantazion: la Granda ĉaro kaj la Malgranda ĉaro kun Venuso ĉe timono. Ili marŝis en densa grupo, la eta nokta ekspedicio.

”Ĉu ne signifas, iri en nokton nuntempe, kvazaŭ iri en la mezon de Afriko aŭ sur la pinton de Kordiljeroj ...?” diris sinjorino Majda.

”Tri aferojn ni forpelis de nia vizaĝo: la morton, la solecon kaj la nokton,” konfirmis sian edzinon Andreo.

”Sed kial?” demandis Tanja.

”Pro tro forta eldirivo,” kurte respondis la profesoro.

”Pro kies eldirivo?” ne komprenis la aludon Duŝan.

”La morto diras, kio ni estas; la soleco diras, kiaj ni estas; kaj la nokto diras, kie ni troviĝas kaj kien ni iras.” La profesoro evidente decidis paroli enigme.

”Sed kiel povas la nokto ion diri?” Tanja ne ĉesis insisti. La profesoro haltis. Ĉiuj haltis kun li. Ili atendis, ke li finfine rivelacios al ili la sencon de la nokta ekspedicio. Li diris:

”Vidu, ĉu vi havas ideon, kial en slavaj lingvoj oni ligas la saĝecon kun la blua koloro, nomante la saĝon ’modrost’ — bluaĵo? — Ne divenu, mi tuj diros al vi. Kion vi vidas, se vi rigardas en la profundon de la universo? Ĉu ne la bluan koloron? Kion vi vidas, se vi rigardas en la profundon de la akvo rivera, laga, mara? Ĉu ne denove la bluan koloron? Homoj, kiuj pli ofte direktas sian rigardon en la profundon, ĉu ĉielan, ĉu akvan, kie ili ne serĉas konkretajn objektojn, sed la profundon mem, kaj tiu profundo ĉiam estas blukolora, fariĝas aliaj kompare kun la homoj, kiuj ĉiam direktas sian rigardon nur al la proksimaj aŭ distancaj, sed ĉiam konkretaj objektoj. Ili fariĝas saĝaj, ĉar ili donas preferon al la unuavide neutila kaj neinteresa abstrakta blua profundo. Tial niaj prapatroj nomis tiujn homojn ’blukoloraj’, saĝaj. En nia erao nur malmultaj homoj direktas sian rigardon en profundon, ĉu ĉielan, ĉu akvan. Ili postkuras perokule nur plu konkretajn, utilajn, aĉetebajn kaj vendeblajn objektojn. Tial ili fariĝis amase banalaj, malsaĝaj.”

”Kio estas saĝo?” diris Adela.

”Mi rakontos al vi jenon: En orienta Pruslando, en la tiutempe floranta mirinde bela urbo Königsberg, kiu niaerae sub la administra povo de banalaj homoj kun eĉ pli banala monpercepto fariĝis triste kaduka Kaliningorod, antaŭ ducent jaroj vivis unu viro de malalta staturo, sed de ege alta spirito. Pli ol la plimulto de liaj samtempuloj li bone orientiĝis inter la steloj kaj eĉ konceptis tre gravan teorion pri la ekesto de la universo, kian ni konas. Kaj pli ol la plimulto de liaj samtempuloj li bone orientiĝis en la aferoj de homa interno, surbaze de kiuj li konceptis propran etikan instruon, kiu diras: Agu tiel, ke via konduto povu fariĝi la ĝenerala leĝo por ĉiuj! Tiu ĉi viro tiel bone sciis, pri kio temas, kiam li en la konkluda ĉapitro de sia probable plej grava libro formulis jenon: ’Du aferoj plenigas la koron per ĉiam pli granda konsterno kaj timrespekto, kiam mi pri ili meditas: la stelplena firmamento super mi kaj la morala leĝo interne de mi.’ — Tio tiel impresis liajn samurbanojn, ke ili tiun ĉi penson ĉizelis sur lian tombŝtonon. La nomo de ĉi tiu viro estas Immanuel Kant. Kaj la ĉizelitaj vortoj estas esprimo de la homa saĝo.”

Ĉiuj turnis sian rigardon supren, al la brilantaj skribsignoj, kiujn preskaŭ neniu plu kapablas legi, kvankam ili tiom multe diras. Kiel perdita sin sentas homo sub tiuj gigantaj mondoj. Sed Adela ne sentis sin ekstreme perdita kaj starigis jenan demandon:

”Ĉu tia morala leĝo verdire donas profiton?”

La aliaj ŝtele interŝanĝis rigardojn, kiel ajn tio en la substelara malhelo estis eble.

”Ĉu tio donas profiton aŭ ne, dependas de tio, Adela, pri kiaspeca profito vi pensas ...” tute senembarase respondis la profesoro.

Georgo provis helpi:

”Verŝajne temas pri tio, ĉu la homo, kiu sin tenas je certaj leĝoj en si, havas pli aŭ malpli de la vivo, kompare kun alia, kiu de tiaj ligoj liberiĝis.”

”Tion ĉi vi eminente klarigis,” afablis Andreo, ”ĉu vi bonvolus same bele klarigi, kion signifas la sintagmo ’havi ion de la vivo?’”

Silento.

”Nu, ĉu via entrepreno tiel rapide finiĝis? Iomete antaŭe vi ambaŭ volis esti plene liberaj por la donacoj de la mondo — kaj nun vi ne scias diri, pri kiuj donacoj temas ...”

”Bone, mi diru, ke temas pri la ĝuo!” trovis la solvon Adela.

”Ĉu speciala ĝuo aŭ la ĝuo ĝenerale?”

”Tiel ĝenerale, iel ajn ...” diris Adela.

”Tian respondon ankaŭ mi povas akcepti,” agnoskis la profesoro. Sed intervenis sinjorino Majda:

”Ĉu tio ne estas la instruo de olda Epikuro? Ĉu oni de vi atendu apogon de la filozofio pri delico?”

”Tamen mi tion devas, se tio montriĝos vera,” la profesoro ne lasis sin maltrankviligi kaj li kontinuis:

”Do, ni interkonsentu, ke ni atendas de la vivo la ĝuon. Sed ni estu radikalaj. Ni postulu la plej altan ĝuon, kiu tute eblas. Ĉu bone?”

”Bone!” konfirmis unue nur Adela kaj Georgo. Aliaj simple ne povis kredi je delicemo de la profesoro — aŭ ili atendis novan surprizon en formo de paradokso, pri kiuj la profesoro jam estis konata.

”Ĉu vi povas konfirmi mian tezon, ke ne ĉiuj ĝuoj estas same grandaj — kaj ke, por atingi la pli grandan, oni foje devas rezigni pri iu malpli granda?”

”Mi simple prenus ilin ambaŭ ...” ŝercis Georgo.

”En ordo, sed inter la ĝuo de bonbonlekado kaj tiu de la sana dentaro en plena aĝo oni nepre devas elekti, ja ili ekskluzivas sin reciproke.”

”Nu, ĉi tie jes!” agnoskis Georgo.

”Pigrumado certe estas ĝuo. Sed diplomo post la sukcese finita maŝiningeniera fakultato eble estas eĉ pli granda ĝuo, do oni devas rezigni, ĉu pri la unua, ĉu pri la dua ...”

”Jes, same ...” jam malpli entuziasme agnoskis Georgo.

”Sekve vi konfirmas, ke tiu, kiu rezignas pri bonbonoj kaj pri pigrumado, efektive pli bone zorgas por siaj ĝuoj ol iu alia, kiu preferas havi tujan ĝuon de dolĉo kaj de pigro, kiuj troviĝas senpene ĉemane?”

”Ĉi tie ne temas pri granda saĝo ...” montris honeston Adela.

”Bone tiel. Sed nun ni preparolu alian aferon. Kion vi opinias: se oni surmare subite devus forlasi subakviĝantan ŝipon kaj eniri savboaton, kiu el la pasaĝeroj pli suferus kaj kiu malpli?”

”Verŝajne pleje suferus tiu, kiu devus lasi surborde plej grandan trezoron de siaj havaĵoj, dum relative senzorga enirus boaton tiu, kiu krom siaj tolaĵoj kaj personaj necesaĵoj posedus nenion!” solvis la taskon Georgo.

”Precize tiel estas. Sed se mi ankoraŭfoje demandas: Kiu laŭ via opinio, devus pli suferi, kiam subite venus la antaŭmorta malsano, ĉu tiu, kiu dum sia vivo multe sin donis al delicoj, ĉu tiu, kiu dum sia vivo ankaŭ multe penis kaj eĉ suferis?”

”Verŝajne tiu, kiu vivis facilan ĝojplenan vivon, pli turmen-

te renkontus morton ol tiu, kiu dumvive multe suferis,” ankoraŭfoje agnoskis Georgo.

”Bone, nun ni supozu, ke post la morto nenio plu troviĝas. Sekve nia lasta horo estos decida: ĉu ni povos akcepti nian foriron en trankvilo, ĉu ne? Ĉu ne estas logike, ke pli facile akceptus sian foriron el la vivo tiu, kiu dum sia tuta vivo penis kaj suferis, ja la morto al li portos liberigon de tiuj penoj kaj suferoj, dum malfacile akceptos sian sorton tiu, kiu per sia morto perdos sian ĝuadon, siajn delicojn? Ĉu ne diras la popola saĝo, ke plej bone ridas tiu, kiu la lasta ridas? Ĉu ne validas tio ankaŭ por ploro, ĉu ne estas tiel, ke la lasta ploro estas la plej terura? Ĉu en tiu momento ne transformiĝus por la unua la tuta ŝtonaro en oron — kaj inverse, ĉu la dua ne plu vidus subite en sia ortrezoro nur senutilajn ŝtonojn?”

”Se oni tiel rigardas, efektive vere ...” jesis Adela.

”Ĉu ne validas do speciale por tiu, kiu ne kredas je sia postmorta vivo, ke ĝuste li devus plej zorgeme atenti, kia estos lia lasta horo, ke ĝuste li devus severe atenti la moralan leĝon en si, ja laŭ lia senkredo ne ekzistas iu, kiu povus post la morto plifaciligi lian situacion kaj la kvalito de lia lasta horo plene dependos nur de lia tiutempa morala ekvilibro? Ĉu ne estas tiel, ke speciale tia homo agas saĝe, se li eĉ mem pli rezignas pri la vivdelicoj ol homoj religiaj, kiuj tamen kredas je helpo de supre?”

”Mi ne scias vere, sed kio pri religiuloj, ĉu ili vere ne havas la saman problemon?” diris Adela.

”Temas pri tio, ke Dio pardonas pli ol pardonas la naturo. Dio jam en tiu ĉi mondo regalas nin per ĝuoj kaj eĉ delicoj. Li efektive ĝuste ordonas al ni ĝui lian mondon, kondiĉe ke ni respektu kelkajn limojn. Li ŝatas, ke ni ĝuu en lia mondo.

Li mem donis dolĉon al la fruktoj, kreskantaj en lia ĝardeno. Tiu, kiu kredas en Li, ne sentos sin kiel ŝiprompinto, perdanta sian tutan trezoron. La kredanto supozas, ke lia tuta surtera ĝuo lin akompanos transen. Ne en savboaton, sed rekte ĝis la savbordo, ĝis la solida tero, kiu neniam sinkos ...”

”Kio do vere donas profiton?” volis resume aŭdi Tanja.

”Por ili ambaŭ, por tiu, kiu ne povas kredi kaj por tiu, kiu tion povas, la plej profitodona solvo estas, serĉi nur la plej altan ĝuon. Ne estu kiel la unua kaj la dua el la tri filoj, kiujn ilia patro, kiel raportas multaj popolaj fabeloj, sendas en la mondon serĉi miraklan trezoraĵon — kaj ili en gastejoj konsumas vojaĝmonon, ricevitan de la patro kaj poste sin vivtenas kiel servistoj en mallibero. Estu kiel la tria sagaca filo, kiu ne lasas sin logi nek de dekstra nek de maldekstra flanko, sed rajdas rekte al sia celo; dumvoje li kompatas pri estaĵoj, ĉu bestaj ĉu homaj, kiuj troviĝas en mizero aŭ malfeliĉo, kaj poste montriĝas, ke tiuj de li pridonacitaj kaj helpitaj estaĵoj helpas lin trovi la trezoraĵon kaj ĝin akiri, kvankam ĝi estas bone gardata de drako kaj aliaj mitaj estaĵoj. Kiam li tiel akiras sian trezoraĵon, li deaĉetas siajn du malsaĝajn fratojn el ilia servuteco. Tiel do. Kaj se iu aldone povas kredi, ke la morto ne forrabos lian trezoron, sed kontraŭe, ĝin bone metos en eternan trezorejon, do li povos dum sia tuta entrepreno gaje fajfi kaj sporade eĉ eniri gastejon kaj regali sin per kruĉo de morale permesita delico ...”

”Se tiel, do la religia kredo estas ...” komencis la frazon de konsterno Adela.

”... la lernejo de la plej alta ĝuado!” kompletigis ĝin la profesoro.

Sinjorino Majda kaj Duŝan respiris post la aventuro de la

epikura filozofio, por kiu surprize pledis la profesoro. Siamaniere rekomencis spiri ankaŭ Adela kaj Georgo.

Intertempe la konstelacio surfirmamente ŝanĝiĝis. Venuso malaperis, sed nordoriente en la stelsistemo de Koĉero aperis brila stelo Kapelo.

XII.

*Pri tio, kiel la olda Protagoro
ne povis procesakiri sian honorarion,
pri tio, kiamaniere oni fidelu al sia instruisto
kaj pri la trafikreguloj
ĉe konstruado de pensoj kaj frazoj.*

Jam ĉiuj troviĝis ĝiszone en la akvo. Ili ĵetadis inter si malpezan pilkon. Akvomaro surŝprucis jen tiun, jen iun alian sur la bruniĝinta dorso. La suno laboregis, kiel por la vera suno decas. Sur la piradiitaj haŭtoj oni povus sekigi kuracplantojn ...

Kiam ili jam perdis spiron, Duŝan lanĉis la pilkon subarben. Ili eliris el akvo kaj ronde sidiĝis antaŭ ambaŭ tendoj. Por ion diri, Georgo diris al la profesoro:

”Vi ĝis nun nenion diris, kiamaniere ni pagu al vi honorarion por via instruo pri filozofio. La antikvaj grekaj sofistoj laŭrakonte antaŭmetis impresigajn fakturojn ...”

Ĉiuj ekridis. Speciale sinjorino Majda. Ankaŭ la profesoro devis ridi. Li pesis ŝtoneton en sia mano kaj respondis:

”Kredu al mi aŭ ne, kelkaj moneroj min bone priservus, sed mi ne kuraĝas skribi por vi fakturon.”

”Kial do ne?” demandis ĉiuj unuvoĉe.

”Ĉar povus al mi okazi la samo, kio okazis al la olda Protagoro ...”

”Kio do okazis al li?” denove demandis la koruso.

”Tiu instruisto de lerta argumentado, alivorte sofisto, kaptiĝis en propra kaptilo.”

”Kia estis tiu lia kaptilo?” demandis Adela.

”Ĝi tekstis: ’La homo estas la mezuro de ĉiuj aferoj ... ’”

”Ĉu ne tute prudenta frazo?” diris Georgo.

”Ĉi tio povus esti,” ironimienis la profesoro, ”se la homo estus la lasta instanco, la plej altranga estaĵo — kaj se inter unuopaj homoj ne estus diferencoj.”

”Sed kial ĉio ĉi estas grava?” ankaŭ Tanja ne povis kompreni.

”Vidu,” li puŝis sian fingron en fajnan marsablon, ”se la homo pretendas esti la mezuro de ĉiuj aferoj, do li devas havi proksimume samajn kvalitojn kiel tiuj objektoj, laŭ kiuj oni mezuras longecon, pezon, tempon, temperaturon ktp. Diru, kiu estas tiu kvalito, kiun oni postulas de bona mezurilo?”

”Mi preferas diri, ke antaŭ ĉio la stabileco, la neŝanĝemo,” konstatis Duŝan.

”Ĝuste tiel estas. Tial la prametro estas farita el plateno kaj ne ekzemple el vakso. Sed diru, kiuj estaĵoj havas pli firman stabilecon, ĉu pli aŭ malpli perfektaj?”

”La pli perfektaj. Ni jam konstatis, ke ĉiuj ŝanĝiĝoj estas sekvo de malperfekto,” denove brilis Duŝan.

”Tio estas vera. Sed nun diru al mi, kie troviĝas la homo koncerne perfektecon?”

”La homo estas la plej perfekta estaĵo!” rapide ensaltis Adela.

”Ĉu vere?”

”La homo povas el ĉiuj estaĵoj plej proksimiĝi al la perfekteco,” plibonigis Tanja.

”Verŝajne pli pravas Tanja, ja se estus tiel, kiel difinis Adela, nia laboro estus vanta, ĉar la homoj jam estus perfektaj ...”

”Sed kial ĉiuj homoj devus estis egalaj, egale perfektaj, se la homo estus la mezuro de ĉiuj aferoj?” demandis Georgo.

”Ĉar ne estas tute egale, ĉu la mezuro de ĉiuj aferoj estas Sokrato — ĉu, ni diru, Meleto, kiu lin kun siaj kamaradoj antaŭ la atena tribunalo akuzis kaj finfine puŝis en la morton. Se iu diras, ke la homo estas la mezuro de ĉiuj aferoj, li devas apude — senkonsidere la antaŭan rimarkon — diri ankaŭ tion, pri kiu homo konkrete li pensis, ja la homoj estas tre diversaj, do ankaŭ ilia mezurunuo estas tre diversa ...”

”Bone,” Adela satiĝis de rondira parolado, ”sed io tamen devas esti la mezuro de la aferoj. Se ne la homo, kio do?”

”Se temas pri mezurado de naturaj fenomenoj, ni aranĝas interkonsentojn, konvenciojn. Niaj fizikaj mezuroj estas interkonsentitaj, ni starigis ilin surbaze de relative plej stabilaj naturaj fenomenoj.”

”Sed kio pri la kampo de la homa interna vivo, pri la kampo de moralo kaj arto, feliĉo kaj kontento?” Adela volis iri ĝisfunden.

”La arton prijuĝas certa spirita kapablo, kiun oni nomas la bona gusto.”

”Sed ĉu gustoj ne estas diversaj?”

”Jes kaj ne. Ili estas diversaj koncerne ne tiel gravajn unuopajn aferojn kaj detalojn. Sed ili akordas en la aferoj esencaj. Ekzemple: pri la plej grandaj artoverkoj kaj pri la plej majestaj naturaj fenomenoj regas plena akordo en prijuĝoj. Vi ne trovos homon, kiu povus serioze aserti, ke La melosa Afroditaŭo estas neestetika. Ke la katedralo de Milano ne estas belega. Ke kontraŭas la homan guston pri beleco la ruĝ-

luma sunsubiro ... La demando pri malakordo inter unuopaj gustoj aperas nur tie kaj tiam, kie kaj kiam la parto de homoj estas ŝirita de siaj radikoj aŭ tie, kie la socio komencas en ĉiu senco regresi, dekadenti kaj kaduki. Konfucio diris, ke la ŝtato komencas disfali en la muziko ...”

”Kaj kio estas tiu komuna mezurunuo en la aferoj de la moralo?” kontinuus enketadon Adela.

”La komuna mezurunuo de la moralo estas la homa konscienco. La ĉefa leĝo de la konscienco, do la baza mezurunuo de ĝi tekstas jene: 'Kion vi volas, ke aliaj al vi faru, faru ankaŭ vi al ili!' — En tio resumiĝas ĉio. Ĉiu spirite sana homo amas sin mem, do li volas, ke ankaŭ aliaj lin amu. Li ŝatas ricevi de aliaj bonecon kaj paciencon, rekonon kaj komprenemon. Sekve li regalas ilin per samaj valorajoj! Cetere: ne forgesu, ke tiun bazan formulon esprimis ĉiuj tradiciaj mondreligioj: judaismo, kristanismo, islamo, budhismo, hinduismo, konfuciismo kaj taoismo.”

”Sed ne ĉiuj aŭdas sian konsciencon ...”

”La Dekalogo, dek Diaj ordonoj, kiujn esence akceptas la tuta homaro, eĉ se sub aliaj nomoj kaj formuloj, estis sur Sinajo diritaj tiel laŭte, ke Hebreoj, kiel raportas la Malnova testamento, petis Moseon, aranĝi ĉe Jahveo pli mallaŭtan proklamadon ...”

”Do denove la Dia leĝo estas tiu baza mezurunuo, sub kiun ni devas nin subigi ...” disrevigite diris Adela.

”Laŭ via plaĉo kaj gusto vi povas vin subigi ankaŭ al leĝoj de Hitler aŭ Stalin ...” ne povis eviti iometan sarkasmon Andreo.

En la kapoj de la junaj filozofistudentoj disverŝiĝis certa hontosento. Kiel neniam antaŭe ili sentis, ke ekzistas aferoj,

en si mem tiel firmaj, ke pri ili dubi kaj ŝerci estas — aĝuste. Ili estis savitaj pro la senkulpa demando de Tanja: "Kio pri tiu helena filozofo Protagoro? Kiamaniere li kaptiĝis en sian kaptilon?"

"He, mi tute forgesis, tiel ni devojiĝis ... Protagoro instruis filozofion kaj retorikon al fraŭlo, kiu volis fariĝi advokato. Ili interkonsentis, ke post la studadfino la fraŭlo pagos al li la instruhonorarion post sia unua juĝproceso, se li ĝin gajnos. Se li perdos — tiugrade la filozofo fidis pri la kvalito de sia instruo — lia disĉiplo ne devos pagi.

La junulo bone lernis ĉiujn lingvajn gimnastikaĵojn kaj post la instrua tempo ne fariĝis advokato, sed elektis alian profesion. La instruisto, kiu sin sentis trompita, akuzis lin ĉe tribunalo por ricevi instruhonorarion. Antaŭ la tribunalo li tiel argumentis pri sia rajto: Se la proceson gajnos la iama disĉiplo, li pagu laŭ la interkonsento, ja temos pri lia unua proceso. Sed se li la proceson perdos, li pagu laŭ la verdikto de la tribunalo. La juĝistoj estis scivolemaj, kiamaniere argumentos la akuzita studento. Li, fidela al la instruo de sia majstro, proponis al la juĝistoj, ke ili lin liberigu de la devo pagi, same tiel el du motivoj: se li la proceson perdos, do laŭ la interkonsento kun la instruisto, sed se li la proceson gajnos, do laŭ la verdikto de la estiminda tribunalo.

Nu, ĉar mi prenas vin samtiel sagacaj disĉiploj, mi ne aŭdacas antaŭmeti ĉe vi mian fakturon, por ke ne okazu al mi la samo, kiel okazis al la olda Protagoro el Abdero ..."

Ili laŭte ridis. Ili ĉiuj asertis, ke ili sian scion neniukaze misuzus kontraŭ la intereso de sia instruisto. Sed li diris al ili: "Se vi ne uzos vian scion ankaŭ kontraŭ mi, tio signifas, ke mi vin malefike instruis."

”Sed kio pri la fidelo al la instruisto?” advokatis Duŝan.

”Fidelo en filozofio ne estas samtipa kiel fidelo al homoj ĝenerale.”

”Kiel,” diris Tanja, kiu alte aprezis fidelon, ”rigardu nur instruiston pri gimnastiko. Tiu havas multajn komunajn ecojn kun la instruisto pri filozofio. Gimnastikinstruistoj estas homoj, kiuj siatempe mem okupiĝis pri certa sporta disciplino. Sed kiam ili fariĝis pli aĝaj kaj tiel ne povis plu atingi pintajn rezultojn, ili komencis instrui junajn homojn. Ĉu vi ne havas impreson, ke bona lernanto el motivoj de fideleco kaj dankemo devus bremsi sian kuradon kaj malaltigi sian saltadon por tiel ne distingi sin de sia instruisto?”

”Tio estus en esenca kontraŭdiro kun la celo kaj senco de la trejnado!” diris Adela.

”Do, vi vidas, ke la fidelo ne troviĝas en blinda sekvado kaj postlamado de la instruisto. Kiu sportisto estas laŭ via opinio plej fidela al sia instruisto?”

”Ĝuste tiu, kiu lin per siaj rezultoj superas ...” diris Georgo.

”Tiel estas. La instruisto ne instruis restadon ĉe jam atingitaj rezultoj, sed ĝuste superadon de ili. Se tiel, do diru al mi, kion efektive instruas la instruisto de la filozofio?”

”Koni la sencon kaj veron pri la mondo kaj laŭ tio vivi!” recitis Duŝan.

”Tiel estas. Sed, ĉu la instruisto instruas jam konatan kaj kompletan veron pri ĉiuj aferoj — aŭ ĉu li instruas nur la manieron, metodon, kiamaniere plej bone proksimiĝi al la vero kaj kiamaniere ĝin distingi de la malvero?”

”Mi pensas, ke prefere la duan aferon, ja cetere filozofio ĉesus ekzisti kaj fariĝus nura historio pri si mem!” diris Adela.

”Jes, mi same pensas,” konfirmis Andreo. ”Sed nun bonvolu al mi diri: ĉu pli fidelas al la filozofia instruo tiu disĉiplo, kiu dum sia tuta vivo nur ripetas tion, kion li aŭdis de sia instruisto — ĉu prefere la alia, kiu uzis la akiritan scion por trovi en la instruo de sia instruisto mankojn kaj truojn kaj leviĝas al pli alta kono?”

”Se tiel,” diris Duŝan, ”la pli fidela tamen estas tiu dua ...”

”Sekve ni devus diri, ke la fidelo de filozofoj ne estas en senkritika imitado de la instruisto, sed ĝuste en laŭeble plej sukcesa superado de lia instruo. La granda Platono havis en sia Akademio dekojn da disĉiploj. Sed unu sola vere konservis sian nomon tra la tuta historio. Temas pri Aristotelo, kiu apud sia respekto al la instruisto, tamen refutis multajn liajn ideojn kaj starigis tian soklon de la filozofia konstruaĵo, ke ĝis nun neniu ĝin serioze povis anstataŭi per io pli konvinka. Kaj ĝuste li diris: ’Platono estas mia amiko, sed la vero estas mia pli granda amiko!’ — Jen tiel aspektas vera fidelo de filozofoj!”

”Se tiel, do la plej fidela disĉiplo ĉiam estas tiu, kiu plej sukcese superas sian instruiston — kaj kontraŭe, la plej malfidela estas tiu, kiu plej papage lin imitas, ĉu?” kontinuis la penson Georgo.

”Ĝuste.”

”Sed se tiel,” ensaltis Adela, ”do la filozofo Karlo Marx ĝis nun ne trovis sian vere fidelan disĉiplon, ja postsekvis lin pli malpli nur la roto da epigonoj, kiuj laŭ nia ĵus formulita kriterio povas validi kiel tipaj malfideluloj ...”

”Tion vi tre bone registris!” diris Andreo. ”La filinoj de Marx, Jenny kaj Laura, okaze starigis al sia patro aron da demandoj, kiaj eĉ nuntempe kutimas en multaj gazetoj kaj ma-

gazenoj. La lasta demando estis: 'Via plej preferata eldiro ...' Kaj la respondo tekstis en la latina: De omnibus dubitandum — pri ĉio endas dubi. — Sekve, tiu, kiu vere volas atingi la statuson de fidela disĉiplo de Marx, ne povas ignori tiun lian bazan principon. Sed nia historio plenas de ironio: ĉiu, kiu nur iomete provis pridubi la doktrinon de Marx, tuj estis proklamita 'reviziisto' kaj 'burĝa konservativulo', kvazaŭ tiuj ĉi estus filozofiaj kategorioj. Esti 'reviziisto' efektive estas por ĉiu filozofo granda komplimento, ja la baza tasko de ĉiu eĉ ne nepre filozofianta, sed jam nur simple inteligenta homo, estas revizii la ĝenerale validajn konceptojn, hipotezojn kaj doktrinojn. Sen tio la homa scienco kaj saĝo por ĉiam restus sur la komenca nivelo."

"Kiamaniere vi imagas tian probablan vere fidelan disĉiplon?" demandis Adela.

"Neniu povas fariĝi originala, se li dum certa tempo ne imitis sian instruiston. Do li devas forgesi pri rapida moderna kariero kaj interesiĝi pri tiuj, kiujn la moderna preterlasas aŭ flankenpuŝas. Li devas akiri solidan instruitecon, same kiel tion faris Marx. Li devas legi la plej renomajn poetojn, kiel tion faris Marx. Li devas ĉion submeti al senkompata kritiko, kiel predikis, kvankam ne ĉiam faris Marx. Kaj finfine, li devas submeti al tiu kritiko ankaŭ la doktrinon de Marx mem: elfosi la sociajn kaj spiritajn kialojn de liaj eraroj kaj flankajoj kaj atentigi pri tio, kio tamen povas supervivi el lia penssistemo. Vi vidas mem, Marx sian vere fidelan disĉiplon daŭre atendas sub la modeste aranĝita tombo en la londona tombejo Highgate. Liaj veraj disĉiploj probable estas filozofoj kiel Nikolao Berdjajev, Karlo Popper, Leszek Kolakowsky kaj si-

milaj, kiuj denunciis la ĉefajn erarojn en lia doktrino, kvankam ili eliris ĝuste el lia instruo.”

Sinjorino Majda ofertis etajn sandviĉojn kaj teon, plibonigitan per iomete da vino.

”Mi tamen ne povas kompreni, sinjoro profesoro, kian intencon vi postsekvis, rakontante al ni la anekdoton pri Protagoro ...” manĝante sian sandviĉon demandis Adela.

”Mi volis vin atentigi pri la signifa parto de la filozofio, sen kiu ni verdire ne povas progresi.”

”Kaj pri kio konkrete temas?”

”Tion oni nomas — logiko.”

”Tiun ĉi vorton mi ofte aŭdas ...” diris Georgo.

”Jes, sed nur malofte oni ĝin uzas en ĝusta senco. Homoj por preskaŭ ĉiu afero, kiu ŝajnas al ili kredebla, diras, ke ĝi estas logika. Verdire tio ne havas ligon kun la logiko.

”Do, kio la logiko efektive estas?” demandis Tanja.

”La logiko ne estas io alia ol respekto pri la trafikaj leĝoj en la kuro de niaj pensoj, por ke ili ne koliziu.”

”Mi ne komprenas, kian ligon la pensado havas kun la trafiko?” pridubis Duŝan.

”Fortan. Se du veturiloj veturus el kontraŭaj direktoj sur la sama trako, ili nepre kolizius. La samo povas okazi, kiam ni fraze formulas niajn pensojn.”

”Nun mi komprenas,” ĝojis Duŝan, ”se oni en la unua parto de la frazo ekzemple ion asertas, kion la dua frazo negas ...”

”Ĝuste pri tio temas.”

”Sed da logika instruo troviĝas tutaj libroj kaj ni ne havas plu tiom da tempo!” esprimis sian zorgon la sinjorino.

”Ne gravas. La tuta logiko baziĝas sur unu frazo, kiun oni povus nomi la semaforo de la filozofio.”

”Kaj ĉu tio sufiĉos por nia bezono?”

”Detalojn vi povos lerni el libroj, sed tio principe sufiĉas.”

”Kaj kiel tekstas tiu frazo?” hastis Georgo.

”La sama kozo ne povas samaspekte kaj samtempe esti kaj ne-esti.”

”Kaj tio nura estas tiel signifa eldiro?” miris Adela.

”Tio estas en filozofio same signifa konstato, kiel en fiziko la leĝo pri la nenuligeblo de la materio!”

”Kaj ĝia vera signifo estas ...” volis kompreni Tanja.

”Tio estas la leĝo pri la ekskluzivita kontraŭdireco. Sen konsideri tiun ĉi leĝon oni ne povas pensi kaj paroli sencohave, ja oni povus aserti ion ajn kaj ĉio havus la saman ŝancon esti: ĉu vera, ĉu nevera. Tio simple signifas, ke io blanka ne povas samtempe kaj samaspekte esti ankaŭ nigra. Ke la malbono ne povas esti samtempe kaj samaspekte la bono. Ke la mensogo ne povas samtempe kaj samaspekte esti la vero ... Certa afero povas esti blanka aŭ nigra, bona aŭ malbona, vera aŭ malvera, sed neniam samtampe kaj samaspekte ambaŭ el tio.”

”Se tiel, kiamaniere do povas ekzisti en la aferoj interna kontraŭdireco, kiu ilin evoluigas, kiel ni lernis en la lernejo?”

”Adela, tiu, kiu diras, ke interne de la fenomenoj troviĝas kontradikcioj, ne konas sufiĉe bone la nociojn, kiujn li uzas, se li diras ’kontradikcio’ tie, kie li devus diri ’kontraŭeco’. En la moviĝanta objekto ne troviĝas kontradikcio, sed jes la kontraŭeco inter la forto, kiu ĝin retenas en origina pozicio kaj la forto, kiu ĝin movas.”

”Kaj kio pri la kontraŭdiroj en la socio?”

”Estas la sama situacio. Ankaŭ ĉi tie ne temas pri veraj kontraŭdiroj, kiel tion nomas marksisma doktrino, sed pri

simplaj kontraŭecoj, ja cetere la socio povus samtempe kaj samaspekte ekzisti kaj ne ekzisti. Per tia saĝo oni ne povus multon aranĝi. Sed troviĝas kontraŭecoj inter la tavoloj de la socio, inter riĉaj kaj malriĉaj, regantaj kaj regataj, kleraj kaj malkleraj, gvidaj kaj gvidataj, perfortemaj kaj neperfortemaj ktp. Tamen tio ne estas kontraŭdiroj, sed simplaj kontraŭecoj. Tiu, kiu estas riĉa, ne povas samtempe kaj samaspekte esti malriĉa.”

”Pro kio, vi pensas, tamen tiom multaj obstine uzas la nocion ’kontraŭdiro’ tie, kie oni efektive devus paroli pri simpla kontraŭeco?”

”Filozofiaj sistemoj, kiuj elĵetis el si metafizikon, multajn esencajn aferojn ne plu povas klarigi. Tial ili estas devigataj kaŝe enkonduki metafizikon sub alia nomo. Same, kiel fizikistoj dum longa tempo parolis pri flogistono, ĉar ili ne povis el siaj kalkuloj klarigi la fenomenon de brulado, materiismaj filozofioj bezonas ian similan kategorion, do ili enkondukis la misteran nocion ’kontraŭdiro’, kiu en ilia sistemo sorĉbastone solvas ĉiujn problemojn. Se vi bone legas la doktrinon de Marx, vi vidas, ke ĉio tuj senprobleme klariĝas kaj efektiviĝas pere de la vorto ’kontraŭdiro’. Ĝi funkcias precize same kiel flogistono ĉe iamaj alkemiistoj! Se biologo kiel sciencisto devas miri pri la fakto, ke funkcias la vivo, funkcias laŭ la principoj de plej altnivela racieco, lia marksisma kolego ne bezonas plu miri — kaj tamen la kapablo kaj preteco miri estas la baza kvalito de ĉiu filozofo — ja li disponas pri sorĉa nocio ’kontraŭdiro’, kiu tuj ĉion klarigas, almenaŭ lia opinie klarigas. Li metas fingron sur sian frunton kaj saĝmiene diras al si: ’Jen la vivo estas rezulto de la evoluo, kiun lanĉis la interna kontraŭdiro de la substanco ... ’ Nu, tiel. Li

povas sin kontentigi per klarigo ŝajne sufiĉa, sen bezono, ke li esploru la faktojn kiel vera biologo tion faras.”

”Sed, Dio mia, sub tiu ĉi litkovrilo povas kaŝiĝi ĉio, kion oni volas havi ...” skandaliĝis Duŝan.

”Kompreneble. Tia nocio ŝtopas ĉiun truon de nescio, sed samtempe faras ĉiun paroladon senliga kaj relativa. Tre uzebla kaj oportuna invento. Tiamaniere oni povas ĉion diritan proklami relative vera. Se vi en pasinta tempo apartenis al kontraŭhoma reĝimo, ĉu nazia, ĉu komunisma, vi povas elegante elturniĝi, uzante la formulon: ’Ekzistas pluraj veroj ...’ — senkonsidere, ke eble ĝuste vi dum multaj jaroj sangoplene persekutis ĉiun provon trovi ’alian veron’ ol tiun kian vi altrudis. Efektive la truko de marksisma nocio ’kontraŭdiro’ estas nur provo, kiamaniere prezenti sian doktrinon vera, sen formale peki kontraŭ la logiko. Do, la logiko devas esti anstataŭigata per ’dialektiko’. Tiel ni povas iom post iom kompreni la starpunkton de Paskalo, ke logikon oni devas krediti per bona moralo ...”

Iu ĵetis pilkon en la akvon. Junaj korpoj sin ĵetis post ĝi, la akvo kirligis en multaj etaj gejseroj. Andreo sidis sur sia ŝtono. Lia edzino prenis lian kapon en siajn manojn ...

XIII.

*Kiamaniere vivas rabistoj
kaj kion serĉas la ŝtelisto
en memserva vendejo ...?*

Ili eliris el kinejo. Streĉa franca krimfilmo Ligo de ĝentlemanoj. En iliaj oreloj daŭre eĥis ekscita filmmuziko. Finfine oni devas senti kompaton pri tiuj ĝentlemanecaj rabistoj. Tiom da preparlaboroj — kaj finfine oni sin trovas en polica veturilo ... Ne estas multaj direktoroj, kiuj en siaj firmaoj investus tiel seriozan laboron kiel tiuj ĉarmaj krimuloj.

”Ĉu ne estas iel nekutima situacio, ke ĝuste la filozofia kolegaro iras spekti krimdramon ne vere ŝekspirnivelan?” kun manoj en sia vakera pantalono diris Adela. Laŭ ŝia sinteno, akirita post tro da vesternoj kaj televidaĵoj pri Travolta oni ŝin ne tro facile alkategorius seksapartene. Ŝiaj gamboj ĝiszone kondukis virstile. Ŝia kapo per nazeto, brovoj kaj mentono estis trajtita ĉarme ine, sed kion fari, se ŝia buŝo parolis same virece ... Ŝi provokis la profesoron en eternan kvereladon, sed samtempe ŝi estis lia plej bona disĉiplo. Jes, estis iamaniere bele havi siaflanke la ĝentilan modeston de Tanja. Aŭ natursanan maldelikaton de Duŝan. Plej malmulte kongruis kun la filozofia klopodado de la tendaro tiu tro eta preteco por respekti faktojn kaj logikon, kiun povis proponi Georgo. Adela estis dura nukso. Sed ĉiu frukto, kiu interne havas plengustan kernon, havas malmolan ŝelon. Ĝis la vera fruktodeliĉaĵo

oni povas atingi nur per de manipulo pikitaj kaj frapitaj fingroj.

”Probable la afero eĉ ne estas tiel eksterkutima,” trankvile diris la profesoro. La grupo de lokaj fraŭloj kantante devojiĝis en apudan strateton.

”Ĉiam laŭaspekte,” li kontinuigis, ”rabisteco estas unu el limaj homaj situacioj. Sed ĉiuj limaj situacioj estas tre oportunaj por lerni filozofion. La homo, troviĝanta en ekstremo, estas kiel geometria modelo. Oni komprenas la geometrion de la monto, kiam oni studas konuson. La homon oni komprenas — ĉiam nur certgrade, kompreneble — kiam oni studas rabiston ...”

”Se tiel, do vi opinias, ke la homo laŭ sia esenco estas rabisto?” ektimis Duŝan.

”Verdire, la homo efektive laŭ sia esenco estas rabisto. Temas nur pri tio, kio estas la sole valora trezoraĵo kiu valoras nian rabistan penon!”

”Laŭ mia scio la rabistoj antaŭ ĉio preferas havi monon!” diris Tanja, ne tro konvinkita pri moralaj avantaĝoj de la rabista tribo.

”Laŭ la unua rigardo tio probable estas vera. Sed, ke homoj risku sian vivon por tiuj inflaciaj paperaĉoj, tion mi ne povas vere kredi ...”

”Sed por tiuj aĉaj monbiletoj vi ricevas kion vi volas havi, se vi ilin havas,” insistis Tanja.

”Do, ili tamen ne alstrebas la monon, sed tion, kion ili per mono povas akiri, ĉu ne?”

”Nu jes ...”

”Vidu, ĝuste ĉi tie kaŝiĝas la problemo. Por via mono vi ne povas ricevi ĉion, kion vi vere deziras, sed nur tion, pri kio la

homoj kredas, ke vendiĝos kontraŭ la mono. Se tiel, do ĝuste la rabistoj plej serioze prenas la ĝeneralan prijuĝon pri tio, kio havas valoron kaj kio ne, ja ili estas pretaj por tiuj valorajoj riski eĉ siajn liberon kaj vivon, sian tutan sorton kaj ne nur relative komfortan sidadon en iu bone pagita postenseĝo ...”

”Se mi bone komprenas, vi eĉ simpatias kun rabistoj kaj apologias pri iliaj faroj, ĉu?” diris Duŝan.

”Sankta Aŭgusteno en sia libro *De civitate Dei* — pri la Dia ŝtato — rakontas anekdoton pri Aleksandro la Granda. Kiam li surmare kaptis piraton, li demandis lin, kial li estas tio, kio li efektive estas, nome pirato. La pirato kviete klerigis la regnestron: ’Tial, mia reĝo, ĉar mi havas nur unu galeron. Se mi havus tutan ŝiparon, mi estus Aleksandro la Granda ... ’ La sprita anekdoto bone montras, kiel relativaj povas esti la homaj nocioj kaj prijuĝoj. Atentu do: mi ne apologias favore al rabistoj; sed mi asertas, ke en la mondo, kiu proklamis materian trezoraĵon la plej alta valoro, ĝuste la rabistoj kondukas konsekvence. La historio de rabado ne komenciĝas per enrompo en la templon, sed per muldado de la ora bovido, kiel raportas la unua libro de Moseo ...”

”Mi ne povas komplete sekvi vian klarigon ...” diris Adela.

”Jes, mi mem ne scias, kiel tion bone ekspliki. Ni diru tiel: Se iu povus forigi la sunon kaj meti sur ĝian lokon la petrol-lampon, tiu homo certe estus multe pli granda fripono ol la ŝtelisto, kiu poste ŝtelus tiun lampon. La unua prirabus nin de la suno, dum la dua prirabus nin nur de io senvalora.”

”Do vi estas konvinkita, ke ankaŭ en nia ĉiutaga vivo iu forprenis aŭ almenaŭ ombrigis la veran sunon — kaj metis tien facile ŝteleblan lampaĉon — kaj nun ĝuste tiu homo plej

laŭte skandaligas super tiu, kiu tiun ĉi senvaloran falsajon ŝtelas de tiu minimumigita firmamento, ĉu?” diris Duŝan.

”Jes, pri tio mi estas firme konvinkita. Kiam la homoj stariĝas sur la soklon de la plej alta valorajo ion tian, kian oni povas per perforto, per ruzo aŭ trompo forpreni, tiam ili mem produktas rabistecon, ili mem estas la plej grandaj rabistoj ...”

”Kaj tial vi opinias, ke tiuj, kiujn oni kutime nomas rabistoj, efektive estas eĉ pli bonaj homoj ol tiuj, kiuj ilin unuflanke persekutas, sed aliflanke ili nin prirabis multe pli esence kaj funde, ĉu?” demandis Tanja.

”Jes, vere. Tiuj ĉi estas duoble malbonaj: Unue ili forigis la veran juvelon kaj anstataŭigis ĝin per vitroa falsaĵo. Finfine ili eĉ tion ĉi volas posedi kun plena certeco, sen ajna risko. Aliflanke la rabisto havas du bonajn argumentojn por si: Unue, li sincere kredas, ke en la trezorejo troviĝas vera valorajo, due, ĉar li pretas por tiu trezoraĵo riski sian vivon. Tial ne miru, se la unua oficiala kristana sanktulo, proklamita jam surkruce de Jesuo mem, estas la rabisto Dismas’ ...”

”Bonvolu tamen diri, kiamaniere oni povus trovi la aŭtentan trezoraĵon, se oni ĝin forigis de la soklo en trezorejo kaj multaj klopodas akiri falsaĵon?” diris Adela.

”Iamaniere eĉ la rabistoj troviĝas sur la ĝusta vojo ...” la profesoro insistis ĉe sia simpatio kun la rabista klano. ”Jam Platono skribis, ke eĉ la rabista hordo ne povas realigi siajn planojn, se ĝi almenaŭ interne de sia rondo ne respektas certajn moralajn principojn, kvankam ili la samajn principojn ekster de la rabista rondo krude rompas kaj malatentas. Efektive do eĉ la rabistoj scias pri la plej alta bono, ja sen parta atendo de ĝi ili eĉ ne povus realigi sian plej altan malbonon! Temas nur pri tio, ke ni komprenu la diferencon inter la bono

kaj la malbono. La unua havas sian memstaran eternan valoron, dum la alia ekzistas nur kiel parazito surŝele de la unua. Malbonon oni povas atingi nur, se oni almenaŭ parte plenumas la bonon. Oni povas rifuzi obeon al la reĝo nur, se oni eĉ pli strikte obeas al la ribelestro ...”

”Do, ĉu oni povus konstati, ke la morala vivo estas tiu plej alta valorajo, al kiu indas kaj endas strebi?” demandis Georgo.

”Ni sekvu la vojon de la knabeto, kiu en la memserva vendejo ŝtelis ian objekton, kia estis lia tendenco, kaj probable ni laŭ liaj spuroj atingos la ĝustan punkton ...”

”Nu, ni diru, ke li ekdeziris ĉokoladon ...” diris Georgo.

”Bone. Sed ĉu efektive li volis havi ĉokoladon? Li ne trezorigis, sed manĝis ĝin. Al kio do li vere tendencis?”

”Li volis satiĝi ...” senfantazie respondis Duŝan.

”Li povus bone satiĝi hejme. Finfine li povus por tiu celo ŝteli panpecon.”

”Do li volis havi sian ĉokoladan delicon ...”

”Bone. Li volis havi ĝuon. Sed kio estas la ĝuo, ĉu ne io, kio nin superas?”

”Povas esti ...”

”Se tiel, do la knabeto ne emis nur havi ĉokoladon, eĉ ne nur havi sian delican ĝuon, sed li volis havi travivaĵon, kiu plenumu al li ĉion tion, kio al lia interno mankas. Kaj kio al li mankas? Kio al ni ĉiuj mankas? Ĉu ne temas pri trankviliĝo de nia profunda maltrankvilo: rejustigo de ĉiuj maljustaĵoj, repago de ĉiuj ŝuldoj, konsolo pro la tuta suferado – kaj finfine akiro de la fina animstato en mistera eterna estonto ...”

”Unuvorte, temas pri saviteco ...” ironiis Adela.

”Ĝuste tiel. Ankaŭ tiu knabeto ŝtelis en la memserva ven-

dejo — nenion alian ol la savitecon mem. Kaj la rabistaj ĝentlemanoj en la filmo, kiun ni ĵus spektis, rabis la saman savitecon. Ĉiu krimulo kaj pekulo iamaniere tamen ŝtelas kaj kontrabandas la savitecon!”

”Bone, se tiel, kial la pekulo por ni estas pekulo, la rabisto rabisto, la ŝtelisto ŝtelisto, se tiuj noblaj ĝentlemanoj vere okupiĝas pri tiel alta afero kiel la saviteco mem?” pri la dirita konstato pridubis Tanja.

”Via demando havas sian rajtigon. Ilia peko troviĝas en tio, ke ili faras tro grandan ĉirkaŭvojon, tro komplikan kurbiĝadon. Ĉar ili sin lasis trompi de la ora bovido, kiun la profana mondo daŭre prezentas kiel la ĉefan diaĵon, ĉar ili sian eminentan valorsistemon, kiun ili cetere uzas interne de sia hordo, bedaŭrinde ne uzas ĝenerale ankaŭ en la ekstera mondo. Se nia filmrakonta ’ligo de ĝentlemanoj’ kondukus ĝentlemane ankaŭ ekster sia klano, ĝiaj adeptoj en postsekvo de la saviteco ne farus tiel grandan devojiĝon tra la banka trezorejo. Se la knabeto el la memserva vendejo sin same disponus al ĉiuj homoj, kiel li sin disponis al sia bubaĉa hordo, li ne bezonus fari ĉirkaŭvojon al saviteco preter kasistino en la vendejo kaj li ne deŝelus sian plej altan bonon el la banala ĉokolada staniolfolio ...”

”Por vi do la malbono ne estas io alia ol la nura ĉirkaŭvojo al la bono, do la bono en limigita amplekso, ĉu?”

”Ĉu vi konas homon, kiu konscie alstrebus por si mem malbonon? Vidu: niaj filmrakontaj ĝentlemanoj kun maŝinpistojoj ne rifuzis savitecon — nur ili opiniis, ke la mono estas la rimedo por savi la homon, do ili faris ĉirkaŭvojon tra la banka trezorejo; kaj la knabo, kiu ŝtelas, li same ne rifuzas la savitecon, nur li erare opinias, ke li trovos ĝin en la dolĉa gu-

sto de la ĉokolado ... Tial mi opinias, ke la malbono estas ne uzi la plej rektan vojon kaj ne uzi la principojn, kiujn ni aplikas interne de unuopaj grupoj, eĉ rabistaj, en ĉiuj okazoj kaj kun ĉiuj homoj.”

Surstrate odoris fiŝaromo. Ĉe iu patricia enirejo katoj aranĝis siajn konfliktojn per laŭtaj krioj. Tra fenestraj vitroj blue radiis televidaj programoj.

”Sed mi timas, sinjoro profesoro,” interrompis la silenton Georgo, ”ke tiu saviteco, kiel vi tion nomas, estas ekstreme enua afero!”

”Ĉu vi tion diris kiel kredanto, ĉu kiel nekredanto, ateisto?”

”Ateisto, kompreneble!”

”Do, vi faris samtempe du logikajn erarojn ...” ekridis la profesoro.

”Kial do?” la junuloj scivole reagis.

”Unue, ĉar vi kritikis la transcendon, pri kiu vi cetere ne kredas, ke ĝi ekzistas. Vi diris jenon: ’Mi ne kredas, ke la alia mondo ekzistas, sed mi asertas, ke ĝi estas terure enua ... ’” Ĉiuj ekridis. La kompatinda ateisto ŝanĝis sian staran pozicion, ne sciante, kion diri. Sed la profesoro kontinuigis: ”Kaj via dua eraro estas eĉ pli katastrofa ...”

”Mi preferas aŭdi ...”

”Kiel bona ateisto vi verŝajne akordiĝas kun la opinio de la germana materiisma filozofo Ludoviko Feuerbach, laŭ kiu la transcenda mondo estas nur la projekciaĵo de ĉio tio, kio en la homo estas plej bona, kion la homo sur tiu ĉi tero ne povis realigi; ke la kredanta homo verdire investas siajn plej noblajn ecojn en tiun firmamentan iluzion, ĉu?”

”Jes, mi kredas same, ke tio estas la esenco de la religia kredo.”

”Bone. Se tiel, do ankaŭ la imago, kiun homo havas pri tiu alia mondo, projekcias nur la internan enhavon kaj situacion de la koncerna homo, ĉu?”

”Memkompreneble.”

”Do ne temas pri malĝentileco, se ni konstatas logike: la imago pri la enua transcendo laŭ la teorio de Feuerbach, kiun komplete transprenis ankaŭ Marx, efektive estas nur la projekcio de la interna enuo de la homo, kiu tian imagon proklamas ...”

Georgo ne komentis. Neniu vere ridis. Ili iel sentis, ke ne temas plu pri komikaĵoj. La logiko efektive estas krude akra instrumento, kiu senkompate tranĉas kaj erigas, se iu neadekvata objekto al ĝi submetiĝas.

”Senkaŝe mi diras,” denove montriĝis la kuraĝa karaktero de Adela, kiu eĉ plej perditan aferon ne volas vidi vere perdita, ”ke ankaŭ mi ne povas vidi en la transcenda mondo ion interesan kaj feliĉigan, eĉ se mi povus pri ĝi firme kredi!”

”Kredu min Adela: se ni jam ĉi tie kaj tiaj, kiaj ni estas, povus havi adekvatan imagon pri la transcendo, ni efektive jam estus savitaj.”

”Kial, mi ne komprenas ...”

”Ni diru tiel: Ĉu povas havi adekvatan imagon pri poeziado homo, kiu neniam mem poetumis?”

”Certe ne.”

”Kaj pri agrikulturo, ĉu ia persono povus havi klaran imagon pri ĝi, se ne temas pri agrikulturisto mem?”

”Nur proksimume, sed precize tute certe ne.”

”Kaj koncerne sciencon: Ĉu vi opinias, ke iu povas havi vere scian mondatpercepton, sen ke li mem estu sciencisto?”

”Klare, ke ne ...”

”Bone, ni ne perdu vortojn pri anoj de certa politika skolo, kiuj sin proklamas posedantoj de la scienca mondpercepto, kvankam inter ili multaj efektive estas analfabetoj. Sed ni lasu tion. Vi vidas, ke ankaŭ pri la saviteco ni ne povas havi adekvatan imagon, dum ni ankoraŭ estas sklavo de la malbono; ni ne povas imagi la eternan feliĉon, dum ni troviĝas en la ĉenoj de la tempo; ni ne povas prijuĝi la distron de la transcendo, dum en nia interno regas dezerta enuo, produktita de nia narcisisma egoo ...”

”Bone,” diris Adela, ”mi agnoskas, ke vi trovis min en la sama kavo kiel mian kolegon Georgon. Sed bonvolu diri al mi, kiel oni povas sopiri pri io, kio ne troviĝas klare en nia imago; kiel sopiri pri la plej alta bono, kiun vi nomis saviteco, se ni ne povas ĝin adekvate imagi?”

”Vi tre logike procedas, Adela! Vi pravas, el propraj latentoj ni tion ne povus fari. Ni povas sopiri nur pri aferoj, kiujn ni jam iamaniere spertis, kio iamaniere estas parto de nia interna profunda vero. Sed ĉar tiu ĉi sopiro ekzistas, tion oni ne povas negi, do devas ekzisti ankaŭ io, kio ĝin provokas, kio ne estas iluzio, kio estas la plej profunda vero de nia esto.”

Georgo per sia piedo trafis la ŝnuron de la tendo. La sinjorino bruligis lampon, por ke la tendloĝantoj povu vidi ĉirkaŭ si. Iomete heligis petroleo, iomete la luno.

Ĉiu el ili post kuŝiĝo enprofundiĝis en sian personan sopiron ...

XIV.

*Pri tio, kiel ili ĉiuj
ne povis bruligi fajron —
kaj pri tio, kien montras
la homaj nazoj ...*

La boato balanciĝis kiel bebo en la patrina sino. La profesoro taskigis ilin almenaŭ unu tagon travivi kiel samsortanoj de Robinzono. Ili kunportis nenion krom tendumaj tranĉiloj kaj hakiloj, kiuj pendis de iliaj zonoj. Remiloj trapikis la akvofilmon; la profesoro turnis la direktilon, sinjorino Majda postĉasis ekvilibron en la pruo.

Ili havis antaŭ si ankoraŭ proksimume du horojn da brava remado. Tie malproksime jam desegniĝis iaspeca testuda dorso de la insuleto, kiun ili planis dum unu, du tagoj kolonizi kiel iamaj esploristoj de foraj maroj kaj teroj.

”Ŝajnas, ke remado en boato estas la plej karakteriza pozicio de la homo ...” kun ŝvitgutoj surfrunte diris Georgo.

”Jen tre preciza difino,” komentis la profesoro. ”Antikvaj Latinoj, kiuj vidis multe da maro, sciis diri: *’Memento, te esse viatorem!’* nialingve: Memoru, ke vi estas vojaĝanto!”

”Sen senĉesa vojaĝado verdire ne povus okazi multa progreso ...” diris ĉe sia remilo Adela.

”Hm ...” skeptikumis Duŝan, ”tio povus havi signifon, se la tero ne estus ronda. Sed tiel: bonvolu vojaĝi al direkto laŭ via plaĉo, ĉiam vi revenos al jam atingita loko ...”

La profesoro ŝatis, ke liaj disĉiploj sciis evoluigi sian dispu-

teton sen lia helpo. Li rigardis kontraŭ la kontinenta bordo, kiu pli kaj pli fariĝis apenaŭ videbla pentrista impersaĵo. Li tamen devos interveni:

”Adela, vi verŝajne havas certan imagon pri tio, kio estas la progreso ... ĉu?”

”Espereble ĉiu bone scias, kio estas la progreso ...” sen granda pripenso ŝi respondis, tirante sian remilon.

”Vera filozofo neniam diras, ke iu afero estas tiel klara, ke ĉiu ĝin tuj komprenu,” kontraŭstaris la profesoro. ”Provu do malrapide kaj konvinke al ni klarigi, kiel vi vidas la tutan aferon!”

Adela forte tiris sian remilon, ke aperis aerveziko, kvazaŭ ŝi remus en sapa ŝaŭmo.

”Ĉu vere estas tiel malfacile kompreni, kion signifas la nocio progreso, ja la vorto mem diras, ke temas pri movo antaŭen ...”

Neniu respondis. La deira bordo ne plu videblis. La insulo kaŝiĝis en vualo de nebuletoj. La profesoro subite ordonis, ke ili ĉiuj fermu siajn okulojn kaj blinde remu antaŭen. Ili obeis kaj miris pri la instrukcio. Dume la enamiĝantoj en saĝecon brave tiris siajn remilojn, Andreo turnis la direktilon, tiel ke la boato kelkfoje turniĝis surloke. Nur li plu sciis, kiu direkto kondukas al la insulo. Poste li ordonis denove malfermi okulojn.

”Diru al mi, Adela, ĉu ni glitas antaŭen, ĉu malantaŭen?” li provokis, sidante ĉe la direktilo. Adela rigardis ĉirkaŭ si laŭ tuta horizonto. Nenie orientiga punkto. Ĉie vualo de nebuletoj.

”Verdire mi ne havas ideon!” ŝi honeste diris.

”Do, bonvolu remi antaŭen ...!” diris Andreo kaj dronis en

sian silenton. Nur la direktilo facile tremetis en lia certa mano. Ili jam estis plene elĉerpitaj. Kiu povus supozu, ke bezoniĝas tiom pena remado por pli bone kompreni unu solan nocion ...

Finfine tamen montriĝis surhorizonte io, kio povus esti la insuleto. Tio paroligis la profesoron mem:

”Kiel do? Ĉu ni remas antaŭen aŭ malantaŭen?”

”Kompreneble antaŭen!” anstataŭ Adela respondis Georgo.

”Kiamaniere vi tion scias?” insistis la profesoro.

”Ĉar antaŭ ni troviĝas nia celo, la insulo!”

”Se la celo ne troviĝus, se ni ne remus al certa direkto, kiel tiu ĉi insulo, ĉu ni en tia okazo povus diri, ke ni remas antaŭen? Ĉu en tia okazo ne estus la ĝusta esprimo nur, ke ni remas, sed ke ni ne scias, ĉu antaŭen, ĉu malantaŭen?”

”Se oni tiel pensas, vi efektive pravas ...” agnoskis Adela.

”Do, se tio validas por simpla remado, ĉu ne samtiel ankaŭ por ĉiuj aliaj formoj de moviĝo kaj ŝanĝiĝo?”

”Jes, kial ne por ĉiuj okazoj ...” konsentis Georgo.

”Tiukaze ni povas eldiri prijuĝon, ke la progreso ĉiam estas moviĝo al certa celo aŭ sencopunkto, sed ne iu ajn moviĝo, ĉu?”

”Tiel estas ...”

”Kaj progresi povas nur tiu, kiu por tia celo aŭ senco scias, ja cetere li ne povus scii, kien direkti sian direktilon,” tute boateca kontinuus Andreo.

”Sen scio pri la celo aŭ senco oni efektive ne povas paroli pri progreso,” agnoskis Georgo.

”Do, se tiel — kaj kiel montriĝas, ni ĉiuj en la boato konsentas kun tio — ankaŭ por la homa vivo samgrade validas,

ke progresas nur la vivo, kiu havas antaŭ si celon kaj sencon — kaj se la vivanto klopodas tiun celon atingi kaj sencon plenumi, ĉu ne?”

SinJORINO Majda rigardis, kiel ŝia edzo ĉiam malpli zorgas pri direktilo. Ŝi ne povis ne admoni lin:

”Ĉu vi ne preferus iomete atenti, por ke ni ne maltrafu la insulon, mi dirus ...” La remantoj ekridis, la profesoro iom malpli ...

”Ĉu vi intencas diri,” nun aŭdiĝis ankaŭ Tanja, ”ke progresema povas esti nur tiu homo, kiu scias, pro kio li vivas, kiu konas la sencon de sia ekzisto?”

”Ja alimaniere preskaŭ ne povas esti, se ni ĝis nun konkludis serioze,” diris la profesoro kaj kontinuis: ”Antaŭen ni povas veni nur, se nin ’antaŭe’ iu aŭ io atendas. El Kapodistrio mi ’progresas’ al Labako nur, se Labako estas la celo de mia vojo. Cetere ankaŭ Labako estas unu el multaj stacioj, sed ne direkto de mia progreso. Ĉiu progreso do nepre baziĝas sur la supozo, ke la homa vivo posedas antaŭ si certan celon kaj sencon. Se ni al tiu celo kaj senco proksimiĝas, do ni progresas; se ni malproksimiĝas de ĝi, sekve ni malprogresas.”

Adela ne trovis la aferon tute bona: ”La celojn kaj la sencon difinas ja ĉiufoje ni mem kaj ĉiu alimaniere, ĉu ne?”

”Tio, kio nin allogas kaj ĝojigas ĉiutage, ne povas esti nia kompleta celo kaj senco de nia vivo. Ĉiuj homaj vivoj finiĝas per la morto. Tien ni ĉiuj venas. Sed nia celo ne povas esti aliloke ol tie, kien ni ĉiuj iam venos — kaj restos ...”

”Sekve,” intervenis Duŝan, ”la morto estas nia lasta celo, ĉu?”

”Se la morto vere estus la lasta afero, kiu trafas la homon, tiam ni ne povus plu paroli pri ajna celo kaj senco plu. La

morto estus gratgumo, kiu forgratus kaj forviŝus ĉion, kion ni en nia vivo alstrebis. Do la morto nek povas esti nia celo nek nia senco.”

”Sed kio povas ankoraŭ renkonti la homon post lia morto?” ironibuŝe demandis Adela.

”Renkonti lin povas tio,” trankvile respondis la profesoro, ”kion li dum sia tuta vivo serĉis: renkontas lin lia vivosenco! Post nia morto ni iel-tiel trovas nian sencplenumiĝon — aŭ nia tendenco al la senco estas granda impertinento, per kiu la naturo nin trompas kaj turmentas. Sed, se ĝi scias tiel grandskale trompi, tiam ne temas plu pri nura naturo, temas jam pri diaĵo, eĉ se malica, kiu kapablas pensi kaj intrigi kontraŭ la homo. Ĉiuokaze ni konfrontiĝas kun estaĵo, kiu estas pli ol la naturo mem, kiu estas la spirito!”

La boato frapis kontraŭ la bordokreston tiel forte ke ili estis ĵetitaj kontraŭ la pruan. Georgo la unua saltis el la boato. La akvo atingis liajn genuojn. La profesoro ĵetis al li ŝnuron. Dum la junulo sin turmentis por fari nodon, la roto jam vadis al la solida tereno. Antaŭe paŝis la profesoro kaj lia edzino. Ili forpuŝis la verdan arbedaron. Georgo, kiu perdis tempon per nodumado, marŝis la lasta post ili.

”Nekredeble, baldaŭ estos nokto ...” diris Andreo, kiam li viŝis ŝviton de sia frunto.

”Tio signifas: prepari kuŝejon kaj fajron ...” komprenis Duŝan kaj tuj komencis serĉi branĉetojn kaj ŝtonojn, per kiuj oni povus frotruligi fajron.

”Duŝan, Adela kaj Tanja — prepari kuŝejon! Georgo, kiel ajn vi scias, ŝtelu fajron de la dioj; mia edzino kaj mi kolektos ion aĉan por vespermanĝo ...”

La societo, kiu ne jam tute komprenis, kion signifas la mal-

eblaj ordonoj de la profesoro, gaje ridis. Sed post certa tempo Georgo tamen demandis, hejme dorlotita de alumetoj, kiuj ĉi tie ne troviĝis: "Laŭ kiu metodo mi faru fajron?"

"Vi povas elekti," rikane ridis Andreo, "inter la metodo de la malnova kaj de la nova ŝtonepoko ..."

"... do inter la kunfrapado de du ŝtonpecoj kaj la uzo de borarka arkokordo, kiu turnas konusigitan bastonon sur la ŝtona plato ..." ironiis ankaŭ Adela.

Poste ili disiris al siaj okupoj. La aranĝantoj de kuŝlokoj havis certan sukceson. Ili dehakis piceajn branĉojn, per kiuj ili faris kuŝbenkojn kaj eĉ improvizis iaspecan tegmenton. Sinjorino Majda kolektis foliojn kaj berojn, kvazaŭ ŝi promenus en la memserva vendejo. Sed finfine ŝi forĵetis ĉion kolektitan. Al ŝi ŝajnis, ke ĉio verda verdas de veneno kaj ne de klorofilo. Sed plej malsukcesa montriĝis Georgo. Anstataŭ ke elsub liaj aboriĝenaj fingroj jam delonge kirliĝu fajra fumo, liaj fingroartikoj estis vundfrotitaj. De kelkaj ŝtonoj saltis fajrero, sed flamo ne aperis. Nun li turnis inter siaj manplatoj sekan bastoneton, kiun li prenis sur la borda sablo, sed ankaŭ tio ne donis rezulton. La bastoneto eĉ ne fariĝis varma, por ne diri, ke ĝi eksplodigu flamplenan fajron ...

Profesoro kun certa petolgrimaco observis la tutan penadon, kiu ne sukcesis atingi la deziratan rezulton. La plej grandan fiaskon ĝisvivis Georgo, kiu antaŭe plej laŭte parolis pri progreso, pri la venkoplana homa marŝo kontraŭ la misteroj de la naturo kaj de la socio. La tuta marŝo nun ne povis aranĝi tion, kion en kelkaj momentoj aranĝas ĉiu polinezia aboriĝeno, vivanta komplete ekster la 'progresema' marŝo de la homaro.

"Mi ankoraŭ ne vidas fumon ..." estis malica la profesoro,

kiam li kliniĝis super Georgo, kies frunto estis plena de ŝvito.

”Ne funkcias. Ne volas funkcii ...”

”Do, ni restos sen vespermanĝo kaj sen la protekta efiko, kiun donas la ŝtelaĵo de Prometeo ...”

Aranĝantoj de dormlokoj intertempe finis sian laboron. La kolekta antaŭtuko de sinjorino Majda restis malplena. La moderna urba 'squaw', kiu bone orientiĝas inter la industrie enpakitaj nutraĵoj, evidente perdas sian lerton, kiam temas pri sinprizorgo el la naturaj provizoj.

”Vidu,” iomete rezigne kaj iomete pedagogie alparolis Andreo la deprimitajn vizaĝojn, ”tio estas la punkto, kiun ni atingis helpe de la tiel nomata progreso, ke ni devos iri sen-vespermanĝe dormi, ke ni frostos kaj timos sovaĝajn bestojn kaj ke ni devos frumatene leviĝi kaj tuj remi returne al la firma tero, se ni volas gardi niajn vivojn. La naturo fariĝis por ni komplete fremda. Tiamaniere ni ĝin superregis ...”

Estis nur malfacile diveni, ĉu tio, kio dum la tro tro longa nokto okazis sub la improviziitaj branĉtegmentoj vere similis al dormado, ĉu ĉio tamen ne estis prisilentita vekado, kiu pro honto ne volis protesti.

Estu kiel ajn, sekvamaten la boato per multe pli granda rapido forlasis la insulon de la malsukcesa unutaga robinzonado, ol ĝi pasinttage al la insulo proksimiĝis. Iliaj manoj havis sufiĉe da laboro, sed iliaj pensoj havis inter unuopaj removejoj sufiĉe da tempo por okupiĝi per travivaĵoj.

”Kion vi diras pri tiu nia progreseca senpovo?” la profesoro ĵetis la ganton.

”Estus bele, se ni povus vivi tie sur la insulo almenaŭ sur la nivelo de aboriĝena konservativeco ...” amaris Duŝan.

”Ĉu ne estas iomete strange,” kontinuis la profesoro kaj iomete sin turnis de la direktilo, ”ke ni, la samaj homoj, tie sur la firma tero validas kiel heredantoj de la progresoplena kaj ĉiopova dudeka jarcento — sed tie sur la insulo eĉ kanibaloj hontus pri nia senkapablo supervivi?”

”Probable ni eĉ tute ne estas la heredantoj de tiu grandskala kaj proklamita progreso, eĉ tie sur la firma tero ne, sed ni simple estas senciaj senhereditoj, de kiuj la lerteco de la primitiva homo estas forprenita, dum tiun de la moderna homo ni tute ne akiris ...” komentis Georgo.

”Tiel eminenta penso vokas je honorario!” sen la kutima ironio ekkriis Andreo.

”Kiel do, ĉu ni estas progresemaĵo aŭ ne?” montris timon por sia heredaĵo Adela.

”Kion diras vi aliaj?” pedagogie procedis Andreo.

”Pri io mi havas klaran opinion. Nuntempe vere scias fari fajron nur la elito de kemiaj inĝenieroj, kiuj produktas alumetojn. Eĉ aliaj teknike edukitaj homoj konas tiun ĉi teknikon nur principnivele. Sed la plimulto de homoj pri la afero eĉ ne havas bazan ideon. Ili nur kapablas froti alumeton kontraŭ la raspa surfaco de la alumetskatolo aŭ premi sur la petrola aŭ gasa fajrigilo ...” respondis Duŝan.

”Kaj vi Tanja, kion vi diras?”

”Mi ĵus pripensas. Kiel simpla afero estas ekzemple la elektra ampolo. Sed ankaŭ ĉi tie verŝajne nur elito da inĝenieroj plene regas la teknologion, kiamaniere muldi la ĝustan volframan filamenton, spini el ĝi adekvatan glufadenon, kiu lumigas la ĉambregon per sia afabla helo.”

”Ankaŭ vi tre bone primeditis. Sed Adela, vi resumos ĉion tion, por ke ni sciu, kie ni efektive troviĝas ...”

”La homaro kiel tuto scias multege kaj ĝi progresas; sed la unuopa homo estas granda kompatindulo, kiu scias ĉiam pli malmulte, kiu ĉiam pli postlamas la ĝeneralan progreson ...”

”Jes vere, li estas multe pli kompatinda mallertulo ol estis nia praparenco en la Krapina kavo ...” aldonis plendon Duŝan.

Andreo ne tuj kontinuus la interparolon. Li permesis al remiloj plaŭdi sur la marsurfaco kvazaŭ iu vangofrapus ĝin. Kiel se en la boata fundo kolektiĝus certa angoro. Disreviĝo. Finfine li ekparolis:

”La afero do estas tia, ke tiu fenomeno, kiu ne estas la unuopa homo, kio ne estas Johano, Marta, Mateo, pli kaj pli kapblas kaj scias, dum Johano, Marta kaj Mateo fariĝas pli kaj pli malkapablaj kaj sensciaj ...”

”Tio okazas pro la divido de la laboro!” elvokis el sia lerneja memoro Adela.

”Certe,” konfirmis la profesoro. ”Sed ni devas nin demandi, ĉu estas bone, ke apud la laboro ni dividas kaj disrompas en erojn ankaŭ tiun bazan rilaton al la mondo kaj nia funkcio en ĝi, kiun ni nomas la senco? Ne estas tiel tragike, se ne ĉiu unuopa homo plu povas mem fari fajron, ĉar tiu tekniko fariĝis por li fremda aŭ ĉar ĝi koncentriĝis en la kapoj de kelkaj specialistoj. Sed estas tragike, se ankaŭ la celo de la fajro fariĝis al ni fremda, se ĝi fuĝas el nia povo kaj nin superkreskas, kiel okazas ĉe la plej moderna atomteknologio.”

”Ĉu vi do ne vidas ion malbonan en la fakto, ke la unuopulo fariĝas scie kaj teknologie ĉiam pli senpova, superregante plu nur eron de la tuta teknologia procedo?” demandis Georgo.

”Verdire ne. Ĝuste tio, kion vi vidas danĝera, mi vidas bo-

na, ja tio prenas de la unuopulo la povon, kiun li cetere havus super la aliaj. Tiel la homaro estas devigata kunigi siajn erojn kaj per solidaro krei tutecon. Sed katastrofe danĝere estus, se la homoj ankaŭ sur la kampo de la prijuĝo de la aferoj, do sur la kampo de mondpercepto, kies plej alta esprimo estas la filozofio, sur la kampo de kredo, kies plej alta esprimo estas la religio, permesus forpreni de si la tuton kaj ĉiu retenus por si nur sian etan eron, kiel kutimas en la mondo de tekniko kaj teknologio. Tie, kie tio iam okazas, tie kun plena teruro super la homoj ekregas mensogaj sacerdotoj, kiuj sin mem nomas profetoj kaj gvidantoj de la homaro. Tiel estis en la antikva Egiptujo, tiel okazis en la tempo de la diiĝintaj romiaj cezaroj, tiel estis en la epoko de faŝismo, naziismo kaj komunismo. Ju pli la labor tekniko eriĝas, des pli la unuopa homo devas konscii pri la tuto. Estas ĝuste, ke li dum la labora procedo fidus al sia inĝeniero kaj teknikisto, sed pri la senco de la tuto li devas scii mem. La memvokitaj sacerdotoj de Amono ankaŭ nuntempe sieĝas je ĉiu unuopa animo por ĝin erigi kaj dispartigi.”

”Sed kie do vi vidas la eblecon de la homa progreso?” demandis Duŝan, trempante sian remilon en la malsekan hidrogenoksidon.

”Ne estus ĝuste, se mi diktus al vi konkludojn, ja vi mem devas ilin eltiri. Sed ĉar temas pri unu el la plej gravaj demandoj de la moderna homo, mi devas al vi honeste respondi, kion mi pri tio pensas. La progreso estas ebla nur kondiĉe de la samtempa kontinuo de la scienca kaj teknologia specialiĝo kaj tiel diseriĝo — kaj kultura kaj mondpercepta, etika kaj religia universaliĝo kaj tiel koncentriĝo en la konceptado kaj atingado de la homa sencocelo. Niaj instrumentoj estu pli kaj

pli specialaj — sed nia volo kaj valorprijugo estu pli kaj pli universala. Nur tio vere kondukas al la progreso. Paralele kun pli kaj pli forta labordispartigo homoj legu pli el Homero kaj Sofoklo, Platono kaj Aristotelo, el la Malnova kaj Nova testamentoj, el Puŝkin kaj Mickieviĉ, el Goethe kaj Shakespeare, el Dante kaj Cervantes, el Preŝeren kaj Cankar, el Privat kaj Kaloĉaj. Se tiel, ni ne bezonas timi. Ni povas eĉ tosti je progreso, kiu cetere jam komencas nin timigi, se ni akompanas ĝin per interna kultura kaj spirita kresko!”

Ili mem ne sciis precize, kiam la distanco inter la insulo kaj la firma tero estis traremita. Ili saltis el la boato kaj ekpaŝis al la tendoj.

”Kio pri mia honorario?” gaje memorigis Georgo la forgeseman profesoron.

XV.

*Pri tio, ĉu ni rajtas fari ĉion,
kion ni povas fari;
kiu povas kaj rajtas al ni ordoni,
ĉu nia mondo estas bona aŭ malbona ...*

Ili leviĝis — kiel ĉiam — antaŭ la sunsuriro. La profesoro poiomete ilin preparis al tio, ke ili, senrigarde la diferencojn en ilia pensado, kiuj restis diferencoj, komencis en tiu ascendo de la fajrego super la horizonto estimi la eventon de la plej alta signifo por la tuta Tero.

”Ĉio, kion publikigas gazetoj, kion diras radiostacioj, kion montras televida programo, kion priklaĉas vilaĝaj kaj urbaj klaĉuloj kaj klaĉulinoj, estas hontinda moneretaĉo kompare kun la evento de sunleviĝo. Se la suno ne leviĝus plu, subirus ni, por ĉiam.”

Tiel plurfoje parolis Andreo — kaj la junaj esploristoj de la homaj larĝoj kaj profundoj trovis ĉiam pli konvene leviĝi samtempe kun la suno, por ne malfrui tiun majestan scenon, kiam la lumo kaj la fortego leviĝas kaj forpelas la mallumon.

Ankaŭ hodiaŭ ili faris tiel. Kiam ankoraŭ estis malhelo, ili konsumis la trinkaĵon, kiu konservas junecon kaj sanon: varman citronakvon kun iomete da mielo. Dume ekaŭroris. Kiam parteto de la suna disko ekrigardis de la horizonto, ili starante sin turnis kontraŭ la sunon, krucumis la manojn sur siaj brustoj kiel ĉe preĝo kaj profunde enspiris kaj elspiris. Ĉe la sekva enspiro ili levis siajn manojn superkapen, etendis la kubutojn kaj malfermis polmojn. Poste ili klinis sin antaŭen,

elspiris kaj per etenditaj manoj manplate tuŝis la teron. Longe kraketis iliaj ostoj, ĝis ili sukcesis. En tiu pozo ili denove enspiris, etendis la dekstran gambon malantaŭen, kuntiris maldekstran gambon genue, levis la kapon kontraŭ la suno. Per retenita spiro ili etendis ankaŭ la maldekstran gambon. Surmane ili malleviĝis al la tero, premis kubutojn al sia korpo kaj elspiris. Denove enspiris, levis kapon kaj la supran korpoparton kaj retenis la spiron. Poste ili laŭ inversa ekzerca ordo ripetis ĉiujn movojn de antaŭe, ke finfine ili denove staris rekte per manoj, krucumitaj surbruste.

Surya namaskar, saluto al la suno, estis farita.

Ili veturis peraŭte translimen, al la itala flanko. Pli ol horo da veturado. Eble eĉ pli, se doganistoj kapricos. En la urbo transe troviĝas muzeo kun nekutimaj eksponaĵoj. En fermittaj vitraj tuboj ili arkivigas morte naskitajn homembriojn. Por okuloj, al kutimiĝintaj al la konsumeca brilo de supermerkattaj haloj tio estis preskaŭ neeltenebla elprovo. Sed por la disĉiploj de filozofio tio estis nepre bezonata travivaĵo. Sen rigardo al la homa mizero oni estas en filozofio proksimume sama kiel analfabeto en studadsalono de kompara literaturo ...

La vico antaŭ la dogana transirejo ne estis ekstreme longa. Ne estis aĉetokaza tago, dum kiu la tuta nacio invadas la urbon por aĉeti aĵojn, pliparte superflujajn. Antaŭ ili baldaŭ troviĝis ĝis la dogana barilo eble kvin aŭtomobiloj. Tiam ekestis svarmo inter la doganistoj. La oficisto, kiu inspektis aŭtojn, eltiris per sia sperta mano ie elsub la motorkovrilo pakajetojn, unu post la alian. La veturilo portis registronumeron el iu sudorienta lando. Ne estis dubo: la doganistoj trovis drogaĉan kontrabandiston. Ili ordonis al la stiristo haltigi la aŭton plenan de malpermesitaj substancoj, sur flankan lokon, po-

licistoj kunprenis la ŝoforon. Nenio escepta, la trafiko kontinuis, estis rutina evento ĉiutaga.

”Kiamaniere la homo povas esti tiel korupta?” bolis en Adela, kiam ili jam veturis deklivsuben aliflanke de la doganejo.

”Diru, Adela, kial la homo finfine ne estu eĉ ’korupta’, kiel vi diras?” preskaŭ sarkasmomiene diris la profesoro.

”Mi scias, ke vi nur provokas min ...”

”Kiel nur?”

”Vi verŝajne emas diri: Se vi ne kredas je eterna Justo, kial do vi nervoziĝas pro certa korupto?”

”Efektive mi volis rimarki ion similan,” la profesoro frapetis fingre sur sia stirilo.

”Ĉu vi volas diri, ke ekster la religia kredo je pli alta estaĵo oni ne povas starigi veran moralon?” diris Georgo.

”Al tia demando ne estas bone respondi per simpla ne aŭ jes,” respondis Andreo. ”Sed diru al mi, Georgo, kion vi opinias, ĉu la moralo estas afero de laŭplaĉa pripensado aŭ efektive temas pri serio de klaraj kaj sendubaj ordonoj kaj malpermesoj?”

”Mi agnoskas neniajn ordonojn kaj malpermesojn!” kun plena mezuro de knaba fiero proklamis Georgo.

”Bone, se tiel, do ĉio, kio apartenas al la mondo de moralo, estas nur hobivalora parolaĉado sen ĝenerala valido. Se tiel, oni al neniu homo povas ion ajn riproĉi, eĉ tion ne, se li moralizas. Estas same sence ordoni kaj same skandaligi pro ordonoj. Oni ne havas rajton malpermesi certajn agojn, sed oni same ne havas rajton malpermesi malpermesadon ...”

”Bone,” retiriĝis Georgo iomete, ”kio sekvas el tio, se oni

akceptas, ke moralon simple faras firmaj ordonoj kaj malpermesoj?”

”El tio unue sekvas la demando, kiu havas la aŭtoritaton, la rajton kaj la povon, tiajn ordonojn kaj malpermesojn proklami.”

”La homa socio, ekzemple ...” rapidis Adela.

”Tio estas sensuka abstraktaĵo!” diris Duŝan.

”Duŝan pravas,” resumis Andreo. La socio, speciale, se oni ĝin konceptas globale, tutmonde, estas tro abstrakta fenomeno, por ke ĝi povu ludi kiel aŭtoritato en aferoj moralaj. La socio ne estas viva estaĵo kun racio kaj propra volo. Ordoni kaj malpermesi povas nur estaĵo tia, racia kaj volohava. La socio estas sociologia nocio, esprimanta la tuton de la interhomaj kaj intergrupaj rilatoj. Ĝi estas blinda forto, obeanta certajn leĝojn, kiaj regulas ankaŭ la senvivan naturon.”

”Kio pri pli konkreta socia, politika komunumo?” ne jam tute rezignis Adela.

”Tiu ĉi nocio esprimas verdire ion iomete pli konkretan, tamen mi ne povas esti per ĝi kontenta.”

”Kial?” simplanime demandis Tanja.

”Ĉar ankaŭ tia komunumo, kiel ekzemple la nacio aŭ la ŝtato, politika partio aŭ io simila, ne estas persono kun propra racio kaj volo, sed nur socia fenomeno, iaspeca mekanismo, en kiu manifestiĝas racio kaj volo jen de tiu, jen de iu alia plej influa persono aŭ persona grupo. Kaj cetere ankaŭ tial, ĉar la historio nin instruas pri senmezura kapricemo kaj eĉ terureco koncerne moralajn leĝojn, kiajn foje aprobis homamasoj. Oni nur komparu la valorojn, por kiuj aplaŭdis amasoj en Nurenbergo post la transpreno de la povo fare de Hitler post la jaro 1933 — kaj tiujn, kiuj valoris en la sama urbo

post 1945-a, kiam oni venigis naziajn krimulojn antaŭ la tribunalon de la aliancintoj. Ambaŭ valorsistemoj staris en la servo al certa grandsocia komunumo, tamen oni ilin ne povas kompari. Tiu, kiu volas serĉi moralan gvidlinion en la unuopaj elektoj de grandsociaj komunumoj aŭ momentaj homamasoj, tiu ne povus diri, kiu momento de Nurenbergo estis morale ĝusta. Finfine la saman situacion oni povis observi en la kazo de Sokrato, kiun la samaj homoj unue admiris kaj serĉis okazojn kun li agrable diskuti, dum poste ili lin mortkondamnis — aŭ eĉ pli draste en la kazo de Jesuo Kristo, kiun la sama jerusalema homamaso unue gloresprime akceptis, kiam li surazene enrajdis la urbon antaŭ la paskofesta tago, sed tuj poste la sama homamaso ne ĉesis kriegi: Libe rigu Barabason — krucumu Jesuon!”

”Bone, sed kiu povas kaj rajtas finfine proklami moralajn leĝojn kaj ordonojn?” volis jam scii Duŝan.

”Vidu,” iomete malgrandigis la benzinfluon la profesoro, ”se tiajn leĝojn proklamus ajna individuo, tio estus pura despotkaprico, kiu neniun alian povus vere morale ligi. Kiam tio vere okazas, kaj tio ne okazas tiel malofte, temas pri tiranio. Tirano aŭ tiranoj povas tion efektiviĝi nur uzante perforton kaj sisteman persekutadon. Tio signifas, ke ĉiam, kiam la homo mem volas kaj provas starigi moralajn leĝojn, estiĝas diverskolora tiranio. Sed same certe estas, ke sen tiaj leĝoj la homaro ne povas ekzisti ...”

”Jam mi scias ...” ekkriis Adela.

”Nature, ke vi scias. En sia plej kaŝita interno ĉiu tion scias kaj agnoskas. Sed permesu, ke mi mem diru ĝisfine. Por ke tiu leĝdonanto ne estu kaprica despoto, por ke el tio ne rezultigu perfortuza tiranio, por ke tio ne estu malplenvortaĉa

intelekta ludo de tiu aŭ alia humanisto, do tiu leĝdonanto povas esti nur Dio mem!”

”Vidu, ke mi sciis ...” ne povis kaŝi sian ekscitiĝon Adela. Sed la profesoro ne ŝanceliĝis:

”Nur Estaĵo, kiu konceptis la mondon kaj nian vivon en ĝi; nur Estaĵo, kiu konas la tutan historian intrigon kaj ankaŭ ĝin scias stiri al la glora fino, nur tia Estaĵo povas helpe de sia komunika sistemo, kies relajsoj estas niaj konsciencoj, proklami kaj efektiviĝi moralajn leĝojn, ordonojn kaj malpermesojn.”

Georgo provis savi la jam perditan aferon:

”Bone, kion diri, se la morala normo estus decido de la plimulto?”

”Pri tio ni esence jam parolis. La plimulto foje voĉdonis por mortkondamni Sokraton, sed baldaŭ poste ĝi voĉdonis por starigi al li monumenton. Ĝis niaj tempoj okazas, ke la sama homamaso, la sama plimulto al la sama militistaro ĵetas flo-rojn kaj aklamas ĝian pretermarŝon — kaj post eventuala malvenko la sama homamaso sputas sur la iamajn soldatojn kaj oficiojn, kiuj fariĝis militkaptitoj ...”

Ili intertempe atingis la naturhistorian muzeon. Ili supreniris laŭ la ŝtuparo en la unuan etaĝon, kie troviĝis la fako pri morte naskitaj homembrioj. Tuj, kiam ili enpaŝis en la ejon, lumigitan per iaspeca verda lumo, kvazaŭ ĝi venus de algoj, ili konfrontis sin kun la mondo, kian ili ĝis tiam ne konis. Kvazaŭ ili starus en la ateliero de la pentristo Tisnikar, kie de la mirindaj, sed teruratmosferaj pentraĵoj rigardas al la spektanto la lastaj avertantoj pri la homa sorto: la majesta korvo, la rigida ĉevalo en sia terura pozo, la fungo de la atomepoka honto, la Krucumito mem ... El la ekspoziciitaj vitraj vazoj

gapis al ili unuokulaj embriaj fruntoj; stumpoj de ne plenkre-skintaj korpomembroj, groteske grimacitaj vizaĝtraĵoj. En tiuj senkompataj vazoj estis aranĝitaj tristaj floroj de la homa kaj surtera povreco. Subite ĉi tie ne staris plu Adela kaj Duŝan, Tanja kaj Georgo, sinjorino Majda kaj profesoro Andreo: estis nur ia kolektiva sento de teruro kaj skuiteco, kio faras la esencon de la homa karno, kiun la formanta spirito ne sufiĉe perfektigante kondukis al la planita perfekteco. Neniu aŭskultis la fakan ĉiĉeronadon. Tiuj postrestaĵoj de la homa subekzisto, aranĝitaj kiel teruraj fruktoj de la kosma rubaĵo, parolis al ili en sia handikapita dialekto mem.

Kiam ili eliris, ili aŭtomate turnis sin al la parko. Ili sentis bezonon, troviĝi laŭeble rapide en silenta kaj natura medio. Sur la padoj por kvieta primedito kaj konfida interparolo. Ili moviĝis kiel fantomoj. Tie, ĉe tiuj verdkoloraj vazoj ili demetis ĉiujn siajn diferencojn kaj specifaĵojn. Trans la tapiŝo el brunkoloraj arabaj pingloj palpiris kvar siluetoj, deprimitaj pro la sorto de la adama argilo.

”Ĉu oni tion samtiel povas nomi celsenco ...?” Georgo rompis la neproklamitan interkonsenton pri silento. La demando adresiĝis, kvankam formale ne dirite, al Andreo, la profesoro.

”Mi opinias,” sen trafiteco respondis la profesoro, ”ke eĉ la nesukcesa homa embrio, eĉ en sia plej groteske terura aĵo, estas sekvo de certa providenco ...”

”Por kredi je io tia ...” ensaltis Adela. Sed la profesoro trankvile kontinuus:

”Por kredi je io tia oni devas kompreni, ke la misformita homa embrio estas la plej senkulpa kaj malkatastrofa el ĉiuj misformiĝoj, en kiujn povas transformiĝi la homa estaĵo.”

”Ĉu do eblas eĉ io pli terura?” dubis Tanja.

”Oni devus havi aparte kapablajn okulojn por povi vidi, kia efektive aspektas la homo subefike de lia mensogo, maljusto, malico. La malica homo povas laŭekstere manifestiĝi per tre larĝa societeta rido kaj per mimiko de ĉarmeco, sed lia interno estas tia, ke kompare kun ĝi ni hodiaŭ observis belajn flo-rojn!”

”Ĉu tiu supozita Dia pedagogio ne estas iom tro brutata?” oponis Adela.

”Oni devas konsideri, ke vere kompatinda ne estas tiu mise kreskita vivprovo. En kompatinda stato troviĝas ni, spektantoj. Dio tiel ne frapis la mise naskitan embrion, sed nin, kiuj tion spektas. Sed bonvolu scii, ke tiu, kiu ne ricevas batojn de Dio, batas sin mem, eĉ multe pli forte kaj senkomplete.”

”El kio efektive originas la malbono?” subite demandis Duŝan.

”La germana filozofo Leibniz distingis tri formojn de la malbono. La unua formo estas la metafizika malbono, kiu simple ekzistas tial, ke la kreita mondo estas per limoj fina, portempa kaj malperfekta mondo. Tio estas la destino de ĉio, kio ne estas Dio mem. La dua formo laŭ lia instruo estas la fizika malbono, kiu manifestiĝas en nia korpa penado kaj sufero, sed ankaŭ en naturaj katastrofoj, kiel inundoj, tertremoj, malsanoj kaj en fenomenoj, kiajn ni en la muzeo vidis. Sed plej terura laŭ li estas la morala malbono, kies origino estas en ni mem. Ĝi kaŭzas la plimulton de nia suferado.

”Bone,” diris Duŝan, ”tiamaniere ni la malbonon iel klasifikis, sed min interesas, de kie ĝi venas, kio estas ĝia bazo?”

”La morala malbono,” kun pripenso respondis Andreo, ”estas flankaj kaj portempa aperoj de la homa libero.”

”Kiel vi opinias: flankaj kaj portempa ...?” demandis Tanja.

”Flanka tial, ĉar ĝi ne venas el la intenco de la homa libero, portempa tial, ĉar la malbono ne havas sian eternecan bazon, ĝi estas nur la fenomeno, kiu ligiĝas kun la akcidentaleco de tiu ĉi mondo.”

”Kion signifas ’akcidentaleco’?” kiel lernantino en lernejo obstine demandis Tanja.

”Akcidentaleco aŭ kazeco de iu estaĵo estas la ebleco de tiu estaĵo ekzisti aŭ ne ekzisti. La kontraŭo de tio estas esencaleco, kio diras, ke la koncerna estaĵo ne povas ne-ekzisti. Tia estas Dio mem. Akcidentalaj fenomenoj, ĉu naturaj, ĉu homaj, ne havas propran ekzistobazon, ili dependas de la esencala estaĵo, de Dio. La samo validas por la bono, kiu havas esencalan karakteron, ĉar ĝi ligiĝas kun Dio, dum la malbono havas akcidentalan karakteron, ĉar ĝi ligiĝas kun la portempaj kaj tiel akcidentalaj fenomenoj de la homa ekzisto. La malbono ne havas propran bazon, ĝi estas parazito sur la korpo de la bono.”

”Sekve la malbono ne estas io alia,” ensaltis Adela, ”ol mise uzita libero ...”

”Vidu, Adela, vi diris la aferon multe pli koncize kaj simple ol ĝin dirus mi. Ĝuste tiel estas. La malbono estas realigo de la libero, kiu ne estis bone pripensita kaj rekonita. Malbono estas pretendo de io parta koste de la tuto.”

”Tio signifas, ke malbonaj estas ĉiuj homoj, kiuj ne konas filozofion, kiuj ne povas bone prijuĝi la liberon kaj ĝian uzon, kiuj ne povas tuj kompreni, kio utilas nur al io parta kaj kio utilas al la tuto ...” deklamis Adela.

”Jam mi timis,” ridete diris Andreo, ”ke ĝuste pri tio neniu starigos demandon. Tamen nia Adela ĝis nun ne disravigis, brave!”

”Sed tio ankoraŭ ne estas la respondo ...”

”Ne tiel rapide, fraŭlino! Se temas pri grandaj aferoj, oni ne hastu. Verdire pri neniu afero oni urĝu. Ĉiam, kiam nin pelas rapido, ni iras malbondirekten. Bona estas nur diligenta kaj racia malrapido ...”

Profesoro volis demonstri tion, pri kio li parolis. Respondante al Adela li vere ne urĝis sin. Fine, kiam ili jam sidis en aŭtomobilo, dum startado de la veturilo, li tamen komencis respondi al ŝia demando.

”Se vi pensas pri filozofio kiel lernita faka scio, kiel regado de aparta faka glosaro kaj de internociaj ligoj, tiam mi devas diri, ke ĉio tio ne povas decidi pri onia inklino, ĉu al bono, ĉu al malbono, do pri onia realigo de la libero. Profesoro pri filozofio d-ro Rosenberg, gvida nazia funkciulo kaj militkrimulo, ĉiukaze pli bone konis filozofiajn nociojn ol la plimulto de tiuj kvindek milionoj, kiuj devis laŭ kruela maniero morti ĝuste pro la instruo, kiun disvastigis tiu ĉi bone instruita krimulo. Kaj la senrenoma germana soldato en Serbio, kiu rifuzis partopreni ĉe pafado de ostaĝoj kaj preferis mem esti pafita, tre verŝajne ne sciis multe pri filozofia fako, kia ĝi estas instruata en lernejoj kaj universitatoj, kian pritraktas intelektulaj libroj. Se mi komparas tiujn du ekstreme poziciitajn homojn, mi per tio ne volas diri, ke la unua fariĝis krimulo, ĉar li bone konis fakan filozofion — kaj la dua ekzemple bona homo, ĉar li ne havis scion pri lerneja filozofio. Neniel. Tamen la unua pruvas, ke nura fakeco en filozofio ne sufiĉas. Filozofio ne estas nur scienco, ne estas nur fako, ĝi ĉion tion nur uzas kiel rimedojn. Filozofio antaŭ ĉio estas baza homa inklino al saĝo, amo al saĝo, kiel formulis Sokrato. Kaj la dua pruvas, ke manko de faka scio ne estas esenca manko por

tamen akiri saĝon, se oni nur vere inklinas al ĝi, amas ĝin. Tio signifas, ke oni procedu same, kiel Jesuo rekomendas: la unu-an aferon ne ellasu kaj la duan faru! Ne ellasu la okazon lerni filozofion lernejan, sed amu la saĝon kaj obeu ĝin, ja en tio finfine manifestiĝas vera filozofo! En tiu ĉi senco tamen oni povas diri, ke nur filozofo povas esti vere bona homo. Ne filozofo kiel fakulo, ĉar estante nur fakulo, oni povas esti ankaŭ samtempe brutulo kaj krimulo, sed filozofo en la sokrata, origina senco, 'amanto de la saĝo', kiu en la popola lingvo nomiĝas ankaŭ vivfilozofo."

"Kio estas tiu vivfilozofio kompare kun la lerneja?" demandis Georgo.

"La vivfilozofio, pri kiu ni ĵus parolis, estas tiu pli profunda rigardo al la ekzisto de la mondo, de la homa vivo, kiu la homon senĉese admonas, kiel fragila estas lia ekzisto, kiel efemera estas lia vivo, ke li ne rajtas survoje tra la tempo fari ĉion, kion li fizike povus fari. En tiu senco ĉiu homo estas vokita fariĝi filozofo. Oni ne povas esti vere bona homo, se oni ne fariĝas saĝa en tiu ĉi baza pritakso de la homa vivo kaj ĝia pozicio en la universo."

"Kio do estas la saĝo?" aldonis sian demandon Tanja.

"La saĝo estas kapablo prijuĝi, kio en tiu ĉi mondo havas valoron kaj kio ne havas valoron aŭ nur parte ĝin havas, se ĝi servas al iu ĉefa valoro. Tio estas kapablo de morala valorigo kaj prijuĝo. Tiun ĉi kapablon ĉiu sana bebo kunportas enmondan per sia naskiĝo. Bedaŭrinde poste multaj homoj klopodas, dum jaroj penadas, nebuligi al infano tiun kapablon. Tamen ĉiu homo havas devon, denove trovi en si tiun kompason, kiu lin per certeco orientos al la ĝusta celo."

La aŭtomobilo denove troviĝis sur ilia flanko de la ŝtatlimo.

La impresio el la naturhistoria muzeo boris en ilin spite al ĉio, kion diris la profesoro. Duŝan ne povis resti trankvila, li diris:

”Sinjoro profesoro, ĉu tiu ĉi mondo ŝajnas al vi bona aŭ malbona?”

”Tiun ĉi mondon mi vidas bona pro du kialoj. Unue, ĉar ĝi estas kreaĵo de la Dia saĝo kaj volo. Kaj due, ĉar oni en ĝi senlime povas fari bonon. Ne estas obstakloj por fari bonon, tio estas la sola homa agado, kiu ne havas limojn ekster la homo mem!” parolis Andreo, kvazaŭ li lekcius al studentoj de teologio.

”Kiamaniere do vi klarigas al vi la ĉeeston de la malbono en ĝi?” kontinuis Duŝan.

”Ankaŭ la malbono estas servanto de la bono. Eĉ tiel mi diros: Malbono estas bona argumento por la konstato, ke la mondo estas bona.”

”Ĉu tio ne estas iome tro ...” koleretis Adela.

”Verdire, kiel vi pri tio pensas?” pli repacige diris Georgo.

”Simple tiel: La mondo estas bona, ĉar konsekvenca. Ĉiu ago kondukas al rilatigita nepra sekvo. Tial en ĝi ne materiigas nur la bona, sed ankaŭ la malbona penso. Se la mondo ne estus konsekvenca, se la malbono, kies radikoj troviĝas en la spirita mondo, ne manifestiĝus ankaŭ sur la materia nivelo, ĝi iom post iom nerimarkite akumuliĝus en homaj animoj kaj tiujn ĉi per tio venenigus kaj koruptus.”

”Ĉu vi povas elmeti ekzemplon?” proponis Tanja.

”Ni prenu murdon. Se ĝi ne kaŭzus suferon kaj dolorojn, se ĝi ne provokus en nia interno ekstreman reziston kaj naŭzon, ĝi baldaŭ ennestiĝus en ni kiel io normala kaj senproblema.”

”Sed kial ĝi entute estas allasata? Kial la Reganto de la uni-

verso ne haltigas ĝin en la momento, kiam ĝi aperas en la homa animo kiel ideo?” volis scii Duŝan.

”Vi pravas, Dio nin povus facile narkoti per iu gaja substanco el iu hormona glando, kio nin en momento farus senperfortemaj kaj reciproke amikaj. Sed tion Li ne faras pro la sama konsekvenceco. Li respektas la regulojn de la ludo. Se la okazado en la homa animo ne ricevus sian sperteblan efektivigon en la substanca mondo, nia anima vivo baldaŭ sovaĝiĝus en nekontroleblan spiralon de l’ malbono. Malbonon oni povas kontroli kaj limigi ĝuste tial, ke ĝi materie efektiviĝas. La murdo finfine ne estas malbono pro la materiaj ŝanĝoj, de ĝi kaŭzitaj, sed pro la interna stato, kiu estiĝas post la murdinspiro. La malbono, kiu el la animo transiras al la materia kampo, fariĝas por la homo videbla kaj kontrolebla — kaj antaŭ tia evidento li povas libere elekti inter la tento de la malbono kaj invito de la bono.”

”Ĉu vi volas diri jenon: Se ekzemple la Dia mano haltigus ĉiun murdiston, la murdo kiel spirita obsedo eĉ multe pli tumultus en la interno de la homoj, ol tio okazas nun, kiam ĝi foje manifestiĝas en sia vera bildo, kiel naŭzaĵo?” diris Tanja.

”Ĝuste tiel. La homoj ŝatas havi murdon sen murdito, trompon sen trompito, ŝteladon sen priŝtelito. Sed Dio nin metis en bonan, sekve konsekvencan mondon, kie ĉiu malbono, kiu cetere nevideble kiel kanceraj histoj diskreskus en niaj animoj, baldaŭ montriĝas kun sia tuta teruro ankaŭ deekstere kaj tiel nin atentigas pri sia ekzisto kaj pri sia vera naturo. Sed vere malbona kaj monstra estus la mondo, en kiu la malbono ne havus materiajn sekvojn. Ĝi estus libera de ĉiu kontrolo kaj ŝanco pliboniĝi. Ni troviĝus plene en ĝia posedo.”

”Ĉu ĉio ĉi signifas,” miris Georgo, ”ke la murdo esence estas io bona?”

”Eĉ la murdo en iu pli profunda senco efektive estas ankaŭ io bona, ja ĝi nin plej ilustre informas pri tio, kia estas la efektiva naturo de la ideo, kiu la murdon naskis. La malbono finfine estas nur spiritorigina. Tio, kion Leibniz nomis ’la fizika malbono’ estas nur materiigo, estas nur sekvo, premsigno de la malbona penso. Tial la plej fiaj krimuloj la krimon tute ne faras. Ili ĝin nur flegas en sia animo, kaŝante ĝin tiel antaŭ si mem kaj antaŭ aliaj homoj, tamen damaĝante tiel sian animon pli ol aliaj, kiuj la samon ankaŭ faras.”

”Andreo, se subaŭskultus vin iu, kiu vin ne konas, tiu povus ĵuri, ke vi stimulas fari krimojn ...” satiĝis de la filozofio de sia edzo sinjorino Majda.

”Nu, kara, mi vidas, ke eĉ vi ne komprenis min. Kario estas malbono, dum dentodoloro estas bona afero, ja sen tiu doloro baldaŭ ĉiuj perdus siajn dentojn. Ĉe ĉiu manifestiĝo de la malbono oni devas distingi inter la motivo kaj la efektivigo. La malbono estas vera nur en sia motivo, dum la sekvo, estu ĝi eĉ tiel doloriga kaj suferiga, jam estas denunco de la sama malbono. Bonvolu vidi: la ideo murdi, dum ĝi restas nur penso en animo, dolorigas neniun, sed ĝuste tio estas malbone. La vera murdo ege suferigas, sed ĝuste tial ĝi atestas kontraŭ la ideo murdi. La sekvoj dolorigas, sed ili sanigas. La motivoj ne kaŭzas dolorojn, sed ili mortigas. Jen ĉio. Tial mi insistas ĉe mia konstato, ke nia mondo eĉ tiuflanke estas bona mondo. Ja ĝi ne estas io alia ol la scenejo, sur kiu la vera enhavo de niaj animoj manifestiĝas videble kaj kontroleble, tial ankaŭ plibonigeble. Tial estas bone, ke la frapo per tranĉilo dolorigas kaj angorigas, ke la vundo estas io terura kaj ke

oni pro ĝi fine mortas. Finfine estas ankaŭ ĝuste, ke tiu, kiu en sia koro portas la ideon murdi, la tranĉilon vere uzu. Tiamaniere la malbono lokiĝas, alarmas aliajn, ja ĝi per sia terura aspekto ĉe la plimulto provokas reziston kaj skandaliĝon. Sed malbona kaj malsaviga estus la mondo, en kiu murdisto ne murdus, en kiu oni post la tranĉila frapo ne mortus. La malbono silente kancermaniere diskreskus en homaj animoj. Tial mi diras, ke tiu ĉi mondo eĉ en sia plej terura aspekto tamen estas bona.”

La piedo puŝis bremsilon. Ĉar la mondo estas konsekvenca, la veturilo haltis, la junaj filozofoj elsaltis kaj kuris al naĝkalsonoj, kiuj sekiĝis sur ŝnuro de la pasinta tago.

XVI

*Kiamaniere ili ŝtelis teron,
kiel ili volis aranĝi revolucion
kaj defendi patrolandon ...*

Foje estas racie fari ion tre tre stultan. Ni diru: ŝteli teron. Ludo por unuaklasanoj de la elementa lernejo, kiu tamen retenas sian ekscitan karakteron eĉ por la plej seriozaj grizharaj kapoj de multaj generaloj kaj ŝtatestroj ...

La profesoro, kiu nun tute oblikve staris meze de certaj terdesegnoj, faritaj per ligna bastono, estis unu el du restintaj 'grandpotencoj'; Georgo, kiu ĵus nun lanĉis sian invadbastoneton, estis la dua postrestinta 'grandpotenco'. La imperiisma kaj interkontinenta lignopeco trafis maldekstran ŝultron de la profesoro. Georgo kun tuta elasto de sia juna korpo ekkaŭris, dismetante siajn longajn krurojn, kaj per sia bastono desegnis novan terkonkeron. La profesoro perdis trionon de sia imperio.

Aliaj aklamis favore al Georgo, sed Majda komplete havis pri ĉio siajn pensojn kaj ion aranĝis en sia tendo. Andreo subite paŝis el sia 'teritorio' kaj enpenŝigis profunde. Georgo demandis lin, ankoraŭ tute varma de sia sukcesa agreso: "Ĉu vi ne defendos vian ŝtaton?"

"Ĝuste tiu ĉi penso min pelas," el sia ekstazo respondis profesoro, "mi timas, ke la ŝtato, kiun oni devas defendi per bastono, jam estas efektive perdita ..."

"Do vi opinias, ke oni la ŝtaton ne bezonas defendi kaj ĉiu,

kiu hazarde preteriras, povas ĝin libere konkeri?” alpaŝis Adela.

”Ni devas pripensi, per kio unuopaj ŝtatoj altiras konkerantojn. Se ni tiun aferon trovos, do ni prefere zorgos pri ĝi ol pri militista defendo, se tio tute estas vera defendo.”

”Do, kio povus esti tiu mistera afero?” kontinuis Adela, ”kiu decidas pri tio, ĉu la konkeranto venos kaj atakos, aŭ prefere ne?”

”Du aferoj estas,” respondis la profesoro, ”mi opinias, kiuj donas al la ŝtato nevenkeblan firmon, se oni pri ili bone zorgas, cetere ilia manko rapide fariĝas invito por konkerantoj. Temas pri racieco kaj justeco. Racieco manifestiĝas en bona ordigo de la ekonomia kaj publika vivo, ke ekzistu bona leĝo, dum la justeco manifestiĝas antaŭ ĉio en tio, ke ĉiuj civitanoj senescepte efektive egalas antaŭ tiu bona leĝo. Tio montriĝas praktike en la fenomeno, ke la homoj plej facile kaj rapide progresas kaj riĉiĝas helpe de sia honesta konduto kaj esencoplana laboro.”

”Kion vi komprenas sub la nocio ’ordigo kaj ekonomiigo de la publika vivo?’” demandis Duŝan, kiu cetere bone konis la unuopajn vortojn.

”Ĉu vi foje observis, kiamaniere fluas akvo en la naturo? Bonvolu okaze tion bone rigardi: ĝi ĉiam trovas por si la plej mallongan kaj racian vojon. Observu la homan lingvon: sen nia konscia peno la lingvo tendencas esprimi niajn pensojn per uzo de laŭeble malmultaj vortoj kaj per simplaj frazoj. Tiel kondukas la lingvo, se oni komunikas aŭtente, honeste. Sed kiam oni volas impresi partneron, fari pli grandan bildon ol estas la realo, kiam oni eĉ volas blufi kaj trompi, tiam oni uzas la lingvon neekonomie, tiam multobliĝas la vortoj, kom-

plikiĝas la frazkonstruo. Same okazas en la ŝtato. Se en ĝi regas la spirito de honesto kaj la sama rajto por ĉiuj, ĝia konstruo estas simpla kaj travidebla por esti komprenebla kaj je dispono al ĉiu, eĉ por analfabeto. Leĝoj de juste kaj racie ordigita ŝtato estas malmultaj, malampleksaj kaj klaraj, ke ĉiu civitano povu ilin kompreni kaj enkapigi. Kontraŭe la ŝtato, ordigita malracie, en kiu superregas maljusto, havas multon da leĝoj kun multaj amendoj kaj komentoj. Ĉio estas formulita longfrazo kaj malklare, en nekomprenebla artifa lingvaĵo, kiun eĉ profesiaj juristoj apenaŭ povas kompreni. Jam la antikva greka historiisto Polibio notis, ke la ŝtato, en kiu multobliĝas leĝoj, troviĝas survoje al kaduko kaj certa pereco.”

”Se mi bone komprenas, la ekonomieco de la ŝtata mekanismo troviĝas en tio, ke la ŝtato estu por la civitano laŭeble malmultekosta, ĉu ne?” el ia dommastrina perspektivo demandis Tanja.

”Se vi volas, oni povus diri ankaŭ tiel. Sed esenca estas alia afero. Iu foje diris, ke bona registaro similas al sana stomako. Dum la stomako estas sana kaj bone funkcias, oni ne sentas ĝin, oni preskaŭ ne scias, ke ĝi ekzistas. Ĝi simple en ordo faras siajn aferojn, sen atentigi nin pri si kaj sia graveco. Same devus esti koncerne ŝtatan povon kaj registaron. Bona kaj honesta povo estas efektive nevidebla. Nur malbona kaj maljusta povo senĉese sin anoncas, sin laŭte kaj sublume montaras, minacas kaj instruas, kvazaŭ la popolo estus en servo de ĝi kaj ne inverse ...”

La suno brilis, ne konsiderante grandajn priŝtatajn demandojn. Mevoj kun sia neatingebla eleganto demonstris, kion povas fari suprenforto, efikanta je etenditaj birdaj flugiloj ...

”Sed kiamaniere oni povus atingi tian racian, justan ŝtator-
don?” interesiĝis Duŝan.

”Tiel, ke vi faru revolucion kaj detronigu la maljustan po-
von!” anstataŭ profesoro respondis Adela, kvazaŭ ŝi jam dum
tuta vivo kunportus la respondon en sia ina sako apud siaj
kosmetikaj akcesoraĵoj.

”Eble ekzistas esceptaj okazoj, kiam oni alimaniere ne po-
vas procedi,” malpli revolucieme kontinuus la profesoro. ”Sed
eĉ tie, kie oni opinias nepre fari revolucion, la afero ne estos
solvita aŭtomate, nur ĉar transprenis la povon nova skipo.”

”Kial verdire ne?” ekscitiĝis Georgo.

”La problemo troviĝas en malproportio inter la revoluci-
aj celoj kaj revolucie uzataj rimedoj kaj metodoj. Oni povas
kredi, ke la celojn de la revolucio imagas homoj, kiuj suferas
sub la vivpezo en la maljusta socia ordo. Oni povas kredi, ke
tiuj homoj havas bonan intencon kaj foje multe da scio. Sed
revolucion oni ne povas realigi per eta morala kaj intelekta
elito el filozofia kabineto. Oni devas akiri kunlaboron de tu-
taj sociaj tavoloj, de homamasoj. Sed tiujn simplajn homojn
oni ne povas inviti al revolucia ago per alte esprimitaj celoj
kaj doktrinoj, eĉ se ili estus veraj. Do la programistoj devas
siajn celojn traduki al simplaj, finfine primitive simplaj sloga-
noj, kiujn povus sekvi ankaŭ neinstruitaj homamasoj. Sed tio,
kio nun disvastiĝas inter tiel multaj homoj, ne plu estas la
origina revolucia doktrino, elpensita de unu aŭ kelkaj filo-
zofie procedintaj elituloj, sed ekstreme simpligita propagan-
do, kiu nek konsideras sian teorion originon nek konkretan
veron. Sloganoj ne multe zorgas pri la vero. Kaj ĝuste portan-
toj kaj disvastigantoj de sloganoj estas la plej fidelaj soldatoj
de revolucio. Se ili en sia ribelo sukcesas, ili tiel kredas rice-

vi konfirmon, ke iliaj sloganoj efektive estis vero. Tiel ili sin prenas kompetentaj gvidi novan ŝtaton, preskribi novajn leĝojn kaj ilin efektivigi. Sed, vi scias, bona eksplodaĵisto ne nepre estas same bona masonisto. Por restarigo de la lando oni bezonas aliajn kapablojn kaj karakterojn ol por realigi revolucion. Sed ne tio estas la ĉefa problemo. Parto da supervenkita antaŭe reginta klaso, per revolucio elĵetita traporde, baldaŭ revenas trafenestre sub masko de amikoj de revolucio. Kaj granda parto de la originaj revoluciuloj baldaŭ koruptiĝas kaj mem transprenas la rolon de la iama reganta klaso. Sinceraj revoluciuloj baldaŭ iĝas sensignifa minoritato, kiu kutime prizorgas muzeojn de revolucio, dum kondukilojn de nova regpovo tenas enmane tute aliaj homoj, ne malofte la falsaj revoluciuloj, kiuj nur ripetas sloganojn, sed efektive uzas la povon por propraj celoj. Por liberiĝi de ĝenaj sinceruloj, la koruptuloj ilin akuzas pri diversaj ideologiaj 'disvojiĝoj' kaj forigas ilin el la publika vivo, ilin enprizonigas, metas en terurajn koncentrejojn aŭ simple mortigas. Tiel baldaŭ restariĝas la sama socia situacio kiel jam regis antaŭ la revolucio, sed kun trista rezulto de ĉiuaspekta malpliboniĝo kaj teruraĵoj, kiujn multaj homoj devis travivi por nenio."

"Do restas nur plu ĝenerala malesperiĝo, ĉu?" konstatis Georgo.

"Tion mi ne volis diri. Mia penso estis nur, ke la revolucio ĉiam nur detruas ŝtatan maŝinon, sed la maŝinisto intertempe jam ŝanĝas uniformon kaj baldaŭ revenas al nova maŝino, konstruita de la revolucio."

"Kion do vi proponas?" premis lin angulen Adela.

"Mi proponas, ke ni provu kapti la problemon ĉe la radi-

ko, kiel revoluciuloj mem ŝatis sin esprimi. Vere, ni fariĝu radikalaj en la ĝusta senco de tiu ĉi vorto!”

”Jes, vere, ĝuste tiel ĉiam parolis ankaŭ revoluciuloj!” aldonis sinjorino Majda.

”Ili parolis pri radikoj, tamen ili ĉiam kaptis nur la voston de la muso, manĝanta ĉe radiko ...” ridis la profesoro. ”Revoluciuloj opinias, ke la radiko de la homa malbono estas la ekonomia intereso, tendenco ekspluati, akumuli profiton kaj protekti sian havaĵon. Tio ne estas vero. Ja ĝuste ekspluatado malhelpas ekonomian evoluon. Nur libera kaj honeste pagata homo laboras bone kaj respondece. Ekspluati kaj prirabi estas la plej malekonomia maniero riĉiĝi.”

”Kial do okazas ekspluatado?” volis scii Tanja.

”Pro tro malgranda kredo.”

”Kian rilaton la kredo havas kun tio?” ekkriis Georgo.

”Ĉie, kie ne estas kredo, estas la timo. Timo de la malabundo, timo de la aliaj, timo de la nekonata naturo, timo de la estonto. Homo, posedita de timo, ne povas plu bone funkcii. Tia homo povas nur ŝteli, rabi, krimi. Ĉio ĉi ne havas racian pravigon. Oni povas facile kalkuli, ke la plej granda bonstato regas tie, kie homoj honeste kooperas kaj vivas per propra laboro. Tion scias ankaŭ tiuj, kiuj maljuste alproprigas por si la havaĵojn de la aliaj. Sed ilia timo estas pli forta ol ilia konsidero. La timo estas la ĉefa minuspovo en nia mondo. Sed timo naskiĝas, kiam la homo perdas la kredon. Timo estas substituo de la kredo. Ĉar la kredo sin rilatas al io senlima, kaj ankaŭ la timo efikas senlime. La homo sen kredo, do homo plena de timo, bezonas senfine da materia, povohava, renomhava kaj simila satiĝoj. La tuta mondo ne estas sufiĉe granda por satigi homon, en kiu mankas la kredo kaj regas la timo.

Tute alie kondutas la homo, kiu havas kredon kaj sekve ne konas timon. Ĉar li sentas, ke li nenion vere valoran povas perdi, ĉar li kredas, ke 'se la greno ne falas teren kaj ne mortas, ĝi ne donas fruktojn', li disponigas sin mem por la komuna bono. Kaj jen: ju pli li sin disdonas, des pli li havas; ju pli li riskas, des pli li ricevas; ju pli li fidas, des pli sekure li vivas."

"Se tiel, la radiko de la homo estas lia kredo, ĉu?" diris Duŝan.

"Certe. Ĉiuj aliaj motivoj, pro kiuj la homo ion faras aŭ ne faras, havas siajn limojn, nur la kredo estas senlima. Subaĉetado havas limojn, perforto havas limojn — sed bonvolu limigi kaj haltigi homon, kiu posedas kredon!"

"Do, via revolucio komenciĝus per entreprenema misio por disvastigi la kredon, ĉu?" iomete malice rimarkigis Georgo.

"Ne, tiun revolucion mi ne povas nur komenci, ja ĝi jam okazas dum lastaj 2000 jaroj. Sed ĉar ĝi vere kaptis la homon ĉe lia radiko, kiel cetere tute ĝuste postulis, nur false kaptis Marx, ĝia kuro estas mistera kaj longtempa, kiel estas mistera kaj longtempa esplorado de la homa esenco, kiun ni nomis 'radiko'."

"Kaj ni, ĉu ni simple observu tion deflanke, kiel tiu revolucio iras en novan jarmilon?" demandis ĉiam preta Georgo.

"Ni ĉiuj estas vokitaj eksplodigi nian egoismon kaj per revolucia perforto de bonaj agoj kaj memregado detronigi la povon de blindaj pasioj kaj voluptoj kaj starigi revolucionan registaron de la Bono, de la Konscienco; kaj defendi tiun novan registaron per la forto de la amo. Ĉiu, kiu tion faros, pli grandigos la amplekson de la jam liberigita teritorio, sur kiu la vera revolucio jam sukcesis!"

Iliaj rigardoj kolektiĝis sur arbopingloj ĉepiede. Ekregis kelkaj momentoj de silento. Sinjorino Majda ekmeditis je mikra transporto de formikoj, kiuj forportis kristaletojn de sukero en sian modelan formikan ŝtaton ... Kiam ŝi dum certa tempo tiel spektis tiun ordon, tiel silente kaj perfekte funkci-antan, ŝi demandis:

”Kial tiuj ĉi mikraj bestetoj, tiuj punktoj de ruĝ-bruna koloro, ĉion tion kapablas fari, sed ni, la krono de la kreitaro, ne ...?”

Diskuton kontinuigis Adela:

”Bone, ni diru, ke via tezo estu akceptita. Ĝi almenaŭ bone aŭdiĝas. Sed, ni diru, se venus nin viziti ministro por nacia defendo, ĉu ni proponu al li sendi soldatojn kaj oficirojn al iliaj hejmoj — per konsilo, ke ili sufiĉe ofte vizitu preĝejojn kaj konfesu siajn pekojn?”

”Respondante samnivele, do mi diru, ke ĝis nun ne estas konate, ke iu armeo perdus lukton aŭ militon, ĉar ĝiaj soldatoj en siaj tornistroj kunportis ankaŭ rozariojn kaj meslibrojn. Sed estas pruvite, ke pereis armeo, kies estroj intencis forigi la religian kredon el homaj koroj, kiel ekzemple tiu de Hitler. Sed ni ne moviĝu sur tiu polemika nivelo. Vi pravas, Adela, ni devas pripensi, kion diri al supozita vizitanto, ministro pri nacia defendo ... Antaŭe ni meditis pri tio, kiamaniere oni povus kapti la homon ĉe lia radiko. Kaj al la ministro ni devus diri, kiamaniere oni povus defendi la ŝtaton — kaj tion oni faru same radikece kaj ne nur surface. — Sed, diru, ĉu ni ne esprimis nin jam dekomence, ke la ŝtato estas samgrade ekspoziciata al la ekstera atako, kiel al ĝi mankas da racieco kaj justeco?”

”Jes, tiel ni diris, vere!” konfirmis Duŝan.

”Se tiel, do la afero estas klara. Ni konsilos al la ministro, ke li klopodu laŭ siaj ebloj unue protekti la popolon kaj la ŝtaton antaŭ tiuj, kiuj pro siaj egoismaj interesoj disvastigas malraciecon kaj maljuston, persekutas saĝajn kaj justajn homojn. Ni konsilos al li, ke li bonvolu uzi sian perfektan informan agentejon por tagnokte esplori, kie al niaj civitanoj okazas maljustaĵoj flanke de tiuj, kiuj ilin devis ŝtatpostene priservi. Ĉe ĉiu giĉeto por petoj kaj plendoj de la civitanoj instaligu sekreta orelo kaj okulo, kiu lanĉu alarmon en la momento, kiam iu ŝtata funkciulo, ek de la komunuma oficisto ĝis la ĉefo de la registaro misuzas sian povon kontraŭ la pravigita postulo de la civitano. Kredu: se la homoj ĉe kelkaj tiaj okazoj vidus, ke neniu povas ilin nepunita malbone trakti kaj arbitre manipuli per leĝoj, ili per siaj nudaj manoj fariĝus la plej bona armeo en la mondo. Se ili vidus, ke la ŝtato, en kiu ili vivas, estas la scenejo de la plej bonaj ecoj, kiuj troviĝas poparte ĉe ili mem, ke ĝi estas garantio por racieco kaj justeco, ili identiĝus kun tia ŝtato sen ajna propagando kaj perforto. Tiam ŝtaton neniu ekstera malamiko kuraĝus ataki. Kaj se iu tamen atakus kaj eĉ se venkus, li devus baldaŭ ĉu foriri aŭ procedi same kiel la unua registaro ...”

”Ĉu vi povus fermi vian revolucionan mitingon,” ekkriis sinjorino Majda. ”Mi bezonas du volontulojn por lavi vazojn, se vi volas manĝi el puraj ujoj ...”

Ĉar anoncis sin ĉiuj, decidis kubĵeto.

XVII.

*Pri tio, ke libero devas esti ligita,
kaj pri tio, por kiu oni laboras
kaj kiu pagas laboron ...*

Subakve ni ankoraŭ ne fiŝkaptis!” ekkriis la profesoro, kiam li saltpaŝis el sia aŭto, per kiu li ĵus alveturis el la urbo.

”Jes, ni tion ne faris!” kun iomete da atendo respondiĝis el junaj buŝoj.

”Do, bonvolu veni, ke mi disdonu al vi ekipaĵojn!” kontinuis la profesoro kun memkompreneblo, kvazaŭ li invitus ilin al glaciaĵa porcio.

Al ĉiu li donis paron da plastaj naĝiloj kaj subakvan maskon kun spirtubo. Nur la subakvan fusilon, sen kiu oni subakve, nature, ne povas ion efikan aranĝi, oni ne vidis. Iliaj okuloj demande serĉis.

”Ni ĉasos per kinokamerao ...” klarigis Andreo kaj eltiris el sia veturilo strangan platan kaj travideblan skatolon, en kiu troviĝis la kamerao.

”Ĉiu registros sub la akvo dek metrojn da filmo, poste ni vidos, kiu pli sukcese ĉasis. Mi supozas, ke vi ne kontraŭas lasi ĉe la mara faŭno bonan kaj pacan impreson, ĉu? Ni nur filmos ilian medion, cetere ni ne intervenos en ilian vivon.”

”Do, tia ĉasado ...” iomete disreviĝe liberiĝis ĝemo ĉe Duŝan, kiu al kutimiĝis al la ĉasfusilo de sia patro.

”Ni ĉasas la vero, kaj ne la vivon,” klarigis ŝparvorte la profesoro.

La boato jam estis preta, ili eniris, kaj tiel ĝi pleniĝis per iom da akvo, jam iliaj manoj ekagis ĉe remiloj. Kiam ili atingis konvenan marprofundon — per sondilo baraktis la profesoro, nature, sinjorino Majda je la signo de sia edzo ĵetis en akvon etan ankron, kiu pli memorigis je turisma suveniro ol je uzaĵo, kiu firme fiksas boaton sur certa loko.

Estu kiel ajn: la boato balancis surloke laŭ la ritmo de malfortaj ondoj, foje pli forte, kiam unu el la junaj submarĉasistoj sin movis, sed ĝi vere ne fuĝis aliloken. La suveniraspekta ludilo bone funkciis.

Kiel la unua saltis enmaren Georgo. Ĉar temis nur pri la unua provo, li lasis kameraon en la boato. La efekto pli memorigis pri balenĉasado en pasinta jarcento ol pri submara fotosafario. Io haste batis en la akvo, akvo kaj aero ŝprucis tra la spirtubo — kaj la stranga marestaĵo finfine disrevinte tusante regrimpis en la boaton.

Duŝan jam pli bone sukcesis. Li povis trankvile naĝi surfaĉe kaj teni kapon iomete subakve. Li taŭge uzis la spirtubon. Sed ankaŭ li ne kuraĝis sin mergi subakven.

La profesoro vidis, ke li devos mem montri, kiamaniere oni tion faras. Elegante li ekvertikalis per kapo suben kaj jam li malaperis, fariĝante fiŝo inter fiŝoj, algo inter algoj, akvo en akvo. Post duonminuto li denove montriĝis, nun unue kiel spirtubo, elstaranta el akvo.

”Ĉu iu sekvos?”

Neniu havis grandan emon. Tion oni ne povas lerni en duonhoro.

”Bone, ni revenu kaj rigardu, kiel tion faras tiuj, kiuj vere scias!” diris la profesoro kaj demetis siajn naĝilojn.

En la primara muzeo oni montris en aparta salono filmojn

pri la vivo en la maro kaj pri maresplorado. Ĉar al la giĉeto alpaŝis sinjorino Majda kaj ne ŝia edzo, ŝi per sia ĉarma rido nuligis ĉiujn 18 paragrafojn de la muzea regularo. Oni estis preta montri filmon aparte por nia grupo, kvankam ĝi ne nombris 30 anojn, kiel devus esti.

Interalie sur la ekrano oni povis vidi barkon kun aŭtentaj skafandristoj, kiuj survojiĝis por esplori la maran fundon. Ili ne ludis per gumaj maskoj kaj spirtuboj, sed survestis pezajn skafandrojn, surdorse ili portis oksigenbombojn. Ili estis per forta ŝnuro ligitaj al la barko.

Same, kiel ili ŝajnis malmoviĝeblaj sur la ferdeko, tiel ili kvazaŭ senpeze glitis sub la akvo, kvazaŭ ili en ĝi estus naskitaj. Ili plenumis siajn taskojn, preter la vitro de iliaj maskoj sentime naĝis fiŝetoj, kiuj ŝajne ne havis spertojn kun la homa raso. Iliaj skvamoj estis pentritaj per farboj kaj en stilo de ĉiuj pentristaj stiloj kaj epokoj.

”Kion vi opinias?” la profesoro ilin demandis, kiam ili en la muzea parko post la ekskurso lekis ĉiu sian glaciaĵon, ”kiel povas esti, ke ili tiel libere moviĝis subakve, dum ni estis tiaj mallertuloj?”

”Ili estis ŝarĝitaj ...” konstatis Duŝan.

”Kaj ili estis ŝnure ligitaj al la boato ...” aldonis Tanja.

”Mi vetas, ke nun sekvos la instruo ...” — volis spritumi Adela

”Se vi jam atendas instruon: ankaŭ paroli ili ne povis tie subakve, se ili volis, ke la aero ne fuĝu el ilia skafandro kaj ke ili ne sufokiĝu. Cetero tute sen instruo la afero ne funkcios,” li aldonis, kvazaŭ li neglektus la rimarkon de Adela. ”La libero de la skafandristo povas esti metaforo por ĉiuj aliaj formoj de la libero. Tiel, kiel nur la ŝarĝo kaj la sufiĉe firma ligo liveras

al la skafandristo subakve veran liberon por lia moviĝado, tiel ni ankaŭ en nia surtera vivo estas liberaj nur tiugrade, kiugrade ni akceptas ŝarĝojn de laboro kaj sufero kaj kiugrade ni estas pretaj akcepti ligan de la leĝoj. La klasika germana poeto Goethe en sia poemo *Naturo kaj arto* tion formulis tiel:

Tiu, kiu vere ion volas fari, devas koncentriĝi.

Ne estas majstro sen limiĝo kaj mezuro,
Kaj nur la leĝo nin per la liber' regalas."

"Tion pri la ŝarĝo de laboro mi iel povus kompreni kaj akcepti. Sed mi ne komprenas, kial oni devus suferi ..." pridubis la instruon de la profesoro Georgo.

"Sufero estas la plej kreiva el ĉiuj formoj de laboro!" iel spartane sin esprimis la profesoro.

"Bone, kion ni prilaboras kaj kion ni perlaboras per tiu nekutima laboro?" postulis pli precizan eksplikon Adela.

"Dum ni laboras super io kutima, ni prilaboras certan materialon, prenitan el la naturo, kiun ni volas adapti por nia bezono. Sed kiam ni suferas, la transformata materialo estas ni mem — kaj la rezulto, la produkto estas pli alta, rafinita formo de nia memo. Tial niaj plej 'produktivaj' laborejoj verdire estas tiuj, en kiuj la eksteraj cirkonstancoj estas plej limigaj: malsanulejoj, karceroj, koncentrejoj ... tie okazas la plej intensa 'produktado', tie okazas forĝado kaj hardado de homaj animoj!"

"Kio pri la leĝoj?" demandis Duŝan. Ĉu ili ne kontraŭas la esencon de la libero? Ĉu ne estas tiel: ju pli da leĝoj, des malpli da libero?"

"Se vi pensis pri ilia nombro, vi pravas. Maljusto kaj perforta arbitro kutime paralelas kun la abundo kaj nekompre-

nebleco de la leĝoj. Sed mi ne pensis pri la nombro de la leĝoj kaj iliaj subparagrafoj, sed pri seriozaj kaj ĝenerale validaj bonaj leĝoj, kiuj ordigas nian kunekzistadon. Rigardu: multfoje iu diras, vidante kelkajn mankojn en publikaj servoj, neseriozon ĉe la laboro aŭ nekorektan konduton de multaj homoj, ke ni havas tro da demokratio. Li simple konfuzas demokration kun arbitreco kaj eksterleĝeco, kiu efektive estas aparta formo de tiranio.”

”Ĉu tiranio vere?” ne povis konsenti Georgo.

”Kompreneble. Se vi interkonsentas rendezuon je la oka kaj vi venas je la naŭa, vi devigas la alian atendi unu horon aŭ prokrasti la kunvenon. Tio estas iaspeca tiranio, ĉu ne? Kaj se iu en sia laborejo ne faras sian taskon, tio estas samkiel tiranio super tiuj, kiuj devos anstataŭ la pigrulo fari lian laboron, kaj ne manifestiĝo de ies libero.”

”Do, kio laŭ vi finfine estas vera demokratio?” diris Tanja.

”Demokratio estas tia maniero komune vivi, kie neniu uzas perforton aŭ eldevigon super aliaj, kie neniu provas aranĝi por si ajnan privilegion kaj kie ĉiuj respektas bonan leĝon, validan senescepte por ĉiuj — kaj kie oni registaron kaj ŝtatajn funkciulojn ŝanĝas laŭ maniero sensanga, ĉu per balotoj, ĉu per heredado kiel en monarkioj, ĉu per lotumado kiel ĉe antikvaj Grekoj.”

”Se tiel, ja preskaŭ ĉiuj ŝtatoj estas demokrataj, ja ĉie ekzistas universale validaj leĝoj kaj nur escepte oni ŝanĝas povon per uzo de perforto kaj sangoverŝo,” rimarkigis Georgo.

”Formale eĉ grandaj tiranioj, kiel tiu de Stalin, estis demokrataj. Se vi legus lian konstitucion, vi mirus, kial paroli malŝate pri lia sistemo ... Sed laŭspirite kaj en praktika ĉiutago nur tre malmultaj ŝtatoj estas vere demokrataj, ja absolute

puraj demokratioj jam principe ne povas ekzisti kaj neniu racia homo tion postulas. Absoluta demokratio estus kontraŭdiro, ja ankaŭ demokratio estas 'kratio', kio greke signifas 'regado'. Se vere ĉiuj partoprenus kaj egale partoprenus en aranĝo de ŝtataj aferoj, la povo, regado, efektive ne ekzistus plu, tiam ni ne havus plu eĉ demokration, ni havus anarkion, kio ĉiam estis teoria idealo por aranĝi komunajn aferojn. Sed demokratio esence ne forigas diferencon inter la regantoj kaj regatoj, nur rilaton inter ambaŭ grupoj ĝi mildigas. Ĉar ĝi inkluzivas pli da civitanoj al ŝtataj aferoj kaj ĉar ĝi permesas libere esprimi siajn opinion kaj kritikon, ĉar en ĝi ekzistas konkurenco inter unuopaj politikaj grupoj, nomataj partioj, demokratioj pli bone funkcias, estas pli stabilaj kaj eĉ en grandaj danĝeroj, kiel montris la dua mondmilito, montros sian superpovon kompare al tiranioj."

"Kial do ne havi tuj anarkion, se nur ĝi radikale forigas tiun diferencon?" demandis Adela.

"Tio estas ege esenca kaj saĝa demando, Adela, gratulon!" entuziasmiĝis la profesoro.

"Anarkio estus certe la plej bona maniero aranĝi sociajn aferojn — ŝtato en anarkio ja ne ekzistus plu — se ĉiuj homoj estus samtempe filozofoj, universalaj fakuloj kaj sanktuloj. Kelkvorte: se ne ekzistus bezono multajn homojn al bona konduto, al bona faro, al bona decido fojfoje simple devigi, ekstremokaze eĉ per uzo de fizika perforto."

"Tion mi ne vidas tiel. Kial vi tiel pensas?" ŝi insistis ĉe sia ideo.

"Vidu, se vi hodiaŭ proklamus anarkion — kaj ni supoze diru, ke la ekzistanta ŝtato tion akceptus kaj permesus sin malfondi — ĝi funkcius kaj daŭrus nur ĝis la momento, kiam

la unua homo, kiu en rilato kun iu alia havus ĉu intelektan ĉu fizikan avantaĝon, provus elbatali privilegion por si. Ĉar ne ekzistus plu ŝtato kun leĝoj kaj iliaj gardantoj, la pli inteligenta aŭ pli forta ulo tuj sukcesus. Malfermiĝus ĉenreago: ĉiuj homoj kun nature donitaj avantaĝoj provus tuj uzi sian forton por subigi la aliajn. Ekestus ĝenerala interbatalo ĉiu kontraŭ ĉiu. Baldaŭ formiĝus grupo de la plej sukcesaj — kaj ili starigus novan oligarĥian ŝtaton, per kiu ili dum longa tempo protektus siajn, dum anarkia periodo akiritajn, privilegiajn poziciojn. Vidu, tiel finiĝus la romantika fabelo de anarkiismo.”

”Bone, tio ŝajnas realo, sed ĉu demokratio ne havas samajn tentojn kaj kaptilojn? Finfine Hitler transprenis povon per uzo de demokratiaj rimedoj ...” daŭrigis Adela.

”Bonege, Adela! Nun vi mem rekondukis la tutan problemaron al la ĉefa demando, ĉu la libero povas ekzisti sen la leĝo, sen ŝnuro de almenaŭ unu senduba devo, kiu staras ekster la demokratio mem. Teorie ĉiu demokratio povas per plimulto en parlamento nuligi konstitucion, nuligi parlamenton kaj proklami diktaturon. Ĝuste via ekzemplo estis io tia. Doktrinistoj de la unua germana respubliko kaj ĝia demokratia sistemo tro kredis nur al la homa kompetento kaj ne rimarkis tiun ĉi kaptilon.”

”Ĉu do ekzistas ia solvo por tiu ĉi problemoj?” aldonis demandon Duŝan.

”Se la pure homa interkonsento, homa leĝo estus nia lasta horizonto, tiam solvo ne ekzistus. Homoj ĉiam povas eĉ demokratirimede forigi bonajn leĝojn kaj proklami fiajn, nuligi demokration kaj starigi tiranion. La solvo troviĝas nur, se super la homa interkonsento kaj leĝo ekzistas ordono, nor-

mo, leĝo, kiel vi bonvolas, kiu absolute starus super homaj aferoj. Tial nur homoj, kiuj baze kredas je ekzisto de tia supera leĝo, povas fondi daŭre funkciantan relative bonan demokration. La kondiĉo estas, ke tiu demokratio ne diskutu pri tiu ĉi baza kaj superhoma leĝo. En momento, kiam parlamentanoj tuŝas ankaŭ tiun ĉi leĝon, la demokratio perdas sian bazon kaj laŭŝtupe kadukiĝas, ĉu en direkto de anarkio, kio signifas posta oligarĥio, ĉu en direkto de tuja oligarĥio.”

”Se mi vin bone komprenis, povas daŭre funkcii nur tia demokratio, en kies parlamentejo surmure pendas krucifiksoj kaj tabuloj kun Dekalogo de Moseo ...” ironiis Georgo.

”Tio mem ne havas ligon, ja ankaŭ cinikuloj povas senprobleme ekipi parlamentejon kaj ŝtatajn oficejojn per laŭplaĉaj religiaj simboloj. Ankaŭ ne temas pri konkreta religio, kiel kristana aŭ islamana, eĉ kontraŭe, parlamento devas esti en tiu senco neŭtrala, ja civitanoj de la sama ŝtato povas aparteni al diversaj religioj. Mi parolis pri elementa koncepto de la leĝo, kiu superas homan arbitrecon kaj tiel ĝuste garantias ankaŭ homajn kontraktojn.”

”Kiu do estas tiu leĝo, kiu staras super ĉiuj homaj aferoj kaj havas aŭtoritaton de iu supera estaĵo, kiun kelkaj nomas Dio?” demandis Adela.

”Juristoj en pasintaj tempoj parolis pri ’natura juro’, do pri leĝoj, kiujn ne elpensis la homo, sed ili estas gravuritaj en ĉies koro kaj saĝo. Sed mi pledas por eĉ pli simpla difino. Jesuo ĝin formulis kaj Kant ĝin kiel ’kategorian imperativon’ kompletigis kaj pli filozofie diris: ’Faru al aliaj tion, kion vi deziras, ke aliaj al vi faru — kaj ne faru tion, kion vi deziras, ke aliaj al vi ne faru!’ Kant formulis tion tiel, ke atentu, ke via konduto povu fariĝi ĝenerala morala leĝo de la homaro. Efek-

tive la samo, nur alistile formulite. Tio sufiĉas. Se vi tion konstante konsideras, ankaŭ demokratio ne povas pereii.”

Post duona horo ili ĉiuj jam troviĝis ĉe siaj tendoj. Duŝan kolektis materialon por ekhejti, ambaŭ knabinoj helpis al sinjorino Majda aranĝi kuirinstrumentojn. Georgo komencis senŝeligi terpomojn ...

XVIII.

*Kiel forigi militon
kaj konstrui pacon,
pri Arĥimedo kaj
liaj cirkloj ...*

Ondoj batis kontraŭ rokoj. Fiŝhordoj fuĝis inter ŝtonoj. Aŭdiĝis mevoj. Sinjorino Majda kaj Adela ludis volan- non. Profesoro kaj Georgo ludis ŝakon, Georgo havis avan- taĝon de unu peono. Duŝan kaj Tanja medite rigardis sablen. Bloveto de vento, nenio alia.

La sinjorino kaj Adela ĉesis ĝui sian ludon "Prefere ni iru naĝi ..." proponis la sinjorino. Sekvis ĉiuj krom la profesoro kaj Georgo. Ili faris siajn lastajn manovrojn de la reĝa ludo. Dum la pripenso, kion fari kun la postrestita fortreso, Geor- go pripense demandis transtable:

"Kion vi opinias, sinjoro profesoro, kiom longe oni povos ankoraŭ tiel en trankvilo ludi ŝakon kaj trakti filozofiajn de- mandojn?"

"Vi volas demandi, kiam sekvos nova milito, ĉu?" preskaŭ negliĝe, kvazaŭ temus pri ŝaka strategio, postdemandis pro- fesoro Andreo.

"Jes, pri milito temas ..."

"Ja ĝi dum la tuta tempo konstante okazas, mia amiko!" respondis la profesoro, observante dume ŝakfigurojn per kvi- eto, kvazaŭ la surtabula konstelacio estus la sola vera pro- blemo en la kosmo.

”Vi verŝajne pensas pri lokaj militoj kaj interbataloj, kiujn oni povas trovi ĉie en la mondo, ĉu?”

”Mi ne ekskludas ankaŭ tion, sed ne pri tio mi pensis.”

”Pri kio do, sinjoro profesoro?”

Poste ili ambaŭ dum certa tempo silentis, kvazaŭ ili inte-resiĝus pri la ebleco de ŝakmato.

”La ĉefa kaŭzo de militoj estas la malbona scio pri geometrio!” subite diris la profesoro. Georgo levis kapon kaj konsterniĝis:

”Koncerne geometrion, mi legis en mia lernolibro pri filozofio, ke sur la frontono de la akademio de Platono estis surskribo, laŭ kiu ne eniru tiuj, kiuj ne regas bone geometrion, sed kia ligo kun la milito ...”

”Jen, vidu, jam Platono sciis ...” ridmiene kaj iel mistere diris profesoro Andreo.

”Tamen ...”

”Estas ĉefe du geometriaj temoj, kiuj koncernas militon: kompreno de la cirklo kaj kompreno de proporcio kaj simetrio ...” ne ĉesis esti enigma la profesoro.

”Ĉu estas tiel malfacile kompreni la cirklon?” pridubis Georgo.

”Ne nur preskaŭ ĉiuj ŝtatestroj, iliaj generaloj kaj ministroj, ankaŭ la plimulto da entreprenistoj, kvankam unuavide nekredeble, sed eĉ homoj de kulturo kaj scienco, religio, filozofio kaj diversaj mondperceptaj doktrinoj, evidente manifestas tiun ĉi nekomprenon.”

”Ĉu vi bonvolas pli klare ekspliki?”

”Tre volonte. Ili ĉiuj, do ne nur la homoj gvidaj kaj decidaj, ankaŭ homoj simplaj, eĉ plej simplaj kaj senfunkciaj, eĉ senkulpaj simpluloj kaj infanoj, ili ĉiuj montras la saman mis-

komprenon de tio, kio estas la esenco de la cirklo, de ĉiu el ili. Ili kredas, ke pli granda cirklo estas pli perfekta ol malpli granda ... Cetere, ĉu vi iam legis tre amuzan kaj instruan libron de ĉeĥa satiristo Ĉapek: Apokrifoj? Ne? Vidu, tie vi povas legi rakonton pri la mortigo de Arĥimedo. Arĥimedo, kiun vi certe konas el fiziko, ja li malkovris suprenforton en fluaĵoj, estis matematikisto, filozofo kaj konstruisto de militistaj instrumentoj kaj aranĝoj por protekto de sia urbo Sirakuzo, kiu tiam apartenis al greka kolonio. Kiam Romianoj spite al forta defendo, ebligita ĝuste helpe de la elpenŝaĵoj de Arĥimedo, finfine tamen konkeris la urbon, romia oficiro eniris laborejon de Arĥimedo kaj provis lin persvadi, disponigis sian servon al Romianoj kaj tiel savi sian vivon. Olda sciencisto komencis pridemandi la oficirojn, kian celon postsekvas la romia militistaro. Romiano simplanime klarigis, ke temas pri konstanta plilarĝigo de la imperio. Tiam Arĥimedo respondis, ke li mem estas fakulo pri la cirkloj — kaj kiel tia li povas garantii, ke eĉ la plej granda cirklo ne estas pli perfekta ol la plej malgranda kiu eblas. Ĉar la romia oficiro ne havis en sia maniko pli bonajn argumentojn por kontraŭstari filozofon kaj konstruiston, li solvis la problemon laŭ sia maniero, uzante sian glavon, per kiu li mortigis la fizikiston. Kiam ni en nia tempo legas tiun brile spritan elpenŝaĵon de Ĉapek, ni gaje ridas pri la stulteco de la romia oficiro. Sed, en praktika vivo, preskaŭ ni ĉiuj pensas kaj agas ĝuste laŭ la sama mislogiko, supozante, ke la perfekteco de la cirklo kreskas per ĝia diametro. Ŝtatestroj strebas, ke iliaj ŝtatoj kresku kaj ĉia malkresko de ĝia surfaco por ili estus la plej fatala katastrofo; entreprenistoj klopodas pligrandigi siajn entreprenojn kaj fari el ili verajn imperiojn. Same procedas religioj, same lingvoj, kul-

turoj, same ĉiu homa entreprenado kaj agado. Nur kiam ni legas satiron de Ĉapek, ni priridas la romian oficiron; sed kiam ni legas nian taggazeton, ni postsekvas la logikon de tiu sama oficiro. Ankaŭ ni deziras kreskon de niaj cirkloj, de niaj ĉiaspecaj imperioj. Kaj ĉar unu cirklo povas kreski ĉiam nur koste de la alia, la milito estas neevitebla. Tial ni havas militojn interŝtatajn, ekonomiajn, religiajn, lingvajn, kulturajn, interpersonajn, ĉiaspecajn ...”

”Jes, mi komprenas, sed ĉu tendenco kreski ne estas unu el la plej naturaj kaj sanaj tendencoj de ĉio, kio vivas?” ne povis komplete konsenti Georgo.

”Tiupunkte vi tute pravas, juna amiko!” konfirmis la profesoro. Sed oni povas kreski tiel, ke oni prenas spacon de la alia, kiu havas la saman tendencon — aŭ oni kreskas en alian dimension, en kiu oni ne atakas spacon de la alia. La unua maniero kaŭzas konflikton kaj militon, dum la dua pliriĉigas la mondon kaj invitas al kunekzisto kaj kunagado.”

”Mi ne vidas, kien oni povus kreski por ne preni la spacon de la alia, kiel vi diras ...”

”Vidu, konfliktoj kaj militoj okazas en du dimensioj, do en ebena, horizontale. Simple: se vi volas plilarĝigi vian domon por akiri novajn kvadratmetrojn, vi devas post certa tempo konstrui sur la tereno de via najbaro. Tio estas horizontale, en du dimensioj. Sed se vi masonas vertikale, vi ne tuŝas la teron de via najbaro. Vi kreskas en la tria dimensio, kiu ĝenerale ne havas plu ekskluzivecon de la dua, de la surfaca, de la horizontala. Kaj tio ankoraŭ ne estas la fino. Ankaŭ la tria, la vertikala dimensio ne estas tute senproblema koncerne aliajn. Sed oni povas paroli ankaŭ ankaŭ la kvara, la tempa dimensio, metafore ankaŭ pri la kvina, la spirita, kiu estas senfina

kaj kiu absolute ne tuŝas aliajn. Vi povas kreski vertikale multe pli ol horizontale. Sed spirite vi povas kreski senfine. Tial la homoj, kiuj pensas kaj agas vertikale, estas pli pacaj ol tiuj, kiuj pensas kaj agas nur horizontale. Sed perfekte pacaj estis nur homoj spiritaj, ja ili kreskas kaj konstruas en la kvina, absolute nedanĝera kaj malimperieriga dimensio.”

”Ĉu ni povus tion ilustrati sur konkreta ekzemplo?” demandis Georgo, jam tute forgesante pri siaj ŝakfiguroj.

”Bone, ni prenu unue la ŝtaton, kies militadon oni plej bone konas. Kiel dirite, la pliparto de ŝtatestroj similas al la romia oficiro de Ĉapek kaj provas pligrandigi la surfacon de sia ŝtato, eĉ je prezo de ĝenerala mizero por la civitanoj. Sed oni povus pligrandigi la ŝtaton ankaŭ ’vertikale’, tion mi ne opinias laŭvorte, per konstruado de pluretaĝaj domoj kaj aliaj konstruaĵoj. La vertikala dimensio de la ŝtato estas ĝia raciigo, ĝia administra, teknika, scienca, eduka kaj ĉiaspeca progreso kaj pli efika uzo de la donita surfaco. Se la ŝtato tiamaniere ’kreskas’, tio ĝenerale ne damaĝas la najbarajn ŝtatojn kaj tiel ne provokas konflikton kaj militon. Sed se pinte de la ŝtato troviĝus ne nur Arĥimedo, kiu jam pensas tridimensie kaj ne nur dudimensie, kiel lia romia murdinto, se tie sidus vera filozofo, kiel proponis Platono en sia verko Respubliko, li invitus kaj akompanus siajn civitanojn al kvindimensia kresko, kresko en la spirito. Tia ŝtato eble ne apartenus al la teknike kaj ekonomie elstaraj, sed ĝiaj civitanoj vivus saĝan kaj feliĉan vivon. Tia ŝtato ne nur ne danĝerigus aliajn najbarajn ŝtatojn, ĝi elradius pacan kaj provokus pacan konduton ankaŭ ĉe la aliaj. Sed niaj modernaj ŝtatoj estas simple tro grandaj kaj kompleksaj por povi kreski en la kvina, spirita dimensio. Eĉ en tri dimensioj, kiuj faras volumenon kaj simbolas

ankaŭ kvaliton kaj efikecon ili apenaŭ povas kreski. Kaj tiel ni jam tuŝis la duan problemon geometrian: proporcio kaj simetrio ...”

”Bone, mi iel povas sekvi. Sed kio pri proporcio kaj simetrio, kian rilaton tiuj ĉi geometriaj nocioj havas kun militado?” ne ĉesis konsterniĝi Georgo.

”Vi verŝajne ne kontestus, se mi konstatus, ke la muso estas, kondiĉe ke ni ne trovu ĝin en nia nutraĵdeponejo, tre simpatia, tre ĉarma besteto, ĉu?”

”Nu, jes, knabinoj havas pri ĝi apartan opinion, sed ĉiukaze ĝi bone funkcias kiel metaforo por simpatia partnero ...” respondis Georgo, surprizita pri la muso ene de la problemo.

”Ĉu vi povas en via fantazio pligrandigi la saman ĉarman muson ĝis la dimensio de, ni diru, porko aŭ granda hundo? Ĉu vi vidas tiel grandan muson antaŭ vi? Ĉu vi vidas ĝin same ĉarma kaj simpatia?”

”Verdire mi preferus vidi danĝeran leonon ol samgrandan, kvankam ne tiel danĝeran musegon!” diris ridetante Georgo.

”Tre bone. Sed nun bonvolu pripensi, kial? Vi tiel grandan muson ne timus pli ol samgrandan leonon, kaj tamen vi sentus antaŭ ĝi abomenon. Kial do?”

”Mi ne scias verdire, sed iel tiu nova dimensio ne konvenas por ĝia formo kaj naturo ...” iom post iom elbuŝigis Georgo.

”Ĝuste tiel estas. La misproporcio estas, kiu vin abomenigas kaj timigas. Kaj prave. Fenomenoj sen ĝusta proporcio estas danĝeraj por sia medio. Ili provokas timon — kaj timo provokas agreson kaj fine atakon. Vi havas militon pro manko de ĝusta proporcio! Ĉu ne estas preskaŭ ĉiuj fenomenoj de nia moderna socio ekster la natura proporcio? Rigardu mo-

dernajn urbojn, rigardu niajn teknikajn istalaĵojn ... Ĉu ne estas jam simpla aŭtomobilo per sia nekontrolebla rapideco io evidente eksterproportia kompare al la homa naturo kaj bezono? Ni vivas en misproportia mondo, tial ni tendencas al angoro kaj agreso, al konstanta konfliktado kaj militado sub diversaj formoj. Eĉ la ŝtatoj mem havas eksterproportiajn dimensiojn. Vere bonaj ŝtatoj en nia mondo estas nur tiuj, kiuj el la antikva aŭ mezepoka tempoj konservis sian miniaturan grandecon: urbo kaj iom da ĉirkaŭaĵo. San Marino ne hazarde estas unu el la plej sukcesaj ŝtatoj de la monda historio: preskaŭ du jarmilojn sendependa, neniam havinta revolucion aŭ intercivitanan militon, sukcesinta eĉ kontraŭ grandaj imperioj, kiuj ĝin volis konkeri. Kaj ĝia grandeco estas monteto, ĝia popolo 50.000 da civitanoj — probable spiritaj idoj de Arĥimedo ...”

”Ni devas diri vorton do ankaŭ pri simetrio,” proponis Georgo.

”Vi rememoras, kia figuro ornamas la fasadon de la tribunala palaco, ĉu, Georgo?”

”Estas Iustitia, diino de la justeco. En unu mano ŝi tenas glavon, en la alia pesilon kun du teleroj ...” bone orientiĝis Georgo.

”Vidu, unue vi havas simetrion inter la pesilo, kiu simbolas justan pritrakton de la afero, kaj glavo, kiu simbolas efektivan povon, sen kiu la justeco restus ridinda konsilo. Se la glavo estus pli forta ol la pesilo, tio signifus, ke la justeco kaj perforta povo, kiu garantias kaj efektivas la funkciadon de la justeco, ne troviĝus en simetria ekvilibro, ke perforto estus pli forta ol pripenso kaj prijuĝo. Tiel funkcias tiranioj. Se, kontraŭe, la pesilo estus malsimetrie pli peza kaj forta ol la

glavo, ni havus eble tre bonajn verdiktojn, tamen senefikajn, ja kanajloj moke fajfus kaj gaje ridus pri ili, se la glavo ne estus sufiĉe forta por efektiviĝi tion. Tiel funkcias dekadentaj demokratioj, kiuj tendencas al anarkioj. Verŝajne ni nun troviĝas en tia stato. Dum regis la simetrio, viktimoj de la krima ago post la proceso ridis kaj krimuloj ploris. Nun estas inverse: la viktimoj ploras kaj la krimuloj bone ridas. Tion oni povas uzi kiel metaforon por ĉiuj interhomaj, sociaj kaj ŝtataj aferoj. Ĉio ĉi povas bone funkcii nur, se estas simetrio. Prenu usonanon, kiu scias nur sian anglan lingvon, tamen gigantan — kaj islandanon kun sia lingvo, parolata de 300.000 homoj. Se ili devas interparoli, ili ne troviĝas en simetria pozicio. islandano devas aldone pagi, por ke la konversacio prosperu, li devas lerni la anglan, dum usonano neniam devas lerni la islandan. Tio povas dum certa tempo iel funkcii, sed la situacio mem pro sia nesimetrio provokas frustron, malkontenton, fine agreson, foje eĉ militon. Ni havas lingvajn militojn kaj ekstermojn!”

”Sed kion fari rilate tion? Klare, ke pli malgranda devas sin adapti al la pli granda ...” saĝumis Georgo.

”Jes, tiel rezonas la idoj de la romia oficiro, se vi rememoras la satiron pri Arĥimedo ĉe Ĉapek. Sed ekzistas ankaŭ alia modelo. Vi povas enkonduki neŭtralan facile lerneblan lingvon, kiun lernu ili ambaŭ, Usonano samtiel kiel Islandano. Tiu investo ne kostas al ili multe, sed ili havas profiton gigantan. Ili subite troviĝas en simetria komunika situacio. Neniu el ili plu sentas frustron kaj malkontenton, kontraŭe, ĉiu havas bonan senton, ke ili samgrade investis al la komuna interparolo. Tio estas la saĝo de d-ro Zamenhof, kiu en la jaro 1887 lanĉis la de li inicitan ’internacian lingvon’, Esperanton.

Oni povas interkompreniĝi mondscale ankaŭ sen Esperanto, ekzemple en angla aŭ ĉina aŭ rusa. Sed oni ne povas tion fari — sen tiu genia solvo — simetrie. Kaj simetrio, ankaŭ komunika simetrio, estas unu el la kondiĉoj por la daŭra paco!”

”Ĉu oni povas iel unuigi ambaŭ geometriajn ideojn en unu sistemo?” Georgo kolektis lastajn unuojn de sia spirita forto.

”Nu, jes, ni prenu simple la homan estaĵon mem. Laŭ nia geometria instruo la homo ne tro kresku horizontale, tio estas, akirante pli kaj pli da ekskluziva spaco sur la fizika nivelo. Li diversteme kresku vertikalen kaj fine ankaŭ en la kvina, spirita dimensio. Tio konkrete signifas, ke ĉiu homo estu laŭ sia naskiĝo membro de sia familio kaj de sia vilaĝo aŭ urba kvartalo. Kiel familiano kaj vilaĝano aŭ urbkvartalano li parolas sian gepatran dialekton. Sed li apartenas ankaŭ al sia popolo kun propra literatura komuna lingvo, do li estas ankaŭ italo, polo, anglo, franco, greko ktp. Tiun pli larĝan apartenon li esprimas en sia nacia literatura lingvo, en kiu li partoprenas ankaŭ grandskalan kulturon kaj literaturon. Sed ĉiu homo estu ankaŭ mondĉivitano. Sed tio oni ne povas komplete esti sen adekvata lingva esprimilo. Por vere komplete esti mondĉivitano aŭ kosmopolito oni bezonas tutmondan lingvon — kaj ni jam pli ol cent jarojn havas ĝin, la internacian lingvon Esperanton. Tio faras vertikalan strukturon kaj kreskon de ĉiu homo. Tiaj homoj ne havas plu motivon malŝati apartenantojn de aliaj medioj kaj nacioj, ja li kun ĉiuj parenkas sur la nivelo kosmopolita kaj tion esprimas per lingvo internacia. Tia homo povas serioze pensi kaj agi por la paco. Aliaj povas nur ripeti plaĉajn sloganojn kaj en praktiko tamen agi laŭ la maniero de la romia oficiro mortiginta Arĥimendon ...”

Ili ne plu estis solaj. Ĉirkaŭ ili kolektiĝis ĉiuj aliaj adeptoj de la filozofia seminario ĉemara.

”Ne estas gaja tasko informi vin, ke ni havas lastan komunan vesperon kaj ke morgaŭ ni forveturos frumatene por eviti tro varman atmosferon en aŭtomobilo!” klarigis sinjorino Majda.

”Ĉio havas sian finon sub la suno, kiel diris unu el la unuaj filozofoj en la homa historio, la saĝa Salomono ...” preskaŭ rezigne konstatis profesoro Andreo.

Post kvarona horo brulis antaŭ iliaj tendoj la adiaŭvespera fajro. Apenaŭ videblaj fajretoj brulis ankaŭ en iliaj junaj okuloj ...

FINO

Pri la aŭtoro

Vinko Ošlak naskiĝis 1947-a en la urbo Slovenj Gradec en Slovenio. Post studado de politikaj sciencoj en Labako (Ljubljana) li praktikis diversajn profesiojn, kiel: instruisto, ĵurnalisto, kultura organizanto, preseja kompostisto, ministro, tradukisto, preseja korektisto, eldoneja redaktoro k.a. Ek de la jaro 1982-a li vivas en Klaŭdiforomo (Klagenfurt/Celovec) en Aŭstrio — ek de 1994-a aŭstria civitano — kaj laboras kiel pedagogo por adoltoj kaj tradukisto ĉe Katolika agado de la karintia diocezo.

Ĉe *Akademio Internacia de la Sciencoj* en San Marino li bakalaŭriĝis per tezo pri la priŝtata filozofio de Novalis kaj magistriĝis per tezo pri problemaro de identeco kaj de lingvopolitiko. Kiel asista docento li prelegis dum kelkaj studadsesioj de AIS pri filozofiaj temoj.

Li verkas en slovena, germana kaj internacia lingvoj. Aperis el lia plumo romanoj, taglibroj, poezia kolekto, filozofiaj libroj kaj sennombre da kontribuoj en slovenaj, aŭstraj kaj esperantaj publikaĵoj. Li tradukas el la angla, germana kaj Esperanto en slovenan kaj inverse, el la slovena kaj germana en Esperanton. Aŭtoroj, de li tradukitaj: Tagore, Privat, Ŝtimec, de Zilah, Herder, Watzlawick, Cankar, Capuder, Rebula, Haecker, Novalis, Kant, Goll, Zweig k.a. En 1997-a li eldonis en slovena lingvo libron pri Esperanto: *Pojasnilo prijateljem o esperantu* (La klarigo al amikoj pri Esperanto).

Adreso: Viktringer Ring 26, AT-9020 Klagenfurt/Celovec
Retadreso: oslak@katoliska-akcija.at

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-121-6